

# BIBLIOGRAFIA GAZETO

Redakcio kaj administracio  
Hungarujo, Budapeŝto, IX.,  
Mester ucca 53, V. 7. —  
Telefonnumero: 380-84

REDAKTAS:  
**K. KALOCSAY**

Senpaga por abonantoj al  
Literatura Mondo kaj ŝnoroj  
de AELA. — Aparta abonado  
1.80 svisaj frankoj por jaro



## *PRI KELKAJ KRITIKAJ PRINCIPOJ*

La Literatura Mondo-eldonejo decidis aperigi apartan kritik-revuon, per tio manifestante, ke ĝi rekonis la eksterordinare signifan rolon, kiun la kritiko devas plenumi en nia literaturo. Ĉi tiu revuo ne volas esti nura recenzaro, kvankam la recenzoj formos ĝian trunkon kaj ni intencos aperigi plurajn recenzojn pri samaj libroj, akceptante recenzojn ajnvidpunktajn, kondiĉe, ke ili estos verkitaj interese: sed ĝi volas okupiĝi ankaŭ pri ĝeneralaj studoj koncerne la kritik-arton kaj pri konigo de kritikaj tendencoj ĉu universalaj, ĉu speciale esperantaj.

Permesu, ke en la nuna numero mi parolu iom pri kelkaj sekvindaj kritikaj principoj, plie etikaj, ol pure artismaj.

Unue: la kritikisto rigardu ĉiam la verkon, kaj ne la verkinton. Personaĵoj de l' aŭtoro estu atentataj nur, se ili nepre necesas por klarigi la verkon. Neglekto de ĉi tiu grava postulo alportas pardonon de l' objektiveco, kiun ĉiu kritikisto devas fiksi al si cele, se li ne volas iĝi simpla reklamisto aŭ pamfletisto. Insisto pri apudaj cirkonstancoj, spertoj akiritaj per persona kontaktiĝo kondukas al la danĝero, ke anstataŭ serioza kritiko oni skribas klaĉaĵon aŭ atakaĉon kontraŭpersonan.

El la postulo de l' objektiveco sekvas, ke la kritikisto devas kiel eble pleje sendependigi sin de ĉia influo ekstera, kaj de ĉiaj antaŭjuĝoj kaj baroj internaj. Mi aludas pri ligoj, kiujn altrudas raso, klaso, eduko, k. t. p. Kompreneble centprocentan liberigon oni ne povas postuli, ja ankaŭ la kritikisto estas homo... Kaj ĉi tiu postulo tute ne malhelpas, ke la kritikisto mem havu forte akcentitan mondrigardan sintenon. Temas nur pri tio, ke lia sinteno ne influu lin, kiam li kritikas verkon, kiu havas alian, eble eĉ kontraŭan sintenon. Lia devo estas: konstati, kion intencis la aŭtoro kaj kiel li sukcesis realigi sian intencon. Se la tendenco de la verko ne plaĉas al la kritikisto, li povas ĝin ataki, sed nur per argumentoj bone prezentitaj. Neniel per senmotivaj asertoj kaj per falsigo de la senco de l' kritikita teksto, kiel enmodiĝis lasttempe en Esperantujo.

703292-03



La kritikisto menciuj la trovitajn mankojn, sed li gardu sin de ekskluziva sindono al flarado pri ili. Pure negativa kritikado atestas pri malplena, malsana animo.

La kritikisto nemiam laciĝu en la pliprofundigo kaj plilarĝigo de sia kulturo, kaj li ne kaŝu la akiraĵojn, eĉ se iuj akuzos lin pri »snobismo«. Internacia literaturo ja devas iĝi komuna trezorejo de ĉiuj kulturoj, kaj ne ia malriĉa, sensuka abortaĵo, kia ĝin volus fari tiuj, kiuj tuj vekias pri »nekompreneblo al orientanoj«, sed ili trovas naci- aŭ klasikdevenan kulturelementon.

La kritikisto kritiku la verkon, ne la personon de la aŭtoro, sekve ankaŭ en sia stilo li klopodu al objektiva tono. Severe, eĉ senindulge oni povas kritiki per ĝentila voĉo. Kaj se la aŭtoro trovas personan atakon tie, kie ĝi ne estis, se li ofendiĝas, kiam ne estis kaŭzo, la kritikisto bedaŭru la miskomprenon, sed kun pura konscienco li pluiru sian vojon, ĉar li agis en la intereso de nia literaturo.

La kritikisto zorge esploru la formon eksteran kaj internan de l' verko. Li konsciu, ke el arta vidpunkto pligravas la »kiel« ol la »kio«, sed li ne forgesu, ke la Arto estas nur ilo kondukanta al la pliperfektigo de l' homo. Kaj li konfesu, ke ĝi estas la plej nobla, la plej supera, eble la ununura ilo... Li konfesu la *esencan* sendependon de l' Arto de historiaj, geografiaj, rasaj kaj klasaj faktoroj, li rekonu, ke provizore povas ĝin makuli influoj, tendencoj, sed li vidu klare, ke ili restas nur surfacaj, ke la sentempan, internan substancon ili ne povas infekti: li konfesu, ke la Arto supervivos krizojn, kataklismojn, ĝis sola homo vivos sur la Tero...

Ludoviko Totsche.

## R E C E N Z O

ESTONA ANTOLOGIO. I. Eldonejo: Esperanto-Asocio de Estonio, Tallinn, 1932. 22×15 cm. 136 pĝ. Prezo: 2.— mk. + 10% por sendkostoj.

Esperanto ĉiam pli kaj pli alprenas la karakteron de kulturmovado, evidente atestas tion la nivel-altiĝo de ĝia originala literaturo kaj la multflanke orientita klopodo por alproprigi la trezorojn de l' naciaj kulturoj. Kaj mi pensas, ke ĝuste per tiu ĉi orientiĝo esperanto ektrovis sian historian mision: iĝi ekparoligilo de sinteza, pure homa kulturo.

Kaj ne estas kontraŭdiro, se la vojo kondukanta al ĉi tiu pli perfekta — ankoraŭ ne ekzistanta — supernacie unueca kulturo nin gvidas tra la konigo de l' ekzistantaj naciaj kulturoj. Ja estus erara vojo, se la *lingvo* esperanto volus okupi la lokon de la multkolora brila kalejdoskopo de l' naciaj lingvoj, kiom tio malriĉigus ne nur la ilojn de l' artisto, sed ankaŭ la esprimeblojn de l' pensanta homo! Ne, esperanto ne forpeli la naciajn lingvojn, sed iĝu apud la nacia, la patrina lingvo ĉies dua lingvo: la homa



lingvo! (La propagandantoj de »unu homaro, unu lingvo« ne pripensas, ke la efektivigo de iliaj klopodoj detruus mem la unu lingvon: la neekstermebla instinkto de l' homo al varieco — se ĝi ne povus elvivi sin en la naciaj lingvoj — nesaveble disfalis ĝin je dialektoj.) Sama la kulturo esp-a ne estas malamika al la naciaj kulturoj, kontraŭe, ĝi volas absorbi ilin, ke tiel riĉiginte ĝi servu baze al la ĝermanta homa kulturo, kiu estos sintezo, do pli ol nura kunmetaĵo: se la naciajn kulturojn mi komparas al la koloroj de l' ĉielarko, la ĝermantan esp-an kulturon mi povus kompari nur al la blanka koloro, kiu estas ja pli ol nura adicio de la ceteraj koloroj! Ke la esp-a kulturo esploras tiujn elementojn de la naciaj kulturoj, kiuj servas por kunigo, ne por disigo, tio estas ja komprenebla. Sed tiuj ĉi elementoj estas la plej valoraj, ili formas la kulturon laŭ la vera senco de l' vorto!

Post la belga, bulgara kaj kataluna antologioj jen estas antaŭ ni la unua parto de l' estona. Ne bezonas multan klarigon, ke unuavice la »malgrandaj nacioj« aperigas siajn antologiojn. Se oni rigardas historian libron pri la tiel nomata *mondliteraturo*, oni tuj rimarkas la regantan rolon de la literaturoj de l' pleje devastigitaj lingvoj. Tiun nekontesteban fakton naskis ne la genimariĉeco de la malmulte regantaj lingvoj, sed simple la baroj, kiujn la apenaŭ konata lingvo levis kontraŭ la internacia validigo de l' verkistoj. Ankaŭ el ĉi

tiu vidpunkto esperanto havas la mision rebonigi maljustan situacion.

La ĝenerala bildo, kiun dum la lego de l' antologio la leganto ricevas pri la estona popolo, estas tre simpatia. Kaj la unua kaj restanta impresoj pri ĝia literaturo estas, ke ĝi estas ĉefe *popola* literaturo. En la plej bona senco de l' vorto, do ne pensu pri artifike imitita pseŭdopopola arto, nek pri senkritika, senkondiĉa, sed tiom pli senkomprena kaj malsincera adorado de ĉio, kio devenas el la popolo; sed pri literaturo, kies gvida celo estas batali por la popolo kaj levi ĝian kulturan nivelon. (Kiel interesan troigon ĉi direktan mi mencias, ke F. R. Fählmann verkis mitajn rakontojn, kiujn li asertis popoldevenaj. Kiel ni ekscias el la enkondukita studo, li faris tion por »kredigi al la scienca mondo kaj la eksterlandaj inteligentuloj, ke la estona kamparano popolo estas kulturacio.«) La sorto de la estona popolo ne estis facila: inter la rusa kaj germana muelŝtonoj ĝi devis konstante defendi sian vivon, la lando ne estas riĉa kaj la estono devis pagi per peza laboro sian modestegan viv-nivelon. Agrikultura lando, do ĝia literaturo estas trasorbita per la pripenetro de l' kamparana vivo. Batalplena vivo, do ankaŭ la literaturo respegulas la batalojn, kaj tiel ĝin karakterizas profunde radikiginta sociala sento. La ombroj de l' feŭdalismo ankoraŭ fantomas sur la estonaj kampoj:

»Nigra ombro ŝvebas super valo...  
 »Ĝin postlasis la servutotempo,«



»Por ke ĉesu plenpotenco via,  
Ke ekvenku suno orradia,  
Ombro nigra, nun jam estus  
tempo.«

(K. E. Sööt-Hilda Dresen.)

Kaj estas honoro de l' estona literaturo, ke ĝiaj verkistoj ekstaris je la flanko de l' subpremintoj, de l' falintoj...

La dua ĝenerala impresio, kiun oni ricevas dum la lego de la libro, estas, ke la estonaj verkistoj rigardas per apertitaj okuloj en la naturo. Ilia lando laŭaspekte ne estas trovaria, sed ili scias ekvidi kaj prikanti la belecojn de l' estonaj kamparoj kaj de l' estona marbordo. Kaj kiel kara estas la ne tre riĉa vegetaĵaro al la estona poeto! (Vere, se iu deziras ekzerci sin pri la nomoj de plantaĵoj, tiu nur legu tradukitaĵojn el la estona lingvo!)

Trian interesan karakterizaĵon de l' estona literaturo mi vidas en la signifa rolo de virinaj verkistoj. Ne estas hazardo, ke en la estonia esperanto-movado tiel eminentan lokon okupas niaj samideaninoj! Ankaŭ en la estona literaturo ni trovas multajn interesajn poetinajn individuecojn.

Sed ni jam vidu, kion alportas la unua volumo, kiu prezentas la estonan literaturon de komenco, sed kiu jam ampleksas verkistojn ankoraŭ vivantajn. La libron enkondukas mallonga karakterizo pri la literaturo kaj la verkistoj

**Ĉiujn librojn, recenzatajn en tiu ĉi Gazeto vi povas mendi plej facile de la librofako de Literatura Mondo. Je peto volontege ni sendas liston de enpagejoj aŭ poŝtekan enpagilon.**

entenataj en la unua volumo. Nu, tiu ĉi artikolo ne kontentigis min. La ĝenerala parto estas trokonciza, mi preferus sintezan historian trarigardon de l' tuta literaturo, la notojn pri la verkistoj mi metus antaŭ la tradukitaĵojn de l' unuopaj verkistoj. La popola poezio kaj Kalevipoeg meritis apartan studon. Ankoraŭ ĝenerala rimarko: la poezian kaj prozan parton mi nepre aperigus en apartaj volumoj. Tio multe pli helpus la trarigardeblon de l' tuto kaj bonvenus al verslegemuloj.

La unua verkisto estas la sennoma popolo, ĝin prezentas fabeloj kaj kantoj. La fabeloj estas sufiĉe malfortaj kaj vekas intereson plie nur el folklorista vidpunkto. La formo de l' popolokantoj estas la senrima kvarrok- eo kun aliteracioj. La kantoj temas pri »fraŭla flato«, pri la virokoro, pri la *zorgo de patrino*, ekparolas ankaŭ la sociala sento (»Tamen devas sklavo naĝi«), sed la ĉefa temo de l' estona popolkanto estas mem la kanto. La estona kantisto estas obsedita de sia propra kanto. Kvankam la ĝenerala nivelo de l' prezentitaj kantoj ne estas tre alta, tamen mi trovis inter ili vere belajn, kiel ekzemple la Belokanton (trad. de H. Seppik) kaj Kantu, buŝeto (trad. Hilda Dresen.) Mi ne povas kontraŭstari la tenton, ke ĉi lastan mi tute skribu ĉi tien:

»Kantu, kantu vi, buŝeto,  
vigle voku, birdbeketo,  
ridetadu, ruĝbereto,  
ĝojegadu, ho, koreto!  
Iam vi ja maljunigos,  
senviviĝos, silentiĝos,



por eterne entombiĝos,  
 en la tero vi troviĝos,  
 sola en la sablo kuŝos,  
 ĉerktabuloj vin ĉirkaŭos.

Kiu donos do trinkaĵon,  
 apetitan anseraĵon,  
 portos tomben pork-rostaĵon,  
 ŝovos sablen ov-fritaĵon,  
 al mortinto malt-trinkaĵon?  
 Talpo donos la trinkaĵon,  
 apetitan anseraĵon,  
 portos tomben pork-rostaĵon,  
 ŝovos sablen ov-fritaĵon,  
 al mortinto malt-trinkaĵon.«

Imagivan bildon mi trovis  
 en verso de l' unue prezentita  
 poeto K. J. Peterson (trad. Hilda  
 Dresen):

»Jen la kantisto nun  
 Forte ekkantas kun  
 Voĉ' emocioplena.  
 Kaj la popoloj,  
 Silentante kvazaŭ  
 Rokoj, aŭskultas lin.«

En kamparanan domon gvidas  
 la kvara akto de l' dramo Lup-  
 homo, verkita de August Kitz-  
 berg. Temas pri amo de filo al  
 adaptita filino de l' gepatroj. La  
 amo estas malhelpata de la ge-  
 patroj. En la fono regas la su-  
 persciĉemo de l' vilaĝanoj. Tamen  
 mi ne trovas ĝusta publikigi en  
 antologio partojn de teatraĵo aŭ  
 romano, aŭ oni aperigu tutajn  
 teatraĵojn, aŭ oni tute rezignu pri  
 prezento de l' drama arto (es-  
 cepte, se temas pri parto, kiu  
 povas efiki kiel memstara tuto;  
 sed ĉe Lophomo ne estas tiel).

De Jakob Liiv estas tradukita  
 sub titolo »Ranoj« internacie  
 abunde konata fabelo. Kiel traduki

ion, kion ĉiu konas el lernolibroj?  
 En la »Helpu!« de Ernst Peter-  
 son (trad. J. Törn) la leganto  
 konatiĝas kun historio pri malfel-  
 iĉa virino, kun multaj infanoj  
 kaj ebriema, kruda edzo. La  
 prezentmaniero de l' verkisto es-  
 tas iom naiva, sed oni ne devas  
 prisilenti, ke li havas bonajn ok-  
 ulojn por ekvidi la preman so-  
 cian situacion de malfeliĉuloj. La  
 sceno, kiam la knabo Sassa at-  
 akas la ebrian patron por defendi  
 la patrinon, ne senas dramecan  
 streĉon.

Sendube la plej valora peco de  
 l' antologio estas *La dishakita ga-  
 leaso* (kial galeaso? ĝi signifas  
 grandan ŝipegon, ŝajnas al mi, ke  
 barko estus la ĝusta traduko) de  
 Jakob Mändmets (trad. August  
 Vellner). Temas pri epizodo el la  
 vivo de marborda loĝantaro. Akre  
 siluetigitaj karakteroj, facile glit-  
 anta rakontado, delikata psikol-  
 ogio distingas ĝin. La sola prozaĵo  
 de la libro, kiu evidente celas al  
 arta stilo. Tion komprenis ankaŭ  
 la tradukinto. La lastan aŭtoron  
 de l' volumo, Eduard Vilde, prez-  
 entas du fragmentoj. La unua,  
*Milito en Mahtra* (trad. Helmi  
 Dresen) pripentras la penegan la-  
 boron de l' kamplaboristoj. En  
 la alia, *La laktisto en Mäe-  
 küla* oni konatiĝas kun la vivo  
 de etbienuloj. La juna edzino de  
 l' ĉefheroo, Mari, estas modelita  
 kun artista mano. Bedaŭrinde la  
 stilo estas peza, malkonciza kaj  
 la traduko ne multe helpas ĝin..

La laboron de l' traduko faris  
 Helmi kaj Hilda Dresen, Nikolai  
 Karotam, E. Lübek, Agnes Nii,  
 H. Sakaria, A. R. Saul, Henriko  
 Seppik, J. Temmer, J. Törn, Vil-



lem Vaher, August Vellner. Generala impresio pri la traduko: en ĝi estas uzata korekta lingvo, korekta stilo. Intence artan stilon mi ne trovis, sed tion klarigas ankaŭ la speco de l' tradukitaĵoj. Tamen — krom la jam menciitaj — mi nomu la Belokanton (Seppik), la poemojn de K. E. Sööt, Juhani Liiv (Hilda Dresen), kiuj el stila vidpunkto elstaras. Rimarkoj: mankas tabelo de vortoj retroveblaj en la P. V.; anstataŭ *konkiri* jam oficialas *konkeri*; la libro suferas de *je-epidemio* (plena je, profiti je, ŝtonjeti je kokino!); vortoj, kiel *ovumi*, *greventumajo*, pravas, ke ankaŭ certaj vortkunmetaĵoj povas kaŭzi kaprompon, ne nur la neologismoj... Ke oni trovas nur tiom da manketoj, tio pravas la bonecon de la lingvo. Goje oni legas la imagivan vorton »nubopuŝisto« uzatan de Helmi Dresen.

Resumo: kvankam ne estas en ĝi ĉefverkoj, tamen la unua parto de l' estona antologio meritas la interesigon de la publiko, tiom pli, ĉar la interesigo plirapidigos la eldonon de la sekvontaj tri volumoj, kiuj prezentos la modernan estonan literaturon. Kaj la esp-a leganto ja povis konvinkiĝi el la Under-poemaro, el la Tuglas-noveloj, kiajn trezorojn kaŝas ĉi tiu literaturo!

Ludoviko Totsche.

LA KREITAJ PROFITOJ, pulĉinela komedio en du aktoj de *Jacinto Benavente*, tradukis el la hispana: *Vicente Inglada*. Eldonita de Hispana Esperanto Asocio. Madrido, 1932. 96 paĝoj. Prezo 1.— sv. fr.

Amuza kaj ĉarma farso. La reŝema kaj serioza Leandro kaj la ruza kaj facila Krispin, sur kies nuko sidas pli ol peruko, rifuĝas de amasigitaj procesoj el Bolonio kaj venas en novan urbon. Leandro estas senkuragiĝita. Sed ja ne Krispin, li prenas en siajn manojn la sorton de sia naiva kunulo. Li trudas al li la rolon de ĝentila, grandanima riĉa kavaliro, kaj li mem rolas kiel lia kruda kaj senpolura servisto. En ĉi tiu rolo li mistifikas ĉiujn, prunteprenas por sia sinjoro manĝon, loĝon, monon, admiron de kapitano kaj de poeto, diskretajn amperajn servojn de facil-mora sinjorino, poste li plektas amon inter Leandro kaj filino de parvenuo kun dub-devena riĉo. Kaj kiam la pago de la amasigitaj ŝuldoj ne estas plu prokrastebla li malkaŝas ĉion al la trompigitaj kreditoroj. Ĉi tiuj koleras, indignas, furiozas, sed poste, kion fari, vole-nevole ili rekonas la pravon de Krispin: ili devas helpi Leandron por la geedziĝo kun la riĉa filino, por povi ricevi sian monon el la abunda doto. Kaj vere, havante tiamaniere *kreitajn interesojn* pri la bonstato de Leandro, ili venkas ĉiujn malhelpojn, kvankam ili devas venki eĉ Leandron mem, kiu vere enamiĝis kaj volas rifuzi la manon de la bela knabino, al kiu li taksas sin neinda; per ĉi tio li nur plie konkeras la koron de knabino: la ruza Krispin ja kalkulis en siaj planoj ankaŭ pri amo kaj idealeco.

Ĉio ĉi okazas antaŭ ni tre vigle kaj amuze, spicite per spritaj parolturnoj kaj trafa karakterpentro.



Kiel mi diris, amuza kaj ĉarma farso.

Parolante pri la traduko, oni kompreneble ne povas citi gramatikajn erarojn kaj malkorektajn ojn el la laboro de l' eminenta tradukinto kaj, se oni ne metas specialajn pretendojn, oni povas ĝin diri bona kaj laŭdinda. Tamen, mi pretendus iom pli ol nuran tradukon laŭsencan kaj laŭvortan; la vera kaj inda tasko estus la kreo de tiu facila stilo, kiu estas necesa en tiaj facilaj ludoj. Vere, en tiaj tradukoj oni bezonus ne tiom simplan *tradukon*, kiom *transverkadon*, dum kiu oni konsideras la egajn diferencojn inter la nacilingva kaj esperantista aŭskultantoj kaj inter la rapideco de la hispana kaj Esperanta lingvoj. Longaj parafrazoj, fraz-intermetoj, kiuj al nacilingva aŭskultanto estas tute naturaj kaj facilaj, en Esperanto iĝas diable komplikitaj, kelkfoje prezentas pli-malpli malfacilajn enigmojn. Tiajn enigmojn oni eble senpene solvas legante, sed la plejmulto tute fiaskas pri ili aŭskultante.

Nu, rilate al la plenumo de l' supre nomita tasko la eminenta tradukinto bedaŭrinde restis ŝuldanta. La stilo de la teatraĵo tute ne estas »teatra«, ĝi estas implikita, peza, longema; mi estas certa, ke la komedio en tiu ĉi traduko tute ne havus sukceson sur la scenejo: ĝi estus laciga kaj enuiga, kvankam la originalo ŝajnas esti freŝa kaj interesa.

Krome, eĉ se oni ne dishakas la longajn frazojn, al ni ŝajnas, ke oni povus multfoje trovi vortordon pli klaran, pli evidentigan,

ol tiu de la tradukinto. Jen ekzemplo:

»ĉar estas karaktero de la naskitaj, kiel mi, en la libera reĝlando Ruzujo, ne fari restadon en iu ajn loko, se ĝi ne estas devigita ĉe pungalero, kiu estas tre malmola restado.«

(ĉar kiu naskiĝis, kiel mi, en la libera reĝlando Ruzujo, ties karaktero estas: restadi en neniu loko, se nur ne devigite en pungalero, — certe tre malmola restado.)

Same ĝenas kaj multfoje eĉ konfuzas la ofta uzo de nenecese komplikitaj vortkunmetoj; la ofta kunfando de adjektivo kaj substantivo, ekzemple: plenkonfidateco, laŭvicesprimi, tranoktevagadi, vanpromeso, frupereigi, gravpersono, ĝustloko, fidelamiko, viglobservado, samtroviĝi, senfinama, pruvenskribiĝi, trafdistingi, tedĝeni, ordaranĝi, premembaraso, premezonone, kunamiko, observevidi, respondamanta, respondepagi, malalteranga, malgajesti, pruesti, personamaso. Ege tedaj estas la tute nekutimaj *mal-kunmetaĵoj*: malnobelo, maldigi, mal-embarasi, malkaresi, malsavi, mal-ĉarna, malerare, malplezuro, maldiafaniĝi, mallogi — ĉe kelkaj oni vere devas cerbumi, ĝis oni rekonas la sencon deziritan. Malplaĉaj estas: belvidiĝi (belaspekti), plejiĝi (troigi), konvinkiga (konvinka), haltadi (restadi), sendita (eksigita). Stranga vorto estas *enamita* (enamiginta), ĝi supozigas, ke ekzistas la verbo *enami* (igi amanta). Strange uzas la tradukinto la konjunkcion *nek*. Ekzemple:



»Por kio grava la rivero, nek malnoveco nek noveco.«

(Kiom gravas la rivero kaj malnoveco kaj noveco.)

»sen la protekto de edzo, nek parencoj, nek proksimuloj...«

(protektata nek de edzo, nek de parencoj, nek de proksimuloj.)

Erara estas ofte la loko de *ne*, ĉar ĝi ne estas metita antaŭ la vorton, kiun ĝi rilatas: tio ne min kontentigas (... min ne.); ne min! (min ne!); vi ne ĝin komprenis (vi ĝin ne komprenis); mi ne estas kulpa, sed mia edzino (ne mi estas kulpa, sed...); ne sole mi rimarkis tion (ne sole tion mi rimarkis).

»Kutima besto estas la homo« havas alian sencon, ol kian la tradukinto volis esprimi: »besto de kutimo estas la homo«, aŭ »la homo estas kutimbesto«.

Ĉu antaŭ *kiam ol* estas preseraro?

Se mi resumas miajn impresojn pri la libro, mi devas diri, ke mi plezure ĝin legis, sed en ĉi tiu plezuro, kiun mi dankas al la valoro de l' originalo, la traduko ne multe min helpis. Ĝi ŝajnis al mi iel eksmoda, mal-freŝa, kvazaŭ el la unuaj tempoj de nia lingvo. De tiam la esprim-povo de Esperanto multe evoluis, oni devas uzi ĝiajn akiraĵojn, la naturecon kaj flekseblecon, kiujn zorge kaj talente ellaboris niaj grandaj stilistoj. Eĉ, en tia tasko oni devas mem plu evoluigi, por krei la facilan, naturan »teatran«

stilon, kiu al ni evidente mankas ankoraŭ. Ĉar, se oni uzas por tia traduko lingvaĵon taŭgan nur por sciencaj pritraktadoj, per tio oni nur unu plian fojon pruvas, ke traduki ion ankoraŭ ne signifas ĝin konkeri. *Kopar.*

JULES ROMAINS: KNOCK, aŭ La Triumfo de Medicino. Komedio en tri aktoj. El la franca: D-ro Pierre Corret. Dua eldono. 80 paĝoj. Eldonejo: »Esperantista Voĉo«, Jaslo, Polujo, 1932. Prezo 7.50 fr. fr. + 10%, broŝurita.

En sia poezio »unanimista« Romaines prikantas kolektivajn sentojn per stilo sincere simpla, per lingvo konscie klara. La fonto de lia lirikista inspiro troviĝas en la socio kaj same la socio donas la fonon al liaj dramoj, en kiuj lia lirismo pariĝas kun stranga, pika humuro. En Knock per vere Moliera-a vervo kaj sprito li inversas la temon de la »Imagita malsanulo«: la kuraciston, kiu imagigas malsanojn al sanuloj.

La temo estas tiom brile ellaborita, ke indas sekvi kun pli preciza observo ĝian evoluon. La unua akto sceniĝas en aŭtomobilo kaj gvidas nin en mezon de l' okazaĵoj. D-ro Knock aĉetis de sia kolego, d-ro Parpalaid la klientaron de provinca urbeto (laŭ franca kutimo kuracisto, kiu ĉesigas sian praktikadon en iu urbo, vendas al sia posteulo sian klientaron), la aĉeton li faris *blinde*, sen antaŭa priesploro de sia estonta agadkampo. Nun en la aŭtomobilaĉo de Parpalaid li veturas al la urbeto kaj el la dumvojaj interparoladoj iom post iom klar-

Vi ricevos multe pli por via mono en la estonto, se vi ne forgesas la devizon: Propagandu por AELEA kaj LITERATURA MONDO.



iĝas antaŭ Knock, ke lia kolego trompis lin: li aĉetis neekzistantan klientaron, en la urbeto kaj en la tuta regiono vivas preskaŭ tute sanaj homoj kaj la kelkaj apopleksiuloj kaj kor-malsanuloj mortas »sen ia helpo de la kuracisto«; kaj se tamen troviĝus paganta paciento, tiu pagas nur la tagon de Sankta Miĥaelo, la solan enspez-tagon de la kuracisto en ĉi tiu provinco. Nu, sed se temas pri trompo, Knock ne restas ŝuldanto al sia kolego: li devigis sin je kvaronjaraj partopagoj, sed li aĉetis la neekzistantan klientaron per neekzistanta mono: la monon li volas akiri per kuracistaj honorarioj... Bela komika situacio: post la unua kvaronjaro klariĝos, kiu supertrompis la alian? En la dua akto ni vidas la strategiajn movojn, kiujn Knock faras por konkeri la urbon kaj ni konatiĝas pri lia gvidideo: sanuloj ne ekzistas, nur nekonsciaj malsanuloj, kaj la tasko de la kuracisto estas igi konsciaj ĉi tiujn sensuspektulojn, por ke per la helpo de la medicino ili kontraŭbatalu la kaŝiĝantan malsanon. La tria akto: plena triumfo de Knock. Post la paso de l' unua kvaronjaro d-ro Parpalaid, kiu venas por enkasigi la unuan partopagon, jam trovas sanatorion plenan de malsanuloj, kaj la komiko de la situacio kulminas, kiam li, teoria kontraŭulo de Knock, iĝas lia sanatoria paciento.

Sed Knock estas pli ol nura situacio-komedio, kaj ĝia ĉefheroo estas pli ol nura ĉarlatano aŭ senkonsciencia monavidulo; ĝi estas pli ol precize reflektanta speg-

ulo, en kiu oni rekonas la kredeman, influigeman amashomon kaj en kiu nude videbliĝas kelkaj risortoj de homaj interesoj: Romains sondas pli profunde, en Knock li verkis satiron pri la fakomo, en kiu ĉiam pli kaj pli superregas la *fakulo* kaj perdiĝas la *homo*... Parpalaid: »Nur medicinon vi konsideras... Sed kio pri la cetero? Cu vi ne timas, ke pro ĝeneraligo de via metodo iel malfortiĝus aliaj partoj de la socia vivo, inter kiuj tamen kelkaj estas interesaj?« Knock: »Min tio ĉi tute ne koncernas. Mi nur medicinas.« Cu eraras la nuntempa leganto, se en mondo, en kiu fakaj konferencoj disponas pri la sorto de l' homaro, li sentas en d-ro Knock tragike subpentritan simbolon de epoka malsano?

Koncerne la tradukon unue ni devas gratuli la eminentan tradukiston pro la ĝusta elekto de l' tradukotaĵo: tre grava problemo de nia traduka literaturo, kiun oni ne ĉiam feliĉe solvas... La lingvo de la Esp-a Knock estas nepre korekta, eble iom pedante korekta. Tiu ĉi pedanteco neniel malhelpas la ĝuon de la leganto, sed ni konfesu sincere, ke ĝi ankaŭ nemulte helpas ĝin... Precipe ĝenas tiu ĉi stila malavantaĝo en la dialogoj de la unua akto, en la dua kaj tria aktoj la dialogoj jam pliviglias. Mi ne kuraĝus diri, ke la tradukinto solvis la problemon de la Esp-a komedia lingvo. Tamen la bonecon de la traduko pravas, ke krom ia supre menciita riproĉeto la kritikisto havas preskaŭ nenian rimarkon. Eble mi ne devas prisilenti, ke la maniero, skribi la



nombrojn kiel apartajn vortojn (dek unu) iom strange aspektas. »Pleŭrezio« verŝajne estas uzata anstataŭ »pleŭrito«. »Nul« mi trovas senapostrofe uzata anstataŭ »nulo«, kial? Ĉu la esprimon »kunrigardante ĉion, kion mi nun scias pri li« la tradukinto vere trovas eleganta? Ĉu en la frazo »Knock palpas kaj sur fingro frapetas ŝian dorson« sur ne estas erara anstataŭ *per*? »Miriga homo vi estas«, ĉu ne estus pli ĝuste uzi »mirinda«?

Sed tiuj ĉi skrupuletoj tute ne malhelpis mian neĉiutagan plezuron, per kiu tiu ĉi libro pridonacis min. *Ludoviko Totsche*

FACILA LEGOLIBRO. Redaktis: K. R. C. Sturmer. 6¼ paĝoj. Eldonejo: The Esperanto Publishing Co. LTD. London. 1932. Prezo 1.— ŝil.

Tiu ĉi ekzerc-libro alportas novan tipon de legolibro: ĝi donas tekstojn, en kiuj la nova esperisto iom konatiĝas kun nia literaturo. En simpla, klara lingvo estas rakontita la enhavo de naŭ originalaj romanoj. Aŭtoroj: Baghy, Bulthuis, Engholm, Forge, Jung, Luyken, Vallienne. Rakontintoj: s-ino N. Holmes, s-roj J. F. O' Conor, A. Bode-reau, F. B. Elwell, B. M. Newell, Alec Venture, P. P. H. Ongley, A. R. Cheslyn, R. M. Morris Owen. Poste sekvas lerta propagandartikolo, *La magia tapiŝo*, verkita de Fred. E. Wadham.

Cefa valoro de la libreto estas la konciza raporto de W. B. Johnson pri *La literaturo de Esperanto*. Klaraj pensoj kaj klaraj

frazoj, lingvo vigle vivanta kaj pura de anglismoj faras tiun ĉi artikolon vere ĝuinda legaĵo. Estas kompreneble, ke pro la mallongo ne estis evitebla manko de gravaj nomoj (Schulhof), krome mi ne povas prisilenti, ke la sagaca aŭtoro evidente fiasketis en la prijuĝo de niaj modernaj lirikistoj. Estas mia firma konvinko, ke Johnson iĝos serioza valoro de l' esp-a kritiko.

La libro estas denova atesto pri la nekontestebla kapablo de niaj britaj samideanoj kaj mi devas mencii la nomon de Sturmer, kiu per la redaktado provis, ke li scias grupigi tiujn ĉi talentajn samideanojn por komuna laboro. *Ludoviko Totsche*.

C. WALTER: GAJA LERNO-LIBRO. (Eldonejo: C. Walter, Berlin, Hohenzollernstr. 11. 118 pĝ. Prezo: Mk. g. 1.75 + 10%.)

La eksterajo estas plaĉa, la titolo estas alloga. Kun granda fido ni eklegas la libron, kies bildoj estas same plaĉaj kaj konvenaj al la librotitolo. La unuajn du paĝojn ni preterlasas, ĉar tie estas gramatikaj klarigoj, kiujn la komencanto ne certe komprenos, sed vere la unua leciono komenciĝas tie, kie ni vidas tablon, seĝon, ŝipon, akvon ktp. Ĝis la kvina bildo ni povas krii: »Hura, naskiĝis la internacia esperanto-lernolibro, rektmetoda, moderna, bela, alloga, bonhumora, ilustrita! Sed... mi devas mencii, ke nuntempe mi instruas en Svedlando kaj la sveda lingvo estas unu el la lingvoj, kie la akuzativa formo ne estas ĝenerala, sekve la akuzativo ne estas komprenigebla per



la frazo: »sinjoro mangas panon«. Sed la 5-a bildo jam faligas la lernanton en la akuzativ-maron, kaj li ne scipovas naĝi, eĉ boateton li ne ricevis de la aŭtoro. La akuzativo estas komprenebla, sed ĝi ne estas memkomprenebla fakto por la svedoj kaj kelke da aliaj nacioj. Kaj mi nun devas iomete mallaŭtigi la hura-krion, ne naskiĝis la internacia, vere internacia legolibro, sed sendube aperis bona, lerte farita libro, kiun oni povas uzi kun vortaro, aŭ alia helplibro. Sed fari tute rektmetodan libron estas ja malfacile kaj miaj rimarkoj estas prefere *principaj*, ol rilatigitaj al la libro-individuo, kiu reprezentas la avantaĝojn kaj la malfavorojn de sia metodo-speco. Oni ne povas diri, ke: »mi instruas laŭ la rekta metodo, kaj ne ekzistas alia metodo«, ĉar tiam okazas, ke ekz. tiaj vortoj, kiel *jam*, *ankoraŭ* kaj multaj aliaj, kiuj estas pli gravaj, ol ekz. »argano«, tute ne estas en — cetere bonega — lernolibro. Ni ne ligu nin rigide al sola metodo. Sed tiu ĉi libro estos bonega bazo por la plua agado de la aŭtoro, kies kvalitoj certe estas unuarangaj kaj esperigaj. Se mi nun iom pli longe pritraktas la libron, ol kutime, tio signifas, ke malgraŭ miaj rimarkoj kaj riproĉoj, mi taksas ĝin altvalora kaj inter certaj kadroj oni povas uzi ĝin bonege. Ĝeneralan rimarkon mi havas nur unu; la varieco povas esti ne-laciga nur ĝis certa grado, se oni troigas la variecon, ĝi perdas sian esencon. En la libro la detaloj iomete disfalas, troabundas kaj la komence vekita intereso iomete refalas, ĉar dis-

speciĝas aŭ mankas, la »epikaj-oj.« La libro reprezentas la »lirikon« en la instruado. Kaj ankoraŭ kelkajn vortojn pri la detaloj. Mi ne ŝatas la demandon, kiun la lernanto trovas komence de la libro: »Kio estas ili?« — ĉar en ĝi escepto sin kaŝas, kion oni povas rimarki kaj pro tio pridubi la regulecon de la lingvo. (Vere mi ne tute komprenas, kial oni ne povas uzi la vorton: »kioj«?) — La infinitivo, la kondiĉa formo aperas surprize, kiel fakto, sed la instruisto ja ne rajtas kredi, ke por la lernantoj estas gramatikaj faktoj. Mi havas ankoraŭ kelke da rimarkoj, sed ili devenas el miaj principaj vortoj kaj fine mi ne volas pleniĝi mian recenzon per mallaŭdoj pri libro, kiu entute estas atentinda, fantaziplena, detala kaj laŭdinda verko de sperta fakulo. Li certe kapablos verki vere internacian lernolibron, se li priatentos la plej gravajn naciajn gramatik-ajojn. *Szilágyi.*

## REVUO DE REVUOJ

Jam plena duonjaro pasis de tiam, ke ni lastfoje trarigardis nian gazetaron. Eventoplena duonjaro: kaj el la vidpunkto de nia ĝenerala movado, kaj el tiu de la literatura vivo. En ambaŭ fermentas ideoj, kunpuŝiĝas diversaj opinioj. Ne estas do mirinde, ke tiu ĉi maltrankvilo senteble travibras la recenz-kolonojn de la gazetoj, estas do facile klarigeble, ke nia nuna raporto temos ĉefe pri la problemoj, kiuj ŝvebas en la atmosfero de l' Esp-a kritiko kaj... pri la kritikistoj mem.



Sed antaŭ ol tuŝi tiujn ĉi delikatajn kaj tempest-promesajn demandojn, ni rapide traesploru la gazetojn: eble ni gajnos kelkajn serenajn momentojn dum la lego de la literaturajoj, per kiuj cetere ĉiam pli avare donacas nin la Esp-a gazetaro...

Unue ni salutu la nove aperintan *Sudan Stelon* kaj ni gratulu ĝiajn redaktoron kaj eldonanton pro la plaĉa aspekto, pro la klara preso, pro la manko de preseraroj, pro la bona stilo. Estas vere, ke iom tromultas pritraktado de personaj konfliktoj, sed el tiu ĉi infan-malsano ĝi rapide saniĝos; estas vere, ke signifa parto de la gazeto estas okupita per artikoloj, sciigoj, kiuj estas nur lokinteresaj, sekve negravas por alilanda leganto, sed tio neeviteblas ĉe landa propaganda gazeto. Pligrandigo de l' amplekso certe helpus efektivigon de la programo: la konigon de la jugoslava literaturo. Kio pleje impresas la leganton, estas la freŝa, juna atmosfero, kiun la gazeto disradias per sia vicleco kaj konscia observemo. Ni trovas du poemetojn »el la japana poemarto«, nek aŭtor-nomo, nek tradukinto estas signita, kial? — Sur kovrilpaĝo de la kvina numero mi trovis iom misteran alvokon de ia »Monda Kuriero«, en ĝi la troentuziasma entrepreno asertas, ke nia literaturo ne posedas revuojn, librojn kiujn ni fiere povus montri al la »ignoranta publiko«! Karaj sinjoroj, bonvolu iom

Se vi estas kontenta, ne forgesu varbi por AELA kaj LITERATURA MONDO. Varbmaterialon ni sendas volonte.

bremsi vin! ĉu vi ne povas rekلامي sen falsigo de faktoj? — S-ro Stefanĉiĉ volas enkonduki la radikon *sme* anstataŭ *darf*, *durf*, ĝi estas kunmetita el ia slava *smeti* kaj angla *may*. Li riproĉas al *darf* malbel-sonecon, li pravas, sed ni trovas tiun ĉi abortitan vortradikon sufiĉe malbela kaj tute nenecesa, oni ja povas eviti la uzon de *darf* per la helpo de *rajt* kaj *lic*. — Atentinda frazo el la programo de la gazeto: »... ni deziras montri, ke Esperanto estas ne nur komerca afero, sed ankaŭ kulturfaktoro, kiu al siaj adeptoj devas doni almenaŭ ian rekompencen por la oferita peno.« — Okaze de la naskiĝo de Suda Stelo esplingva gazeto skribis: »En la Balkanoj konstante aperas kaj malaperas Esperanto-gazetoj.« Nu, Suda Stelo meritas, ke ĝi longe ne malaperu.

*Germana Esperantisto*: Pri la dua eldono de Kataluna Antologio Karl Minor verkis 21 linian recenzon, en kiu li tre lerte motivas la efektivan eviton de kritika pri esploro: li citas el la recenzo aperinta okaze de la unua eldono jenojn: »... Se oni volus skribi pri ĉi tiu verko detalan recenzon, oni povus plenigi per ĝi tutan numeron de G. E. tiom interesa kaj leginda estas ĝia enhavo.« Eble okaze de la tria eldono s-ro Minor havos pli multe da spaco, mi ja trovis superfluaĵojn ankaŭ en tiu ĉi numero!

Estas vere admirinda la nelacigebla laboro de niaj japanaj samideanoj per kiu ili klopodas instrui Esperanton al siaj samlandanoj. Iliaj gazetoj celas ĉefe



tion. Mi almenaŭ menciuj iliajn titolojn: *La Revuo Orienta*, *Esperanto Kiboŝa* (la bindita 1931-a jaro estas dika volumo), *Verda Mondo*, *ABC de Esperanto*.

*La Praktiko*: Ĝi estus ideala ekzercita gazeto por novaj esp-istoj, se ĝi ne pekus konsekvence kontraŭ la gramatiko. Ekzemple en la septembra numero sur la paĝo kvina mi dufoje trovis la esprimon: »Cu estas vera, ke...« Mi ne povas kredi, ke la gazeto uzas ĉi tiujn esprimojn pro pedagogia motivo, t. e. ke ĝi evitu klarigojn pri iom ne tute elementaj formoj. Instrui ion malbone por pli posta korekto: tio estus la plej absurda pedagogia principo, ja ĉiu scias, ke la unufoje ellernitaj formoj firme fiksiĝas. Kaj la gvidantoj de la Cseh-Instituto estas nedubeble tre bonaj pedagogoj... Kompreneble ankaŭ tion mi ne povas supozi, ke la redaktantoj de la gazeto ne konas la gramatikon. Eĉ preseraroj ne estas tiuj ĉi esprimoj, ĉar ili estas plurfoje uzataj. Kio do klarigas la sintenon de *La Praktiko*? Mi ne povas venki la suspekton, ke la redaktantoj ne opinias gravaj tiujn ĉi gramatikajn specialaĵojn de Esperanto (kiel ankaŭ pri *unu*, kiu denove estas uzata kiel nedefinita artikolo), kaj ili intencas enkonduki pli simplan, Csehan dialekton de la lingvo, el kiu la supre menciitaj specialaĵoj mankas. Sed tia dialekto trovas nepran kontraŭstaron de la parto de ĉiu lingvofidela esp-isto, ja ĝuste tiuj ĉi specialaĵoj donas al Esperanto apartan ĉarmon!

*L' Esperanto* publikas en daŭr-

igoj komedion de Goldoni, titolitan: *Kurioza okazaĵo*, en la traduko de Mevo.

Mi atentigas pri tre inteligenta artikolo aperinta en la aŭgusto-septembra numero de *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*. Ĝi temas pri tutkontinentaj lingvoj, pri internacia kaj komuna lingvo. La artikolo estas signita per literoj *Rs*. Se mi havus lokon, mi citus ĝin tute!

*Espero Katolika*: La bona papero, riĉa ilustrado, faras la gazeton pli plaĉa. Prezento de pli-altnivela katolika literaturo ne malutilus.

\*

Permesu, ke nun mi rakontu historieton. Mi havas tre karan konatulinon, ĉarman maljunan anglinon, kun la kutimaj argentaj haroj kaj freŝe ruĝaj vangoj, kiu vivtenas sin per instruado de angla lingvo. Okaze de renkontiĝoj mi kutimis ĉantaĝi de ŝi kelkajn klarigojn pri tekstoj de anglaj poemoj por mi tre komplikaj (kiel nekuracebla versleganto mi legas poemojn ankaŭ en lingvoj, kiujn mi ne lernis). Nu, ĝis certa limo iras bone la afero, sed se ni venas al iom pli malfacila poezia metaforo de moderna poeto, al iom pli aparta individua lingvaĵo, kiu jam superas ŝian intelektan medion, ŝi konfuziĝas, ŝi senpacientiĝas kaj subite ŝi finas la aferon (kaj ĉian pluan klarigadon por tiu fojo) per la neapelaciebla deklaro: It is a poem. (Ĝi estas poemaĵo.) — En »*The British Esperantist*« mi legis jenan recenzon: »Romaj Elegioj.« . . . . . Sed malgraŭ (aŭ pro) multaj



neologismoj la libro plejparte ŝajnas tiel nekomprenebla, kiel enhave senvalora. « It is a poem! — En la sama numero mi legis recenzon pri Eterna Bukedo. Mi ne volas diskuti nun pri la teoria sinteno de la recenzinto, mi nur mencias, ke el hazardo nekorektita preseraro li konkludas teori-ajojn, mi citas la verslinion, ĉar laŭ mia opinio la preserareco estas tro evidenta: »Restos multa plezur, vivlonge je al vi, Catullus, » — je staras anstataŭ ja, la recenzinto opiniis, ke Kalocsay uzis ĝin memstare, kiel neprepozicion. Ĉe la fino de la artikolo la recenzinto parolas pri la elekto de la poemoj kaj laŭdante parton de la elektitaj versoj, pri la alia parto li diras jenon: »Some are too trivial to be worth inclusion; others are so obscure or involved as to be difficult of comprehension, if not meaningless.« (Kelkaj estas tro trivialaj (?) por meriti tradukon, aliaj estas tiel obskuraj aŭ komplikaj kiel malfacile kompreneblaj, se ne sencencaj.) Koncerne la meriton de ĉi tiu juĝo ĉiu konanto de la libro nur ridetos, sed rigardante el tiu vidpunkto, ke la recenzo aperis en grava gazeto, mi demandas s-ron la recenzinton, bonvolu nomi por ni, espistaj verslegantoj, la riproĉitajn »trivialajn, obskurajn, nekompreneblajn« poemojn, ĉar tiajn ni ne trovis en Eterna Bukedo. Kaj alian demandon mi havas al la estimataj redaktantoj de la gazeto: ĉu en Britlando ne troviĝas poeziema esp-ista junulo, kiu kapablus recenzi poemplibrojn, aŭ iu ajn, kiu almenaŭ ne fanfa-

ronas pri tio, ke li ne komprenas poezion?... Ĉu pri grava verko recenzi nacilingve ne estas malĝentilaĵo al la Esp-a publiko?

En *Flandra Esperantisto* mi legis impresan poemon de Pol de Mont. Titolo: La Kondoro. Tradukinto: Jan van Schoor.

En *Belga Esperantisto* s-ro L. Cogen tradukis belan soneton de Musset (Tristesse) sen rimoj! Sapienti sat!

En *Aŭstria Esperantisto* mi trovis stile kaj enhave tre malfortan artikoleon pri *Goethe en Esperantujo*. Verkinto: Alexander Taussig.

*Pola Esperantisto*: Malpli da literaturaĵoj ol kutime. Vigla kongresa raporto verkita de s-ro Krysta.

En *Esperanto* (UEA) mi legis Schwartz-poemon pri sprita karakterizo de diversaj stomak-statoj.

En *Heroldo de Esperanto* mi trovis recenzon pri la Parnasa Gvidlibro. Mi havas similan demandon, kian mi faris al The British Esperantist: ĉu nur tiom da kompren-kapablo troveblas en Köln por la Esp-a poezio? La riproĉon pri »krom« mi ne komprenas. Ĝia esenca signifo estas apartigo. De la tuto ĝi apartigas ion, sed tiu ĉi apartigo povas okazi kaj en pozitiva, kaj en negativa direkto. Se de »nenio« ĝi apartigas »ion«, tiam ĝi jesas, se de »ĉio« ĝi apartigas ion, tiam ĝi neas.

*Oomoto Internacia*. Apud polemikoj pri okazintaĵoj en Ĉinio legeblas misteraj raportoj pri: Oomoto-mirakloj kaj ĉefe tre lertaj alvokoj por mona subteno (kaŝitaj eĉ en kondolencoj). Kon-



stanta interrilatigo kun spiritoj videble ne malutilas al financa talento.

*La Progreso*: Inteligenta propagand-gazeto, kiu donas lokon ankaŭ al literaturaj artikoloj. En la septembra-oktobra numero mi trovis du legindajn noveletojn: Janko Jesensky: Lizo, el la slovaka tradukita de P. Rosa, Jarmila Haškova: Jen la Homo!, el la ĉeĥa tradukita de Fr. Kruták. Ankaŭ la sincervoĉaj kongresaj impresoj de A. Tarantiková interesas la leganton. La lingvo de l' gazeto estas plaĉa.

En *Oomoto* s-ro Jozefo Major, ekseŭropano, nomas la eŭropan poezion »malsane erotika«. Nu, pri la rajto kaj morala valoro de erotika poezio mi ne volas nun diskuti, kvankam objektiva leganto ja devus rekonii, ke la du Goethe-poemoj (la artikolo de s-ro Major temis pri la Romaj Elegioj kaj La Taglibro, aperintaj en la traduko de Kalocsay) ne havas malmoralan tendencon: mi simple ne kredas, ke la erotiko estus specialaĵo de l' okcidenta poezio. Mi atentigas nur pri Gendsi Monogatari de l' japana poetino Murasaki Shikibu, pri tiu ĉi ĉefverko de japana poezio, kiun — laŭ libro temanta pri japana literaturo — pro erotikaj partoj la japanaj pedagogoj ne donas en la manon de la lernanta junularo. — Ĉu la gvidantaro de l' Oomoto-movado vere kredas, ke per atakema tono ilia gazeto povas simpatiigi la japanan aferon al la eŭropa publiko?

En oktobro aperis la unua numero de *Frateco*. La dupaĝa folio sin nomas »monata gazeto por

frateca vivo«. Religia enhavo propagandanta la ideojn de »Blanka Frataro«. La stilo: infane naiva. Sed ni trovis kelkajn perlojn inter la tradukitaj saĝaĵoj de Lao Tze; ni vidu du: »Kiam vi naskiĝis, vi ploris, kaj ĉirkaŭ vi ĉiuj ĝojis. Vivu tiel, ke kiam vi mortos, ĉiuj ĉirkaŭ vi ploru kaj vi ĝoju!« »Ĉiu vero eldirita per vortoj estas forto, kies ago estas senlima.«

*Laborista Esperantisto*: Ĝi publikas en nederlanda lingvo poe-tikan artikolserion por komencantaj legantoj de Esp-a poezio.

*Esperantobladet* raportas pri la norvega esp-ista vivo. En ĝi troveblas ankaŭ kelkaj antaŭdiluviaj humorajoj.

En *Internacia Pedagogia Revuo* mi trovis legindan artikolon verkitan de D-ro Kurt Riedel pri la gravaj verkoj de Wüster. Sed pri la problemo de Esp-a frazeologio mi ne povas konsenti kun la artikolinto.

*La Lumo Orienta* estas kvaronjara organo de Japana Budhana Ligo Esperantista. Religiaj tekstoj. Ĝi aperigas en daŭrigoj budhisman terminaron.

*Hispana Esperanto Gazeto* publikis baladon de Angel Ganivet, titolitan: La vundita ĉasisto. La poemo estas tre ĉarma kaj ia traduko de Vincent Inglada tre bona. Tamen mi ne opinias tre sukcesa la solvon de la dua strofo. Eble la eminenta tradukinto surprizos nin per pli bona varianto?

*Svenska Arbetar Esperantisten*: Bonstilaj recenzoj, multaj fotoj.

*Internacia Medicina Revuo*. Bonnivela fakgazeto.



*La socialisto:* Klara preso, moderne flua lingvo.

*La Interligilo de U. P. T. T.* Faka gazeto por poŝtistoj.

*Svenska Esperanto Tidningen:* Riĉa decembra numero. El la literaturaj kontribuintoj mi nomu T. Czitrom, St. Engholm, F. Szilágyi.

*La Suda Kruco* aperas en nova, pli granda formato. Plaĉa aspekto, varia enhavo. S-ano Robo en recenzo citas frazon el la recenzita libro kaj subinspiras sencon, kium la frazo tute ne havis... Ĉu simpla eraro aŭ intenca mistifiko?

Post kvaronjaro ni daŭrigos la revuon, *Ludoviko Totsche.*

## N I A P O Ŝ T O

**La dua numero de la Bibliografia Gazeto estos elsendata kune kun la dua libro de AELA kaj maja numero de Literatura Mondo.**

*Al multaj gratulintoj.* Ni tre dankas viajn favorojn, montritajn al ni. Viaj esprimoj nin instigas al plua senĉesa laborado por la pliriĉigo de nia literaturo.

*S-ro C. H. en Maryland.* Vi demandis la membronombron laŭ landoj. Nu plej multaj estas en Nederlando, poste sekvas laŭvice Japanujo, Britujo, Francujo, Svedlando, Italujo, Germanujo, Estonujo, Hungarujo kaj poste aliaj malgrandaj landoj.

*S-ro Th. Hansen, Norresundby.* Bonvolu atenti, ke la libroj, anoncitaj inter la elekteblaj libroj aparte kaj la Historio de LI, ne estas niaj propraj eldonaĵoj, do kompreneble ni ne povas respondeci pri ilia aspekto. Pri aliaj

libroj ankaŭ laŭaspekte vi estos certe kontenta.

*Elektintoj de verkoj de Varankin kaj Puŝkin* bonvolu atenti, ke el la unua ni havas nur broŝuritaĵajn kaj el la dua nur binditajn ekzemplerojn. Por la unuaj, kiuj mendis binditan, ni do bonskribos la prezon de bindo, dume al la duaj ni donacas binditan libron, por ke ni plene kontentigu ĉiujn niajn membrojn.

*La membroj, ne elektintaj* ankoraŭ la trian libron, bonvolu nepre fari tion en la proksimaj semajnoj, por ke ni povu tiun liveri!

*S-rino Magnus, Orléans.* La libroj laŭ plano aperos en ĉiu dua monato para. Tamen ni ne povas garantiĝi ion okaze de malfruo, pro tio ni petas vin, bonvolu afable atendi pacience, se ni eventuale malfruus iom ankaŭ ĉe la proksimaj libroj. Ili certe aperos, tion povas garantiĝi al vi la nomo de Literatura Mondo.

*S-ro S. J. Lwow.* Ni almetas al la nuna nro de la Bibliografia Gazeto novan ekzempleron de AELA-prospekto, por ke vi povu facile varbi. En ĝi vi trovos ankaŭ la manieron, kiel plej facile pagi al AELA. Bonvolu bone atenti la ŝanĝiĝintajn kotizojn post 1-a de februaro!

*S-ano Hamaker, Utrecht.* Via demando pri la farto de nia organizado donas al ni la okazon por diri, ke ni superis niajn esperojn per 30%! Tio estu instigo por plua fervora agado.



# BIBLIOGRAFIA GAZETO

Redakcio kaj administracio  
Hungarujo, Budapest, IX.,  
Mester ucca 53, v. 7. —  
Telefonnumero: 380-84

REDAKTAS:  
K. KALOCSAY

Senpaga por abonantoj al  
Literatura Mondo kaj anoj  
de AELA. — Aparta abono  
1.80 svisaj frankoj por jaro

## *Galaj konsiloj al juna ekrecenzisto*

Kara kolego,

intencante eldoni kaj redakti novan esp-an gazeton sub titolo »Verda Purigilo«, kiu titolo jam per si mem perfidas, kiom vi rekonis la gravecon de l' kritiko, vi turnis vin al mi por konsiloj. Mi rapidas sciigi vin pri mia konsildonemo. Jen:

Via unua kaj fundamenta ĉefprincipo estu: *la faktoj neniam kaj neniel ĝenu vin*. En la konsienca sekvado de ĉi tiu regulo kaŝigas la sekreto de sukcesoj en nia »dura« metio. Por plifaciligi vian taskon, mi ilustras ĝin per kelkaj ekzemploj. Ja estas pli lume ol la suno, ke per atakoj vi plej facile altiros la atenton de la legantoj. Sed kion fari — vi demandos — se en la recenzata libro vi ne trovos vundeblajn kalkanojn? Nu, ne estu tiel anĝele naiva: ataku tiajn ideojn, asertojn, kiajn la libro tute ne havas, nur ŝajnigu, ke ili estas proprajoj de l' aŭtoro. La afero estas tre simpla: ekzemple la aŭtoro estis tiel aŭdaca... hop! pardonu, mi forgesis pri la buŝkorbo, pli ĝuste plumkorbo, per kiu ĉiu bone edukita neologismemulo estas nuntempe ekipita, do ni uzu kuraĝega — do se la aŭtoro estis tiel kuraĝega, ke li tuŝis al unu el la vesponestoj de nia verda ĝangalo, ekzemple al la problemo de l' elparolo kaj li asertis, ke li trovas sufiĉe plaĉa kaj multe uzata la longan kaj malfermitan prononcon de tiuj vokaloj, kiuj estas akcentitaj kaj kiujn sekvas ununura konsonanto, tiam kriiu, ke laŭ la aŭtoro »vitron« oni elparolas »viitro«. Ĉiu leganto scias, ke tia elparolo estas malĝusta, do vi kredigis, ke la aŭtoro estas azeno, krome por vi mem vi malmultekoste akiris la famon de saĝulo.

Entute neniam forlasu la okazon akcenti vian prudenton kaj la multajn kulturojn, kiuj profunde influis vin. Nepre raportu pri la spertoj, kiujn vi akiris proprapersono, ekzemple en la necesejoj de kvin kontinentoj... Sed tuj grumblu pri »snobismo«, se la aŭtoro



aludis ion konatan al la plejmulto de eŭropanoj, en tia kazo via protesto sonu en la nomo de l' orientanoj (kompreneble tute ne gravas, ke la orientanoj komisiu vin per la reprezentado de siaj intereso, iom post iom vi kutimigos ilin, ke ili rigardu vin sia advokato).

Se temas pri libro de nova aŭtoro, ne forrestu kelkaj patrecaj ŝultrofrapadoj. En recenzo pri tia libro ne forgesu almenaŭ dekdufoje menciŭ la junecon de l' aŭtoro. Ne gravas, ke li eble jam portas belan, longan, arĝentan barbon, la leganto ja ne distingos inter »noveco« kaj »juneco«. Juneco ja asociigas »verdbekecon«, do en la okuloj de la leganto la pezo de l' aŭtoro malpliigas, sekve la via pliigas, ĉar kiom vi prenas de la verkisto, tiom vi gajnas, laŭ leĝo de la recenz-fiziko...

Vian foton aperigu laŭeble en ĉiu numero de l' gazeto, ne malutilas eĉ po 2—3 fotoj en ĉiu numero. La fotoj prezentu vin en la plej diversaj pozicioj, unu el ili nepre eternigu la momenton, kiam vi verkas viajn recenzojn en via ĉambro ornamita per orienta lukso. Por tia foto necesas monaĥe transspiritiginta vizaĝo, kiu je la unua vido atestas vian profundan mediton, tamen ne manku energiaj trajtoj, por certigi la rigardanton pri la severo kaj senindulgo de via kritiko.

Urĝe aliĝu al la vetĉasado kontraŭ neologismoj kaj neologismemuloj. Tio estas nun modo kaj tre profitdona. Sur tiu ĉi vojo vi akiros plej rapide la titolon de »senriproĉa kavaliro de pure zamenhofa lingvo«, aŭ tiun de »Purigisto«. Ĉar la esp-an literaturon ŝajnigu ia grandioza malpurejo, kiu atendis nur vin kaj viajn purigilojn... Ke vi mem uzas neologismojn, ne gravas, nur atentu, ke en viaj artikoloj kontraŭneologismaj neniam uzu argumentojn! (Ilin oni ja povus refuti!) Viaj frazoj estu rekte simplaj kaj firme deklaraj, kaj la leganto kredos vin! Sed se la neologismemuloj argumentos, ilin simple prisentu kaj daŭrigu papage viajn asertajn frazojn, kredu min, ke la oreloj de la legantoj plifacile kutimigos al ili, ol ilia menso al cerbumado pri la argumentoj de viaj kontraŭuloj!

Nu, mi pensas, ke sufiĉas por ĉi tiu fojo. Kredu min, ke miaj konsiloj ne estas teoriaĵoj de ĉambro, ili prezentas esencon zorge filtritan el la praktiko de nia kritika literaturo. Kompreneble se vi jam bone enekzercis vin en ĉi tiujn regulojn, mi povas servi vin ankoraŭ per kelkaj interesaj kaj spritaj subvariantoj, per kiuj surprizis nin niaj kritikistoj — tiom diferencaj je temperamento kaj individuaj inklinoj. Kaj se vi volas mem iĝi verkisto, do recenzoto, ankaŭ por tiu kazo ne forrestos miaj konsiloj.

Kolege via *Ludoviko Tranĉe*



## Revuo de Revuoj

*Ligito* de la esperantistoj en Bydgoszcz: Vigla, bonhumora loka gazetato.

En *L' Esperanto* aperis la kvina kaj sesa kantoj de la Infero de Dante tradukita de Kalocsay.

Nova porjunulara gazeto aperis sub titolo: *Juna Esperantisto*. Ĝia enhavo konsistas preskaŭ ekskluzive el oficialaĵoj, raportoj k. t. p.

En *Kataluna Esperantisto* mi legis detalan raporton pri la XIV-aj Floraj Ludoj.

En *Suda Stelo* mi legis: »Tio estas nekontestebla kaj tute komprenebla fakto por ĉiu tiu, kiu...« Ĉu ne bele?

*Lingvo* estas la titolo de la nove aperinta monata propagandfolieto de la meksikia Esperanto-movado. Ĝi aspektas tre primitive.

*Scienca Gazeto*: popularsciencia dumonata revueto.

En *The British Esperantist* aperis de s-ro Butler valora recenzo pri la Parnasa Gvidlibro. Multajn liajn asertojn mi trovas eraraj, aliajn pripensindaj, sed estas evidente ke lia objektiva tono efikas agrable post lego de samtemaj pamfletaĵoj.

*Hungara Heroldo*: El literatura vidpunkto nenio interesa. En ĝi mi legis: »Kaj vere, estus konsilinde, se la redaktejo de Literatura Mondo pli zorgeme sin tenus ĉe la enkonduko de neologismoj.« La konsilon mi transdonis al la loĝejo de la redakcio.

La literatura rubriko de *Esperanto* (UEA) plivigliĝas. En la decembra numero mi trovis miniaturan ĉefverkon de Mih. Soŝtenko: La lerta polica hundo (trad. Minuška Mantel). Ĝi estas bubhumore petola miksaĵo el ironio kaj sprito. — Edmond Privat esperantigis legindan legendon hindan sub titolo: Amo de Virino. — Stranga, sed ne enua groteskaĵo estas la artikolo de Carl Georg von Maassen: Manĝkunulo Morto. El ĝi jen cito de verso de Richard Roos, dresdena poeto (la nomon de l' tradukinto mi vane serĉis):

### Manĝemula Epitafo.

Li celis, ke nur multe  
Li manĝu kaj bonguste,  
Nun li mem ĉe la celo  
De l' granda viv-vojaĝo  
Estas manĝaĵo verma.

Novan rubrikon mi trovas sub titolo: Tra la gazetaro. Ĝi observas precipe el la vidpunkto de l' organiza demando. La rubriko (kaj, ĉar ĝi ne estas subskribita, ĉu ankaŭ la redakcio?) alprenis sintenon malamikan al la neologismoj. Tiu ĉi sinteno ĉe la elekto de la citaĵoj naskas kelkajn teknikajn ŝongladojn, sed ĉu estas mirinde dum la nuntempa modo? Kvankam ĉe tia serioza revuo... — La angla humoraĵo: »Stokholmo bombardata de eskimoj.« (trad. Tib. Morariu) estas amuza satiro pri nuntempa internacia politiko. — Sub titolo: »Dormo anstataŭ sinmortigo« mi legis interesan artikolon el la temaro de l' psikanalizo. — La Stroele-recenzo pri la Parnasa Gvidlibro pruvas, ke ankaŭ kontraŭneologismo kapablas uzi objektivan tonon, se li estas konsciencia homo kaj ne pamfletisto.

*La Esperantisto*: Fine japana gazeto, kiu estas tute esp-lingve eldonata. Papero, preso bonaj, preseraroj apenaŭ. La enhavo laŭteme kaj laŭnivele



tre diversvalora. — Interesa, kvankam iom troskizeca kaj nesufiĉe profundira estas la artikolo de F. Kišimoto: Novaj fazoj en japana literaturo. — S-roj T. Sasaki kaj J. Iŭaŝita, de Studejo de Zamenhofa Gramatiko, verkas artikolserion tre seriozan pri: De post, Depost aŭ Ekde. — Japanajn naturbelecojn kaj historiaĵojn konigas la artikolo: La enlanda maro en poezio kaj tradicio.

Kaj fine ni raportu pri grava kaj en nia gazetaro unika nova revuo, pri la *Politika Sociala Revuo*. Ĝi intencas publikigi studojn pri problemoj de l' socia vivo, ampleksantaj la historion, geografion, ekonomion, politikon, religian kaj moran kritikon. Por garantiu la kvaliton de l' materialo ĝi aperigas nur tradukojn de artikoloj aperintaj en bonaj nacilingvaj revuoj. Pri la elekto kaj lingvo de l' tradukoj garantias la nomaro de la gvidkomitato: Bernard Lavergne, profesoro ĉe la universitato de Lille, Fritz Kern, profesoro ĉe la universitato de Bonn, W. E. Collinson, profesoro ĉe la universitato de Liverpool, Louis Bastien generalo intendanto, Gaston Waringhien, profesoro ĉe la liceo de Lille. — La unua numero alportas nekrologon de Ch. Rist pri Charles Gide, kaj Gide-artikolon titolitan: La respublikoj de la jezuitoj en Paragvajo. Ĝi estas konciza, kernpalpa raporto pri tiu ĉi tre interesa eksperimento, pritraktita el la vidpunkto de l' politika, ekonomia, socia vivo, kaj neniam en la seka lingvo de fakulo, kelkfoje la lingvo de Gide estas poete vizia. — Ankaŭ la artikolo de D-ro P. Jakob pri la »Efikoj de la ekonomia krizo sur la spirita vivo en Germanujo.« estas interesa kaj pro sia aktualeco certe vaste legota. — Eta ĉefverko estas la artikolo de A. Siegfried: »La franca karaktero vidalvide al la moderna mondo.« Neniam mi legis tiel spritan kaj esencontrafantan studon pri ĉi tiu temo. Ĉiu scias, kiel gravan rolon ludas la franca politiko en la nuntempa Eŭropo, sed tiu ĉi politiko estas bazita sur la karaktero de l' popolo. La lego de la Siegfried-artikolo multe helpas la orientiĝon en la nuna haoso. Por ioma gustumo servu jena cito: »La plej franca el ĉiuj proverboj estas sendube tiu ĉi: »Mia glaso ne estas granda, sed el mia glaso mi trinkas.« Fine ni trovas recenzan parton pri kies kvalito certigas la nomo de l' recenzanto: Waringhien. — La unua numero prezentas bonegan komencon, sed estonte la redakcio devus pli zorge eviti preserarojn, kiuj iom troabundas. — La Politika Sociala Revuo meritas plenan atenton de la parto de l' esp-ista intelektularo, por kiu ĝi signifas denovan tergajnon en nia movado. *Ludoviko Totsche.*

## R e c e n z o

HUNGARA ANTOLOGIO. La unua libro de AELA. Redaktis: K. Kalocsay. Kunlaboris: J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche. Enkondukon verkis Miĥaelo Babits. Poemoj kaj noveloj de 50 hungaraj verkistoj. Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, Budapeŝt, IX, Mester-u. 53. Formato 15×23 cm. 472 tekstopaĝoj kaj 24 klišopaĝoj kun la fotoj de 47 verkistoj. Senligna papero, multkolora kovrilo. Prezo: sv. fr. 12.— broŝ.; sv. fr. 14.— bind., 10% por sendkostoj. Por anoj de AELA la unua libro el la ses, kiun ili ricevas por sia kotizo de 13.50 respektive 17.— frankoj svisaj.

Evento rapide sekvas eventon en nia epoko de l' kulturo de Esperanto.



Venas verko post verko de Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj Engholm. Pasis nemultaj jaroj de post la aperigo de l' kompleta Biblio en Esperanto. Gravega aldono estis la verko historia, *Jarmiloj Pasis*. Notinda en lasta jaro estis la apero de l' unua kritika verko en Esperanto pri ĝiaj elstarantaj literatoj. Kaj la jena granda volumo estas ankoraŭ evento, kiu prezentas gravan novan etapon en la kresko de l' kulturo de Esperanto al faktoro tutmonde grava.

Mi estas invitita sufiĉe subjektive skribi miajn impresojn pri la verko, sed la inviton mi nur parte akceptas, ĉar ankaŭ el sufiĉe supertera vidpunkto mi volas paroli. Unue, tamen mi parolu pri la verko el vidpunkto de iu, kiu neformale sed sufiĉe funde estas trempita en tiu okcidenta literatura kulturo, de kiu la jena verko ŝajnas esti sintezo. Efektive, ĝuste tial mi estas ravita de la volumo, ke, preterlasinte dum kelka tempo la belliteraturon kiel eron de la ĉiutaga vivo, mi retrovas en la unua libro de AELA sintezon de tuta mia legado el literaturoj de pluraj landoj en lingvoj angla, franca kaj internacia, per kio mi konatiĝis kun la menso de la Predikanto, de Petronius, de Montaigne, de Rousseau, kaj de aliaj superaj mensoj ĝis la epoko de André Gide kaj Thomas Mann.

En la lasta tempo, dediĉante min al kunesto kun ĝeamikaro, al politika laboro en la Esperanto-movado, aŭ al iom da laboro por la socialisma skolo, trovante feliĉon en tiaj okupoj, mi plurfoje demandis min ĝenerale pri la belliteraturo: »Al kiu ĝi estas helpo, por kio ĝi havas valoron?« Se mi konfesas, ke tiel mi dubis pri la valoro de l' belliteraturo, kaj se mi konfesas, ke por mi tiu ĉi antologio de hungara literaturo estas plena respondo, mi laŭ mia eblo plej forte esprimas mian laŭdon pri ĝi. Ŝajnas, ke funde mi konsentas kun la eldiro de Totsche en la lasta numero de Bibliografia Gazeto, kvankam mi eble flankajn punktojn volus disputi ankoraŭ: »(Oni) konfesu la *esencon* sendependon de l' Arto de historiaj, geografiaj, rasaj kaj klasaj faktoroj, oni rekonu, ke provizore povas ĝin makuli influoj, tendencoj, sed li vidu klare, ke ili restas nur surfacaj, ke la sentempan, internan substancon ili ne povas infekti: oni konfesu, ke la Arto supervivos krizojn, kataklismojn, dum sola homo vivos sur la Tero.« Jes, tiel mi sentas, kiom ajn mi kredas al la nuna Triunuo, Darwin, Marx kaj Freud, kiom ajn mia intelekto kontraŭargumentas mian senton. Kaj se, post nia aserto, ke la arto ebligas al ni vivi pli larĝe kaj pli intense, kaj plilarĝigi kaj pliintensigi la vivon de niaj ĝeamikoj, se post tia aserto nia oni demandas al ni kial, por kio entute ni vivas, ni povas trankvile respondi, ke ni ne scias.

Forpasi post ĉi papilia vivo,  
Foriri, nesciante: kien nun?  
Kaj neniĝi eble poreterne,  
Ne vidi plu la brilon de la sun'!

Ho, hom' pasema, reĝ' aŭ almozulo  
La kapon levu, tenu, alten ĝin,  
Heroo estas, kiu porti povas  
La penson de la morto en la sin'!

Tiel iu János Vajda, mortinta hungaro vivonta en traduko de Kalocsay. Tiel skribinte, mi ririgardas la libron kaj mian notaron sur ĝiaj paĝoj, kaj mi trovas multe da eta kritiko, kelkloke mi havis la impreson ke ŝajne mia amikaro de Budapeŝto montris tro unuflankan vidpunkton en sia elekto, nesufiĉe atentis priskribojn pri milito kaj malriĉo, troe dediĉis atenton al erota literaturo, ekzemple. Sed post la plena ellego klare montriĝas, ke ne tiel estas. Certe ŝajnas, ke kelkaj prozaj pecoj, ekzemple de Mór Jókai, aŭ de Géza Gárdonyi, estas iom banalaj; kaj mi volus demandi, ĉu la



hungara literaturo ne donas al ni satiron krudan, en speco de Voltaire, aŭ eseiston en speco de Montaigne aŭ Hazlitt? Generale, tamen, mi trovas en la volumo, laŭ eblo de ĝia amplekso, sintezon tre multflankan laŭ temaro, laŭ orientiĝo al la vivo en ĉiuj ĝiaj facetoj, laŭ verkmanieroj: literaturan sintezon de ĉiuj miaj beletraj legadoj de post puberta aĝo faritan de veraj literatoj sub la gvido de K. Kalocsay.

Jen, la subjektiva recenzo, ke tion kaj tiel trovas mi, kiu jam de l' apero de verkoj hungaraj en la serio de Mosse, en majstra traduko de Bodó, konstatis, ke la hungara literaturo moderna estas same matura, same delikata, kiel la moderna angla aŭ franca literaturo, mi, kiu jam frue en sia legado en Esperanto trovis tiun universalan kaj grandiozan verkon de la hungara literaturo, *La Tragedion de l' Homo*. Kaj antaŭ ol kritiki el iom pli vasta vidpunkto ol la mia ĉi tiun antologion, mi permesu al mi noti kelke da eroj speciale plaĉaj al mi persone.

La komencan paĝaron mi rapide turnas, por mi la popolaj baladoj ne estas interesaj; sed mi ne preterlasu gratuli, ke la verko montras lertan kombinon de historia kaj aktuala intereso — kaj ke la vorton «aktuala» mi ne uzas en surfaca, nurdistra senco, tion mi poste montros. Baldaŭ mi trovas poemon de Mihály Vörösmarty, *Pensoj en Biblioteko*, majstra filozofia versaro. Poste mi trovas la mondfaman nomon de Sándor Petőfi: el la multaj poemoj plej plaĉas al mi *Ja neniam amis kiu diras, Ho Teda Pens'*, *Valo kaj Monto* kaj *Kial kantas Vi, Poetoj Bonaj?* De Géza Szilágyi, frua reprezentanto de l' dekadencan franca liriko, venas interesa peco, *Dorsoj*. Por Endre Ady mi ne trovas en mi la entuziasmon kiun laŭ ĝenerala juĝo li meritas, sed *Batalo kun la Grandsinjoro* interesas. La nomo Mihály Babits elvokas karajn memorojn, jen oni trovas represita *La Danaidinoj*. Ankaŭ notindaj por mi estas *Strato Antaŭtagmeze* kaj *Strato Vesperiĝe*, sed speciale mi estas ravita de *Delonge Forsonoris Temp' de Sappho*: se la lirika poezio bezonas defendon en la mondo de 1933 — kaj mi kore kunsentas iun, kiu sentas ke tion ĝi bezonas — jen estas la plejble inda respondo. *La Rideto* de Ernő Szép estas rimarkinda. Kaj jam multfoje en la lastaj tagoj kun eta ekstazo mi legis al amikoj la poemeton de Oszkár Gellért, *La Nokto de Libertempa Soldato*. Estinte metiisto jam de aĝo dek-kvar, kiu ankoraŭ per fingre kaj dungate laboras, mi aprezas la poemon *Metiistoj* de Lajos Kassák.

Nun mi jam venas al la proza parto, kaj devas ekkoncizi. Plaĉas en sia speco preskaŭ ĉiuj noveloj, nur kelkaj banalas. *Ce la Arbara Rando* amuze prezentas vidpunkton Gide-ecan pri la temo sinmortiĝo. *Rakonto pri la Fratinoj Tündérlaki* estas akra kritiko pri seksmoralo. Pri la *Mitologio* de Mihály Babits, en traduko de Totsche, mi malfacile bridas la entuziasmon, ĝi faras ian gigantecan efikon kiu iel memorigas min pri James Joyce. La tria kaj kvina ĉapitroj speciale impresas min. Novelo de Zsigmond Móricz prezentas en ŝatinda realeco kiel nature povas la militinto malriĉa murdi ankaŭ en civila vivo. Bodó en sia traduko de novelo de Dezső Szomory montras denove genian talenton en la traduka arto. Tamen mi devas jam fini la komentojn, ĉar, kvankam mi studis la volumon de kovrilo al kovrilo, mi ankoraŭ ne plene elminis la tutan gemaron literaturan kaj lingvan. La kunlaborantoj por tiu ĉi antologio pruvis sian veran fervoron por la hungara literaturo, dedikante sin al tia traduka laboro, kiu estas tiom pli malfacila, kaj bedaŭrinde ofte malpli alte taksata en nia kulturo, ol la originala verkado: ili aldonis al la kulturo



de Esperanto riĉaĵojn, por kiu la legantoj nepre devas senti sin apenaŭ kapablaj sufiĉe danki. Ni, legantoj, relative estas malmultaj — la literatoj de Esperanto nur estonte trovos popolon nombre laŭ sia merito — sed ni devas laŭeble subteni per aprezo kaj aĉeto. Samtempe ni rajtas memori, ke kiu aprezas kaj aĉetas, tiu ankaŭ siamaniere kreas kaj laboras.

K. R. C. Sturmer.

UNIVERSALA ESPERANTO METODO DE BENSON. Kia kurioza verko! Ĝi tre interesas min el psikologia kaj ideologia vidpunkto. El la bildaj difinoj, lertaj kaj kelkfoje amuzaj, la aŭtoro kvazaŭ vive aperas antaŭ la okuloj. Li evidente estas rezulto de severa puritana eduko etburĝa de l' lasta jarcento, sur kiu estas konstruita surfaca »liberpensemo«, racionalismo de malaktuala speco. Spite tion, ke li evidente konas almenaŭ la nomojn de Freud, Eddington kaj Trocki, li tamen mense vivas en epoko antaŭa, kaj iliaj influoj ne penetris sub lian haŭton.

La verkego, kiu estas malaktuala ankaŭ laŭ aspekto de sia presliteraro, plaĉos al certa tipo de menso tre disvastigita en la »neŭtrala« movado, al menso kiu konstante taksas Esperanton kiel ludilon en si mem, menso kiu estas trovebla ĉe la plejmulto el tiuj etburĝaj konstantaj lernantoj, kiuj daŭre subtenas per kotizoj kaj ĉeesto la asociojn kaj kursojn de la »neŭtrala« movado. La volumo havos por tiaj tipoj tiun sorĉan intereson, kiun iu enciklopedio Pears havis por mi kiam mi estis knabo. Sed kiom multe da homa energio estas por ĝi malŝparita!

Tamen mi honeste konfesu ke multaj el ĝiaj bildaj difinoj tre amuzis min, kaj ke mi lernis multajn vortojn por mi novajn, ekzemple *prognozo*, *inveno*, *esbonito*, *kelbo*, kaj *pastinako*.

Lasta punkto interesa: per siaj difinoj de l' vortoj *evident*, *kondut*, *ekzempl*, *pun* kaj *bat*, kaj per bildoj de paĝoj 49, 53, 61 kaj aliaj, la aŭtoro montris kiom multe li estas viktimo de certa mensa tordetiĝo kiu (espereble) forpasis en la nuna generacio por ĉiam. Al homo edukita en postmilita angla aŭ usona vivo tia tordetiĝo devas ŝajni sufiĉe fremda.

K. R. C. S.

DOMO DE HOMAMO. Eldono de Oomoto Internacia, 1, rue Félix Faure, Paris 15e, Francujo. 14. paĝa multobligita kajero. Prezo ne mont-rita.

La subtitolo diras, ke ĝi estas »la plej grandioza entrepreno en Esperantujo«. La ideo vere estas bela. La Universala Homama Asocio fondita de la japana religi-filozofia movado Oomoto, »celas interfratiĝon de ĉiuj homoj sur la tero« kaj »krei bazojn de la Homaranismo«. Tia bazo estu la Domo de Homamo, kiu pruvu, ke »la unuigo de la homaro estas ebla.« Ĝi estu sidejo de la »Ligo de Homoj«, oficiala lingvo estu Esperanto. Oni bezonas 25 milionojn da francaj frankoj, laŭ statistiko de la kajero ĝis nun pagis 312 personoj sume: 13,315.— frankojn. Ĉapitroj priskribas la aranĝon de la domo kaj planon pri konstruo. Kelkaj eraroj eble ne gravas en tia kajereto.

P. B.

BES-A ADRESARO DE ESPERANTISTOJEL CIUJ LANDOJ. 10-a eldono. 1932. prezo 1.— fsv. Eldono de BES, Potštejn, ĈSR. La 116 paĝa poŝformata libreto kun 1107 adresoj el ĉiuj kontinentoj povas esti grava praktika helpilo al la korespondema kaj intersanĝanta esperantistaro — kondiĉe, ke la personoj vere respondas. La fotetoj de pli, ol cent per-



sonoj ebligas tuj antaŭe vidi, kun kiu oni ekkorespondos. La jubilea eldono pravas, ke ĝi estas ŝatata kaj rekomendebla al interesigantoj. *P. B.*

ESPERANTLINGVA NOVELBIBLIOTEKO. Eldonejo: N. Szapiro, Warszawa. 20×13.5 cm. ĉiu numero 0.40 sv. fr. N-o. 4.

*L. Biró*: Fraŭlino Ida. *K. Porzolt*: La vojo malsupren. El la hungara: L. Rereips. 26 paĝoj.

La unua estas senpretende, sed ne sensatire rakontita historio, cetere sufiĉe banala. Ĝia esp-igo ne estas tre motivita. La dua atestas pri kruele akra observkapablo, pri preciza kono de homaj malfortajtoj, pri facila, sed surfacema ekkapto de serioza problemo, pri tem-ellaboro malperfekta, pretere rapida. Entute ĝi estas ne seninteresa varianta de populara temo: la efiko de l' mizero je junaj geedzoj. Iom mirigas, ke en la serio la tiel riĉan hungaran novelliteraturon reprezentas ĝuste tiuj ĉi noveloj. La tradukinto konfidente solvis sian nemalfacilan taskon.

N-o 5. *Hermano Bang*: La hontemulo. La unua kiso. Tradukis: Leono Vienano. 32 paĝoj.

Stranga estas ĉi tiu historio de la granda dana impresionisto kaj animesploranto pri la tragika vivo de la malfeliĉa bela Francisko. Post ellego oni demetas la libreton kun ia laca, prema sento, kiu jam preskaŭ malagrablus. Kaj tamen oni admiras la brilajn etajn bildojn, la miniaturhumorojn de ĉi tiu »poentilista« artisto, kaj la grandiozeco de l' ferma bildo (la pugnigita mano de Joanno levita al la ĉielo) fiksiĝas forte en la memoro. — La unua kiso: valorajo de stilo kaj poeta vizio. Ĝi estas artifike konstruita, sed vive pulsas en ĝi la juno.

N-o 6. *Aŭgusto Strindberg*: Amo kaj pano. Aŭtuno. Tradukis: Leono Vienano. 41 paĝoj.

En la unua oni trovas realiste, vigle, sed ŝablone verkitan historion pri la ruiniĝo de materie nesufiĉe bazita geedziĝo, de malspertaj, senpripensaj junaj homoj. — Aŭtuno: majstra elegio pri la forpaso de l' juneco, profundsonda analizo pri la maljunigantaj geedzoj, tragike nuancita cignokanto pri la juneca amo. Ĉefverko kun monumente simpla rakontmaniero.

Leono Vienano bone tradukas. Riproĉinda estas lia sinteno koncerne la interjekciojn, kiujn li simple ne esp-igas, simile al aliaj tradukistoj. Sekve regas babela konfuzo rilate al ĉi tiuj vortoj, kiuj tiel gravas en *vivanta* lingvo! Kial ne konsentas niaj verkistoj pri unueca uzo? (provo por tio troveblas en la Parnasa Gvidlibro). Sur la Bang- kaj Strindberg-volumoj ne estas signite, ĉu la noveloj estas tradukitaj el la originalo aŭ el alilingva traduko.

La serio konvenas por komencantoj, sed ankaŭ plialtpretendaj legantoj trovos ion por si. Nur estas domaĝe, ke la miskvalita papero ne indigas la kajerojn por enbibliotekigo. *Ludoviko Totsche.*

S. GRENKAMP: POLA FOLKLORO KAJ POPOLKANTO. 60 paĝoj. Eldonejo: Esperantista Voĉo, Jaslo, Pollando. 1933. Prezo 1.50 fr. + 10%.

«Ekkonu la kanton de l' popolo kaj vi ekkonos la popolon kaj ĝian landon.» — diras la aŭtoro de la libreto, kaj vere, kio servus pli bone la alproksimiĝadon de la popoloj, ol la lingvo de l' popolanimo, kiu ekparolas en la kantoj. Kiu foje jam partoprenis kuman kantadon de diversnaciaj, tiu hejmenportis la pruvon de ĉi supra aserto en formo de neforgesebla travivaĵo. Kaj hejme kiomfoje oni pribedaŭras, ke la humorplenaj momentoj tiel rapide forpasis kaj ke oni ne havas antaŭ si tekstojn



kaj muziknotojn por ilin resorĉi kaj por plifirmigi sian konon pri fremda popolanimo. Nu, la libro de Grenkamp — kvankam en modesta kadro — volas servi por tia celo, kaj oni povas konstati, ke ĝi bone servas sian celon. Histori-geografia skizo, karakterizo de diversaj popolkarakteroj, studo pri la diversaj specoj de l' popola kanto, tekstoj (ili devus esti iom pli arte tradukitaj) kaj muziknotoj (bedaŭrinde iom malmultaj) ilustraĵoj, simpla esp-a stilo: ĉio ĉi faras la libron plaĉa. *Ludoviko Totsche.*

JOŠISI SIMOMURA: NOVA KURSO DE ESPERANTAJ LETEROJ. 368 paĝoj. Eldonejo: Japana Esperanto Instituto, Tokio. 1932. Prezo: 0.60 USA dol. + 10%.

Jen denove lernolibro japana, oni vere ne povus plendi pri malaktiveco de niaj japanaj samideanoj! La libro instruas la esp-an korespondadon, sed ĝiaj ampleksaj, fundaj notoj gramatikaj kaj stilaj vastigas ĝin je preskaŭ ĝenerala lernolibro de la lingvo. La libro konsistas el letertekstoj kaj japanlingvaj komentarioj, ĉi lastaj kompreneble restas misteraĵoj por eŭropa recenzanto, nur el la enteksitaj esp-aj vortoj oni povas iom konjekti la precizecon de ĉi tiuj klarigoj. La aŭtoro sendube estas unu el tiuj japanaj samideanoj, kies lingva talento vekas plej multe da espero. Sed, por ne tute preteri riproĉojn, mi ne prisilentas, ke sur paĝo 30. »estas venkita« malĝustas anstataŭ »estis venkita«, ke sur paĝo 103. anstataŭ »mi deziras, ke vi vojaĝos« mi sentas pl'i bonvena la uzon de u-modo en la subordonita frazo. »Vi ne vidas min jam por centjaroj« estas kurioza esprimo anstataŭ »Mi ne vidis vin jam de centjaroj«. Sed ĝenerale la stilo estas fidinda.

Se eŭropano trarigardas la amasajn instruilojn (gazetojn, librojn), kiujn la japanoj uzas por lerni esp-on, li ricevas la strangan impreson, ke nia lingvo estas tre malfacila por ili. Ĉu eblas, ke la lernado de esp-o postulu de japanoj tiom da laboro? Mi vere ĝojus, se en L. M. japana samideano klarigus al mi la aferon: kial la japanaj esp-istoj sentas la necesojn de tiel multaj lernolibroj, kaj kian malfacilecon al ili prezentas Esperanto. *Ludoviko Totsche.*

IVAN MAZURANIĆ: *La morto de Smail-Aga Cengijić*. Heroa eposo kroata. Traduko kun antaŭparolo kaj klarigoj de Mavro Špicer. Eldonis »La Suda Stelo« — Slav. Brod, Jugoslavio, 1933. 76 paĝoj. Prezo: bindite 3 sv. fr. afr.

La poemo, malgranda epopeo, ĉerpita el la krudaj tempoj de porekzistaj liberbataloj, impresas forte kaj freŝe. Ankaŭ tra la traduko oni eksentas la radikan popolan aromon de la versoj, ian pafortan, primitivan terordon, kiu sentigas en la lakonaj frazoj, penso-ritmoj, vortripletoj, en la simplaj sed fortefektaj bildoj, en la sugestaj komparoj. Kaj trans ĉi tiuj poeziaj valoroj, la ekstaza aspiro je libereco, kiu pulsas tra la tuta verko, la draste elokventa pripentro de la mizeroj de l' sklave subpremita, turmentata popolo, la frapanta alterno de krudaj, sangaj, animskue kruelaj scenoj kaj mildaj idiliaj bildoj: ĉio ĉi faras la verkon unu el la rimarkindaj trezoroj de la mondliteraturo. Ne mirinde, ke ĝi trovis tiel multajn tradukantojn: ĝia Esperanta traduko estas ĝia interpreto jam en la deka lingvo.

La epopeo priskribas la agojn de la sangsoifa kaj oravida turka agao Cengijić, kiu eltordas la haraĉon (tributon) el la kompatindaj rajoj (subuloj) per elektitaj torturoj. Pro lia krueleco, kies inferan furiozon

31.3.



animskue pentras la ĉapitro »Haraĉo«, ribelas la montenegranoj kaj en sanga batalo ili venĝas: Ĉengijiĉ falas. Ĉi tiu epizodo ekvivas antaŭ niaj okuloj kun konsterna forto, ribeligante kontraŭ ĉiu perforto kaj subpremo la koron de la leganto. Ne mirinde, ke en popolo, el kies historio ĝi estas prenita, ĝi fariĝis »la plej glora ornamo de la nacia literaturo«.

Koncerne la tradukon, oni devas plene rekoni la grandan fervoron, entuziasmon kaj klopodon de la honorinda tradukinto. Li havis antaŭ si malfacilan taskon, kaj li bezonis fortan volon, egan persiston kaj obstinan paciencon por ĝin fini. El ĉiu verso oni vidas la konsciencan penon, la amon al poemo: kiel li klopodis kiel eble plej fidele kaj perfekte proksimigi la tradukon al la originalo, transdoni ties ĉiujn belajojn, ties tutan apartan aromon, humoron kaj sento-mondon.

Sed certe ankaŭ li mem preferos, se la recenzanto ne restos ĉe la vortoj de ĝenerala kaj banala laŭdado, prisilentante ĉion, kion li trovis riproĉebla en la traduko. Mi esperas, ke li ne estas infektita de la rosentemo kutima en Esperantujo, kiu rigardas la objektivan kritikon kvazaŭ persona ofendo. Estas ja klare, ke la detala kritiko jam en si mem estas rekonio: pri malbona verko oni skribas eble malpli da riproĉoj, ol pri bona, ĉar nur ĉe la lasta oni estas pelata de la deziro: havi ĝin tute perfekta.

La unua kaj ĉefa kritiko rilatas al la vort-ordo. Estas klare, ke en poemoj ĝi povas esti pli libera, ol en prozo. Dum en bona prozo la personaj pronomoj staras ĉiam antaŭ la verbo, en poezio ili povas ĝin postsekvi. En poezio oni povas allasi ankaŭ la neapudecon de la substantivo kaj de ĝia epiteto (ekz. grasajn incitigis bovojn, ruĝan ankaŭ ĉapon surkapigis, ŝtonon li malvarman supreniris). Sed estas certaj limoj. Kaj trans ĉi tiuj limoj troviĝas ekzemple meti la prepozicion inter la substantivon kaj ĝian epiteton. Tia nepermesbla kaj neniam ekkutimebla vortordo svarmas en la teksto: Herceĝana en la lando, Cetinjo en Montenegro, tia per fortego, turkaj pro pedikoj, akra per lancrapo, herbon en verdetan, triobla pere (?) dento, fĉra de ĉenaro, meze ligna ia sur fostego (!), milda ŝafo lupo ĉe sovaĝa, koro en lia, tiu en momento ktp. ktp. Poste, oni nepre devas meti konjunkciojn kaj rilatajn pronomojn en la komenco de la frazo; do frazoj, kiel: Dion sed servadi kiu marŝas; ĉu ĝi kulpas Turkoj ke inertas; susuretas karan kaj kanteton (!); ambaŭ ke mortintoj dentgrincigas, ktp. ktp. — estas kaj restas en Esperanto ĉiam malagrablaj kaj vere ŝokas la leganton. Estas ja sciate, ke Zamenhof prefere rompis la severan jamban skemon, ol permesi al si tian inverson.

Krome estas ankoraŭ kelkaj kritikindaĵoj: la vorto *ago* anstataŭ *agao* ofte konfuzas, ĉar ĝi ŝajnas la Esperanta vorto *ago*. Nekonsilinda estas la kunfando de substantivo kun adjektivo: blanktendaro, pezferajo, fortleono ktp. La vorto *pafplenŝutis* estas monstraĵo. Ofte tre malbone aspektas la perforta elizio de la artikolo: Gacko l' kampo; l' gorgon laĉis; brava l' trupo ktp. Kelkfoje la tradukinto trokurage marŝas super la ruboj de la gramatika kaj sintakso: »Dion sed servadi kiu marŝas, devas, ke per pura koro servu.« »Pere d' ungoj fosas sangoplenaj.« »Oro, de brutaron ne havanto, sed post fremda sur montar' vagadas.« Kelkfoje la tradukinto mem sentas, ke la traduko restas iom enigma, kaj li klarigas la tekston en noto. Tion mi ne povas aprobi. Se oni neniel povas solvi la tradukon en la striktaj limoj de la versformo, oni prefere elektu iom pli larĝan version.



Tia ne feliĉa solvo estas ekzemple la bela parto, en kiu la poemo pentras la mizeran situacion de la rajoj torditaj por haraĉo:

»Tuj haraĉon!« De kie haraĉo? / Oro, de tegmenton ne havanto, / Kie l' kapon povus li kuŝigi? / Oro, de nek kampon posedanto, / Kiu turkan ŝvite perlaboras? / Oro, de brutaron ne havanto, / Sed post fremda sur montar' vagadas? / Oro, ĉu de lanon ne havanto? / Oro, ĉu de panon ne havanto?

Nu, oni ja povas kompreni la suprajn versojn, sed al la lingva sento ili certe ne prezentas plezuron. Oni povus provi eble:

»Tuj haraĉon!« Sed de kie preni? / Oron? dum tegmenton li ne havas, / Por kuŝigi sub ĝi sian kapon? / Oron? dum ja kampon li ne havas, / Nur la turkan prilaboras ŝvite / Oron? dum brutaron li ne havas / Sed post fremda vagas en montaro? / Oron? dum lanveston li ne havas? / Oron? dum panreston li ne havas? . . .

Sed mi vere ne volas ŝajniĝi per mia longa kaj detala kritiko, ke la verko havas nur tiajn partojn. Ĝi estas granda kaj bela laboro, kaj krome la libro estas tre plaĉa, bele ilustrita, bone bindita, eldonita kun ekstrema zorgo kaj amo.

Kopar.

SEPPIK—MALMGREN: SYSTEMATISK KURSI ESPERANTO. 88 p. Prezo: 75 öre. Eldonis: Förlagsföreningen Esperanto u. p. a., Stockholm.

Jen nova, bona lernolibreto, preskaŭ rektmetoda. Ĝi havas la avant-aĝon, ke ankaŭ sol-lernantoj — kompreneble nur svedoj — povas el ĝi lerni. Bonhumoraj rakontetoj, anekdotoj varias en la teksto de la lecionoj. Preso tre klara, papero bona, prezo malalta. Du modestaj rimarkoj: kial troigi? Sur p. 85. ni legas, ke UEA-delegitoj estas en pli ol 100 landoj. Laŭ la statistiko ni scias, ke oni atingis nur 80 ŝtatojn. Kaj kial modesti? Sur p. 86. ne estas cititaj ĉiuj gravaj grandaj kaj valoraj esperanto-gazetoj, kiuj meritis esti inter la rekomendindaj. La libro estas rekomendinda.

P. B.

STEFAN ZWEIG: LA OKULOJ DE LA ETERNA FRATO. Tradukis: Helene Wolf. 65 paĝoj. Propra eldono de la tradukintino. Preso: Heroldo de Esperanto. Köln. 1932. Prezo: 1.50 sv. fr. + 10%.

La verkisto estas unu el la plej noblaj figuroj de l' impresionista novromantiko. Suverene li regas ĉiun artistan ilon, esprimeblon, formon. Liaj noveloj estas preskaŭ psikologiaj studoj, kies tekniko atingas la kristalan perfektecon de l' klasika novelo kaj kies lingvo estas mirinde plastika kaj fleksiĝema. Kiel novromantikulo li havas ĉefteme la erotikon, la pasion, sed eĉ la bolgrada pasio parolas ĉe li malvarme ekvilibritan lingvon. Li ĉiam pli kaj pli proksimiĝas al plejinterno de homaj krizoj, homaj sortoj.

La temo de *La okuloj de la eterna frato*, kiun la verkisto nomas legendo, estas filozofio: la peza problemo pri la respondeco de l' homa ago estas en ĝi projekciita sur la ekranon. »La esenco de la ago estas abisme profunda« li citas el la hinda Bhagavatgita... Kaj la filozofian temon li vivigas en bildserio plena de oriente riĉa fantazio. La heroo, Virata, en la unua bildo montriĝas kiel triumfa armeestro (»fulmo de glavo« — li



estas nomata), sed samtempe kun la venko li seniluziigas pri la valoro kaj rajto de l' perforto. La okuloj de lia frato, kiu partoprenis la malamikan tendaron kaj kiun li senrekone mortigis en la batalo, traboris liajn koron kaj menzon: la triumfintan glavon li jetas for. En la dua bildo ni renkontas lin kiel ĉefjuĝiston (la popolo nomas lin «fonto de justeco») sed kiam li sur propra haito volas instrui pri la ĝusto de sia juĝista mezurilo, li konsciigas pri la vaneco kaj problemeco de ĉiu homa juĝo. La ĉapitro pri la semajnoj pasigitaj en la subtera malliberejo apartenas al la plej tragikokolare avidaj panegiroj al la individua libereco. Forjetinte ŝtatajn oficojn Virata vivas paco en sia domo servante al la homoj anstataŭ juĝoj per siaj nedevegaj, sed pie akceptataj konsiloj. («Kampo de l' konsilo» estas lia nomo.) Kaj la okuloj de sklavo batita de liaj filoj (okuloj tiom similaj al tiuj de lia mortigita frato, ho eternaj okuloj de la eterne mortigata frato!) klarigas lin, ke eĉ paca reliriĝo estas ago, ago maljusta kaj perforta kontraŭ tiuj — liaj sklavoj — kies pena laboro aĉetas lian pacon kaj bonecon. En la kvara bildo Virata vivas ermite en soleca arbaro, li retenas sin de ĉia ago, volante eviti per tio, ke li influu la vivon de aliaj: »Tiu, kiu intencas vivi sen kulpo, ne rajtas partopreni je domo kaj fremda sorto, ne rajtas nutriĝi de fremda penado... Anstataŭ agi li nur rigardas: »Sed estis bone, esti nur kiel vidanto super ĉi tiuj bataloj, ne partoprenante en ĉiu kulpo en la kreskanta rondo de detruo kaj liberigo.« Sed hazardaĵo, kiu rekondukas lin inter homojn, konvinkas lin, ke eĉ la neago estas influopova, eble eĉ en la plej danĝera maniero... Lia fina konkludo: »Mi ne plu volas esti libera de mia volo. Ĉar la liberulo ne estas libera kaj la neaganto ne sen kulpo. Nur tiu, kiu servas, estas libera, tiu kiu donas sian volon al alia, sian forton al ago kaj kiu agas sen demando.« Kaj li akceptas plej humilajn servon.

La negativa prezento de l' problemo estas brila, sed ĉu la pozitiva konkludo alportas la veran solvon?

La stilo de la legendo estas intence simpla kaj tio feliĉe helpis la tradukintinon, kiu bone plenumis sian taskon, kvankam estas senteble, ke rutino ankoraŭ mankas al ŝi. La originalo estas iom sklave sekvita, kelkfoje eĉ en vortordo nenatura al Esperanto. Estas rimarkebla la nesufiĉe kritika uzo de germana-esperanta vortaro. Sed ĉio ĉi tamen ne rezultigis grandajn mankojn, ĉar la originalo plejparte lasas sin laŭvorte traduki. Estus evitinda la multfoja duobla uzo de prepozicioj (forflugis for, surmeti sur, alrigardi al.) Anstataŭ *scikoni* sufiĉas *koni*. Sur paĝo 12. *demando* estas erare uzata anstataŭ *peto*. »Venteganta maro» terue sensanga esprimo, la P. V. enhavas *tempeston* kaj *stormon*, kial oni timas ilin? »Putri je la jaroj»: ĝustas »tra la jaroj». »*Malsupreniĝus*» monstraĵo netolerebla en Zweig-prozo, se la tradukintino ne riskis uzi la verbon *sinki*, kial ŝi ne skribis simple: *falis*? *Esteco* estas superflua kaj malbona anstataŭ la simpla *esto*. Sed ĉi tiuj riproĉetoj ne fuŝas la ĝenerale favoran impreson pri la traduko.

Papero, preso tre bonaj. La ksilografajoj de Fritz Dücker estas plaĉaj kaj harmoniantaj kun la teksto.

Ĉi tiun libron mi metus en la manon de l' junularo komprenanta Esperanton, se tia junularo entute ekzistus. *Ludoviko Totsche.*

UNUJ LIBROJ DE KONFUCIANA BIBLIO. Granda lernado kaj Doktrino de Mezeco. El ĉinlingva originalo tradukis Kiuĉi Nohara. Eld.: Japana Esperanto-Instituto. 65. p.



La tradukoj de la du unuaj libroj de la Konfuciana Biblioteko estas valora kompletigo de la esp-a literaturo. (Ĉetero ilin ne Konfucio mem verkis, sed liaj disĉiploj kaj sekvantoj.) La ĉefa enhavo estas konsiloj, instruoj, precipe — en la dua libro — al reganto de popoloj. Intere la instruoj ki trovas valorajn sentencojn, parte retroveblajn en la kristana teologio. Ekzemple: »Kion vi ne deziras, ke aliu faru al vi, tion vi faru al aliu.« »Simileco ekzistas inter pafarko kaj la konduto de homoj: kiam oni malsukcesis ektrafi celmarkon, oni sin turnu al si kaj serĉu la kaŭzon en si mem.« (»Celmarko« estas malgusta anstataŭ »celbando«.) »La harmonio estas la ĝenerala vojo, sur kiu devas iradi ĉiu.« (»La Vojo«.) La traduko ne tute kontentigis min, ĉar la frazoj estas ofte trozaj kaj mi legus la ĉinan originalon el multaj jarcentoj antaŭ Kristo. Eble el simila vidpunkto estas valore, ke la tradukinto volis fidele redoni la originalon, sed tio trosekigas la tekston.

P. B.

M. GUTERMAN. Słownik jez. Esperanto (Vortaro de la lingvo Esperanto). Eldonis »Hawus«, Warszawa. P. 387 + XXXVIII. Prezo 10.— zl.

La pola esperantistaro, kiu sendube havas sian gravan parton en la historio de Esperanto kaj ĝia literaturo, ĝis nun posedis nur unu plenan vortaron poleserantan (kaj inversan) de A. Grabowski. Ĝi vere estis la sola, sed neanstataŭebla: en ĝi la aŭtoro prezentis la maksimumon, kiun oni antaŭ 20 jaroj povis elkombini per la disponata tiutempe vortmaterialo. Kaj se iajfoje lia esperantigo de iu nacilingva vorto ne estis tute trafa, ni verŝajne devas serĉi la kaŭzon en la fakto, ke dum tiu periodo ĉia inklino al neologismoj, eĉ plej necesaj, estis subpremata de niaj tiamaĵ gvidantoj (ne forgesu, ke tio estis post la Ido-skismo). Lasttempe la pol-esperanta parto tute disvendigis, lasante la polan esperantistaron sen taŭga vortaro.

La verko de Guterman, kiu aperas en momento de vera bezono al pol-esperanta vortaro, estas bazita sur la Grabowski-vortaro. Ĝi estas riĉa kaj plena vortaro, zorge prilaborita. La kompilinto ne sole tradukis precize ĉiun vorton, sed apudmetis ankaŭ la diversajn nuancojn, kio certe estas tre valora por la pli spertaj lingvouzantoj. Tamen kelkajn mistradukojn de Grabowski li ne ŝanĝis. Ekz. la vorton »obława« (neatendita invado de polica taĉmento en iu loko) li — simile al Grabowski — tradukis »pelĉaso«. Verdire, ni per la oficiala radikaro ne povus krei por tiu ideo trafan terminon kaj diskutindas, ĉu la aŭtoro apud la malbona »pelĉaso« ne devus kuragi sugesti novan vorton, kiun postulas la neceseco. Mi eĉ utiligas la okazon por tiucele proponi la vorton »raflo« el la franca.

Tre utilaj estas la trovigantaj en la komenco de l' verko resumo de gramatiko esp. kaj plena tabelo de afiksoj kaj prefikse uzataj prepozicioj. Por klera homo tiuj aldonoj povas simple servi anstataŭ lernolibro.

La dua parto de la granda verko prezentas vortaron E-polan kaj konsistas nur el la oficiala radikaro kaj la vaste uzataj internaciaj vortoj. Ĉu konsiderante la amplekson de la pola-esperanta parto, ne estus konsilinde en la inversa parto same amplekse arigi ne nur la radikojn sed ankaŭ la derivaĵojn proprajn al la komuna lingvouzo?

Preserarojn mi ne trovis.

Resume: la vortaro estas bonega kaj rekomendinda al ĉiu pola esperantisto. Aĉa bindaĵo.

*I. Lejzerowicz.*



## AELA-libroj por 1934.

Laŭ la regularo la membraro de AELA rajtas mem balote elekti tiujn librojn, kiujn ĝi preferas ricevi por sia kotizo.

Por plenumi tiun promeson, komence de la jaro ni sendis leteron al ĉirkaŭ cent konataj esperantistaj verkistoj kaj tradukistoj, por peti iliajn konsilojn pri la libroj, kiujn ni balotigu. Alvenis proponoj pri ĉirkaŭ kvindek libroj, el kiuj 19 librojn en 20 volumoj nun ni metas por via elekto. Kiel ni jam diris antaŭe, ni donos al vi en la venonta jaro ne 1800, sed ĉirkaŭ 2500 paĝojn da libroj. Kompreneble ni tion povas fari nur en la espero, ke vi ne nur restos fidelaj, sed faros ĉion eblan, ke ni atingu jam en tiu ĉi jaro la budĝetitan membronombron, kio ja estas ne tro alta kaj kies 60% ni jam nun havas. Restas do ankoraŭ ses monatoj por varbi al nia organizaĵo kaj ni kredas, ke vi plene eluzos tiun tempon plej bone. Dume ni konatigas al vi la deknau verkojn aldonante malantaŭe balotilon. Bonvolu atenti, ke:

Ĉiu membro rajtas indiki librojn ĝis paĝonombro 2000—2200. La restajn 3—500 paĝojn ni retenas por ni mem, por ke ni povu lasi lokon al ŝangeblaj libroj.

La libro *Hekler Antal: Arthistorio* estas indikata en du volumoj. La unua temas ĝis la renesanco, la alia post la renesanco. Ili estas elekteblaj ankaŭ tiel, ke la unua volumo, en si mem memstara aperu en 1934. kaj la dua, same memstara en 1935. Tamen, elektante tiun ĉi libron, oni rajtas elekti ĝenerale tiel, ke 100 paĝoj de tiu libro egalvaloras 150 paĝojn el alia, pro la multaj kliŝoj, kiujn la verko enhavas.

Kaj nun jen la balototaj verkoj:

### Tradukajtoj:

*Ĉeĥoslovaka Antologio*. Redektas R. *Hromada*, tradukas la kunlaborantoj ĉeĥoslovakaj de Literatura Mondo. Aspekto, amplekso, enhavo simila al la Hungara Antologio. 500 paĝa, sed ĉe la baloto pro la grandeco de formato kalkulas kiel 650 paĝoj.

Pri tiu ĉi verko ni ne devas diri multe. La redaktoro kaj tradukantoj estas bone konataj antaŭ ĉiu esperantisto, la eminenta ĉeĥoslovaka literaturo estas multloke bone konigata kaj tio, ke ni similigas kaj opinias ĝin egalvalora al Hungara Antologio, estas sufiĉa konigilo.

*Franz Werfel: Abiturienta renkontiĝo*. Tradukas el la germana O. *Ginz* aŭ I. *Lejzerowicz*. ĉirkaŭ 220 paĝoj.

»Kontraŭ grandaj kvalitoj de aliulo ne estas alia savilo, al la amo.« Ĉi tiu Goethe-citajo enkondukas la Werfel-romanon kaj ĝi koncize ampleksas la ĉeftemon de la libro. La dudekkvinjara datreveno de la abiturienta ekzameno (kun kia viveco, kun kia kruelo, kun kia — preskaŭ fantoma — naturalismo, kaj tamen kun kia rezigna melankolio estas priskribita ĉi tiu renkontiĝo!) estas nur preteksto, por ke la ĉefheroo rakontu la historion de sia junaĝa kulpo, kiun li ne povis eviti, ĉar li ne ektrovis la solan savilon kontraŭ la intelekta kaj karaktera supereco de sia kunlernanto kaj amiko... La angela poeto de l' senlima kaj amorfa bono, puro kaj kunsento ĉi tie trudis al si la disciplinon de severa strukturo kaj kun la helpo de sia delikate palpa psikologio, de sia vizia hom-prezenta kapablo, de sia



certpaŝa orientiĝo en la komplikajoj de l' junula animo, li kreis verkon, kiu apartenas al la plej belaj, plej humanaj, plej respondeplenaj libroj, verkon, kiu gvidas nin tute proksime al la eternaj problemoj de l' vivo mem.

*Stefan Zweig: Amok.* El la germana originalo *K. Kalocsay aŭ L. Totsche* 88 paĝoj.

Alojisto de vortoj estas Zweig, de vortoj noblaj, puraj kaj metale brilaj. Metiiste li martelas, formas, ĉizas sian materion, sed li almiŝkas misteran vivigan elementon: la homan animon, la homan suferon, sian propran animon, sian propran suferon... Malvarme brilas la farita art-verko, sed ĝia rigida ekvilibro, ĝia spegulmaniera enfermiĝemo kaŝas en si abisman haoson de doloraj vibradoj de l' karno kaj animo, kiel la indiferenta trankvilo de l' materio nur maskas la internan turniĝon kaj koliziadon de l' atomoj... Kaj eble neniam estis tiel ĝiseksplode streĉita la interna pulsado de liaj vortoj, kiel en la Amok-kuranto, en kiu li per certa mano ekkaptas kaj prezentas la organismon de l' vivo en ĝia plej intensigita momento: en la stato de l' *pasio*. Eble neniam li trasentis tiel tragike la korpon, eble neniam li rigardis tiel profunde la koron... Speciala kazo en ekzotika ĉirkaŭaĵo estas la temo, sed en ĝia spegulo kiu ne rekonas sin mem, siajn abismojn, la terurajn eblojn de sia propra sorto? La novelo »Amok-kuranto« apartenas al la plej sentempaj valoroj de la mondliteraturo.

*Andrée Gide: La Sinfonio Pastorala.* El la franca *G. Waringhien*. Ĉ. 88 paĝoj.

La Sinfonio Pastorala estas eble plej pura, plej klasika verko de la ĉiam florinta kaj ĉiam juna Gide. La pastro de l' svisa Jura-montaro triumfe ekpaŝas en ĝi en la mondliteraturon, senpretende, modeste, ĉe sennome, sed kies ŝajna idilia vivmaniero kaŝas en si nuran danĝeran soifon, nurajn teruritajn demandojn, kaj pro kies animo (kiel pro ĉiu heroo de Gide) anĝeloj kaj demonoj interbatalas. Ĉar en ĉi tiu malgranda montara vilaĝo, en ĉi tiu biblia pastrodomo, kaj en la notoj por si mem skribitaj de ĉi tiu sennoma pastro, ne nur la sorto de ĉi tiu juna knabino, de ĉi tiu blinda Ofelia decidiĝas, ne nur la maljuniganta viro kaj la adoleskanta knabo batalas, sed el la profundo de ĉio ĉi, de post la pastra destino, la malfrua amo kaj la geedziĝa vivo, la eterna dilemo de l' senkredaj kredantoj, de l' humilaj ribelantoj, de l' neniam trankviliĝantoj rompas al si vojon: ĉu la amo aŭ la lego? ĉu instinkto aŭ disciplino? ĉu ĝojo aŭ rezigno? ĉu libereco aŭ oboe? ĉu Kristo aŭ Paŭlo? Kaj ni admiru ĉi tiun eteran miraklon de la stilpureco, kiu, sen perforto kaj troigo, malkaŝas ne nur la rolantojn de la historio, sed ankaŭ la taglibranton mem, ĝis la plejprofundo de l' animo, ĝis tie, kie ne nur ĉe la pastro, sed ĉe ni ĉiuj, eble foje ankaŭ ĉe la teoriisto Gide, miksiĝas la sopiroj kun la ideologioj, la moralo kun la instinktoj, la evangeliaj ordonoj kun plej interna anarkio, kaj ĉi tiu miksiĝo naskas la voĉon de la taglibro, kiu estas jen puritana, jen subite emfaza, biblie pia, kaj krome sinperfide groteska, kaj kiu estas inde glorigita triumfo de la gide-a klasikeco.

*Lewis Sinclair: Dr. Arrowsmith.* El la angla originalo angla kolektivo el la kunlaborantoj de Literatura Mondo. La grandegan ĉ. 900 paĝan romanon ni eldonas en du volumoj.

Tiu ĉi romano estas la plej bona verko de la Nobelpremiito Sinclair



En ĝi la verkisto priskribas la vivon de scienculo, kiu baraktas en la nuna mondo de pseŭdoscienco. La homo, serĉanta kontentigon por siaj noblaj talentoj, devas trati multegan malhelpon ĝis li atingas la celon: vivi nur por la scienco, por la altigo de la homa kulturo. La verko apartenas al tiuj, kiuj aperas tre-tre malofte en la mondliteraturo kaj en kiuj la verkisto kreas monumenton por si kaj por la epoko de li travivata.

*Aŭgust Gailit: Toomas Nipernaadi.* El la estona de *H. Seppik kaj Hilda Dresen.* ĉ. 500 paĝa.

La romano konsistas el 7 apartaj noveloj. La heroo de tiuj noveloj estas romantikulo, fantaziulo, optimista rezignantulo je ĉio krom libereco. Li vivas vintre kun sia familio, sed dum la aliaj sezonoj li vagadas, serĉante aventurojn. Preskaŭ ĉie, kie li ekhaltas por ia tempo, li enamiĝas, sed li postulas al si nek riĉaĵon, nek amon, lia amo ĉiam restas platona. Li havas plej kuriozajn aventurojn ĉar mankas al li nek humuro, nek fantazio, sed li scipovas esti melankolia kaj delikatsenta. Iam aparta freŝeco kaj originaleco frapas nin el la libro, kies partojn oni povis legi ankaŭ en Esperanto sur la paĝoj de la estona numero de L. M. La verko cetere jam aperis en pluraj aliaj lingvoj.

*Jeluŝić: Cezaro.* El la horvata eldono, kontrolita de la aŭtoro mem, tradukas Ivo Rotkvič. Ĉ. 500 paĝa.

Kiam eliris »Cezaro«, la tutmonda kritiko, eĉ tiu de Ameriko tuj akklamis ĝin kiel unu el la plej sensaciaj »romano-biografioj«, iam ajn verkitaĵ. En sole du jaroj eliris dudek germanaj eldonoj kaj krome ĝi estas tradukita en pli ol dek lingvojn.

Jeluŝić sukcesis verki grandiozan libron el malfacila kaj tempofora materialo. La libro estas mirige plastika, okazoturna, kvazaŭ la plej aventura filmo kaj krome tre ofte profunda kiel la abismaj paĝoj de Dostojevski. Plena de plej subtilaj »agordoj« la libro genie kreas la psikan memon de Cezaro, ŝajne unu el la plej rimarkindaj pilotoj de la homa sorto...

(El tiurilata artikolo en Literatura Mondo.)

*Jun-Iĉiroo Tanizaki: Printempo furiozas.* El la japana *Joŝiŝi Simomura.* Ĉ. 140 paĝa.

La moderna japana literaturo plene absorbigis de la aventuraĵ romanoj de okcidento. Tamen ili estas pli interesaj por okcidentanoj per tio, ke samtempe ni vidas en ili la vivon de japana popolo, ofte tre kuriozan kaj strangan por okcidenta menso. La verkisto estas konata kiel la plej populara verkisto de Japanujo kaj posedas tiom vastan eŭropan kulturon, ke nemirinde, se ni trovas lian ĵenan romanon unu el la plej bonaj kunfandoj de la okcidenta aventurromano kun la orienta mondo. La tradukinton ni ne devas aparte prezenti, ĉar li jam estas bonege konata per siaj multaj tradukaĵoj el la japana lingvo.

*Francisko Kőrmenđi: Budapeŝta Aventuro.* El la hungara *Karlo Bodó.* Ĉ. 60 paĝa.

La juna verkisto fariĝis subite konata, kiam per sia unua, supre nomita romano, li gajnis amerika-anglan literaturan konkurson. De tiam lia verko aperis ankaŭ hungare kaj en ĉiuj gravaj lingvoj. Parolu anstataŭ ni nederlanda samideano, kiu legis la libron kaj spontane sen-



dante al ni, hungaroj, grandan konatigon pri ĝi, skribas inter aliaj:

»La titolpaĝo de ĉi tiu libro konigas al ni kiel, aŭ pli bone dirite, pro kio estiĝis ĉi tiu verko de ĝis nun nekonata aŭtoro, kies verko tiom enociis kaj skuis la tutan intelektan mondon. Tamen, ankaŭ sen tio ni ja komprenas la instigojn de la verkisto, ĉar la tuta libro mem diras tion al ni... Ne estas mirige, se la verko akiras saman famon, kiel ekz. la verkoj de Remarque... Konklude mi povas diri, ke la verko estas hipermoderna libro, kiu montras al la leganto la grandan mizeron de la nuntempe tre multaj senlaboruloj, sed pli vere de la nuntempa ekonomia kaj ideo mondo, kaj Kõrmendi faras por ni bildon pri tiu mondo en tiom akraj kaj helkoloraj konturoj, ke nin kaptas tremiga sento kaj dubo pri tio ĉu ni saviĝos el la granda mizero, kiu nun regas la mondon... Sed la verko de Kõrmendi estas el literatura vidpunkto sendube granda sukceso kaj meritas la admiron kaj atenton de ĉiu, kiu kuraĝas kondukigi sin de literatura verko, kiu en ĝusta, kvankam iufoje kruda maniero prezentas al sia leganto la venkon de la »espero« kaj aliflanke la malvenkon de tiu, kiu ne esperas, almenaŭ ne volas esperi.

*Antoni Slominski: Mia vojaĝo en Sovetio.* Tradukas: S. Grenkamp-Kornfeld. Pri la nuna Sovetio estas tre riĉa la mondliteraturo. La ĵena verko faris sensacion ne nur en Polujo, sed ankaŭ en Germanujo kaj aliaj landoj pro sia senpolitika objektiveco. Jen la enhavo: En la vagono, Post la ruĝa pordego, Kolektiva domo, Vespero en Kino, Kio estas en la antaŭaj butikoj? Eksterlandanoj en Moskvo, Oro, kio ne estis, Moskvaj loĝejoj, »Dworiec Truda«, Mikroboj, SPU, Kreml, Muzeoj, Muzeo de revolucio, Teatro, »Hamlet«, Loterio, Blankaj noktoj, Peterburgo, Interparolo kun frato, Rigardado en okulojn, Kontraŭreligia muzeo, En pola legacio, Sosizdat, Interparolo kun Pudovkin, Kial mi ne skribas pri la kvinjara plano?, Juĝejo, Armeo, Parado, La lasta Nokto, Reveno.

La ĉirkaŭ 160 paga libro estas do varia kaj konatigas min pri la nuna vivo en Sovetio.

*Leo Belmont: La homo pri kiu la mondo ridas.* Rakonto, kreita sur la fono de la »Cirko« de Charlie Chaplin. El la pola *Anna Weinstein* ĉ. 250 paga.

La verkisto estas bone konata inter ni, ĉar kvankam verkanta pollingve, estas unu el la plej konataj esperantistoj, ne nur en Polujo. Jen kelkaj kritikoj pri la verko: »Tiu ĉi libro enhavas multajn humorajojn kaj gajegajn faktojn pri la vivo de malfeliĉulo, orfo, kaj arlekeno — Charlie Chaplin. Ĝi estus tre ridinda kaj amuza, se ĝi ne estus tiel malĝoja. Jes, ĝi estas tre malĝoja. La aŭtoro skribas per sango de sia koro, indikante tre multe da maljustaĵoj en la mondo... La aŭtoro per la buŝo de sia heroo kaj per liaj travivaĵoj iamaniere tuŝas la plej komplikitajn aferojn de la vivo. La libro, skribita per genia plumo de fama verkisto, estas plensarkasma kontraŭ kritikistoj, librovendistoj kaj eldonistoj, trouzantaj la aŭtorojn.

Alia kritiko: Se konata Charlie Chaplin ne priskribis ankoraŭ sian aŭtobiografion, mi konsilus al li ĉerpi la materialon tiucele el la verko de Belmont. Belmont estas mokema, sed ne malica, li neniun ŝparas, eĉ sin mem ne. Lia armilo estas malpeza, subtila sarkasmo — inteligenta kaj



kultura. Sed tiu ĉi satira flanko en la rakonto pri Chaplin estas nura ŝminko de arlekeno, kiu post komike kurbigita masko kaŝas melankolion de malgaja animo...

*Leo Belmont: Messalina.* Du volumoj, entute ĉirkaŭ 800 paĝoj. El la pola tradukas *Anna Weinstein.*

Jen parto el kritiko: Ĉi tiu unua verko pri Messalina estas majstro-verko... Ni ĉi tie admiras lin (la verkiston) konulo de epoko, kiun li intencis rekrei, artisto kaj liberpensulo. Pri judaismo nenie oni skribis tiom, kiom en tiu ĉi verko de Belmont... Grandioza estas la fono, sur kiun Belmont jetis per sia genia plumo sortojn de sia belega, amsoifa heroino. En tiu ĉi fono mankas neniu detalo el tempoj de Messalina, neniu moro kaj kutimo... Kaj la heroino mein? La aŭtoro penas antaŭ ĉio trovi en ŝiaj »amfuziozoj« psikologiajn motivojn kaj en ŝia karaktero homajn ecojn. Li penas kompreni ŝin por povi ŝin senkulpigi antaŭ pasinteco, kio tamen ne signifas, ke li ne priatentas ŝian seksan senbridon... Messalina pereas fine kiel ŝtatkrimulino, ĉar ŝi volas sentronigi sian edzon kaj surtroni sian amaton. La postaj jarcentoj kondamnis lin, ĉar la atenco — ne sukcesis... Tiel grandioza verko, kiel Messalina ne baldaŭ aperos en la pola literaturo.

*Antal Hekler: Arthistorio.* El la hungara iu el la redaktoroj de Literatura Mondo.

I-a volumo. Ĝis la Renesanco. Ĉirkaŭ 128 tekstopaĝoj kaj 80 bildopaĝoj kun ĉirkaŭ 120 ilustraĵoj. Ĉe la baloto kalkulas kiel 320 paĝa libro.

II-a volumo. De la renesanco ĝis hodiaŭ. Ĉirkaŭ 128 tekstopaĝoj kaj 48 bildopaĝoj kun ĉ. 90 ilustraĵoj. Ĉe la baloto kalkulas kiel 270 paĝa libro.

Antal Hekler estas profesoro en la Universitato de Budapeŝto kaj fame konata en sia fako de arthistorio en sciencaj rondoj. Lia resumita verko bone unuigas en si multajn bonajn kvalitojn de la malnova pozitivistaj kaj nova ideohistoriaj direktoj. Ĝi staras sur solidaj bazoj, ĉar estas konstruita sur forta historia bazo, sed la granda impeto, fantazio, konstanta rilato kun la aliaj terenoj de la spirita vivo, kiu igas la verkon ege alloga kaj interesa, metas la verkiston en la vicon de la plej modernaj arthistoriistoj. La verko estas bonŝanca miksaĵo de scienco kaj intuitiva fantazio. Malfacile ni povus rekomendi pli taŭgan verkon al tiu, kiu mallonge, tamen funde kaj elcerpe volas informiĝi pri la arthistorio de la mondo. La verko de Hekler estas certapaŝa, vasthorizonta, facile legebla gvidanto ekde la unuaj restaĵoj de la egipta arto ĝis la plej freŝaj pecoj de la modernaj artaj tendencoj. La verkon akompanas abunda bildmaterialo, kiun la verkisto klarigas per aparta teksto, farita kun granda analizkapablo. Tial ni devas diri, ke la trastudo de la ilustraĵoj mem rezultas eksterordinarajn profitojn por la leganto, ĉar ĝi kvazaŭ lude kaj amuze instruas la observanton vidi kaj rigardi. Tiu teksto donas al la leganto tiajn vidpunktojn, ke li poste kapablas taŭge kritiki ĉiujn artobjektojn ĉu antikvajn, ĉu modernajn, kiuj venas antaŭ li. La verko estas belega kaj moderna instruilo de la moderna inteligenta homo.

Kaj nun ni transiru al niaj



### Originalaj verkistoj

*Stellan Engholm*, la verkinto de *Al Toronto kaj Homoj sur la Tero* verkas malgrandan romanon pri la vivo de geknaboj en Toronto. Engholm estas instruisto, li pasigas preskaŭ tutan sian vivon inter infanoj, ne estas do mirinde, ke li konas plej bone la infanojn mem. Speciale do ĉi tiu verko lia devas esti la plej interesa, ĉar en ĝi parolas verkisto pri temo, de li plej multe ŝatata. La libro estos ĉirkaŭ 128 paĝa.

*Izrael Lejzerowicz* pretigis jam sian manuskripton »El la Verda Biblio« kaj »Taglibro de Horaĉo Serĉer«. Ambaŭ specojn de la noveloj konas jam bone kaj ĝoje la legantoj de Literatura Mondo, kie aperis kelkaj el ili. La noveloj ŝprucas bonhumorajn observojn el la vivo de esperantistoj kaj la satira tono prezentas al ni niajn proprajn mankojn, malvirtojn. La verko estos proksimume 128 paĝa.

Saman specon apartenas la verketo de *J. Sapiro* sub titolo: »Tra nia verda mondeto«. La verkisto jam estas bone konata antaŭ ĉiu per sia »Babiladoj de bonhumora Zamenhofano«, per la kongresaj raportoj, aperintaj en ESPERANTO sub nomo Joŝo. La skizetojn akompanas tre taŭgaj kaj bonaj karikaturaj. Sur la proksimume 100 paĝoj ni trovos refreŝigon post la ĉagrenoj, kiuj ofte trafas nin en la vivo.

*Francisko Szilágyi*, la verkinto de la novelaro »Trans la Fabeloceano«, kiu verko ricevis nur laŭdajn recenzojn, redaktoro de Literatura Mondo, tradukinto de multaj libroj, laboras nun pri granda romano, preparolanta la sorton de eltrovantoj, inter ili ankaŭ tiun de Zamenhof. Pro tio estos speciale interesa por ni, esperantistoj la ĉirkaŭ 200 paĝa romano, kiu bone memorigos al ni la kaŭzojn, kial inventaĵoj ne tuj estas akceptataj de ĉiuj aklame.

Fine novan verkiston ni prezentas al nia legantaro. *H. Weinhengst* estas recenzisto de LA SOCIALISTO. Lia unua romano pentras antaŭ ni per multaj koloroj la nunan vivon de senlaboraj laboristoj. Ĝi prezentas al ni, kiel ŝanĝiĝas la vivo de molestaj, konstante laborintaj laboristoj per la senlaboreco al kadukiĝo, frenezigo, friponiĝo. La verkisto estas flua rakontanto. Li pentras nur per malhelaj koloroj, sed ja tia estas la vivo de senlaboruloj. En Weinhengst ni trovas novan multpromesan talenton kaj ni kredas, ke post ĉi tiu, proksimume 200 paĝa romano li portos al ni ankoraŭ multajn aliajn rakontojn el la vivo de la industriaj laboristoj.

Jen do ni prezentis al vi preskaŭ la trioblon de tiu kvanto kiun vi rajtas elekti. Vi havas do riĉan elektaĵon. Se vi ŝatas la originalan literaturon, vi povas elekti ĉe kvin librojn, se vi ŝatas verkojn aŭ antologiojn, aŭ ion alian, por preskaŭ ĉiu tendenco vi trovas reprezentanton. Nun do dependas plene de vi, kian libron vi deziras ricevi. Kompreneble, povas okazi, ke via ŝato ne korespondas kun tiu de la plimulto en iuj libroj kaj tiam vi devos rezigni favore al la plimulto, tamen vi grave influas kaj tial ni devas vin insiste peti, ke vi nepre balotu. Ni ja volas per ĉi tiu procedo, kiu estas por ni sufiĉe elspeziga, vidi, kio estas la deziro de la granda plimulto de nia membraro. Ni esperas, ke ni ricevos la baloton de ĉiuj membroj niaj kaj ke vi montrós senton de respondeco kontraŭ vi mem, kontraŭ via poŝo. Ni do atendas vian baloton plej urĝe kaj certe.

Kun koraj salutoj

Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj.



## DIVERSAĴOJ

*Flirto Esperanta* de Edz-Peranto. Eldonis N. Szapiro, Warszawa. Prezo 0.50 sv. fr. — Nova societa ludo, uzota dum grupkunvenoj.

*IPE-kalendaro* por 1933. eldonita de IPE. Berlin G. 25. Poŝtfako 2 48 paĝa, poŝformata kalendaro kun notindaj datoj el la laborista movado, kaj adresaro de lab. esp. organizaĵoj, proksimaj aŭ membroj al IPE. Prezo 50 germ. pf.

### GVIDLIBROJ KAJ PROSPEKTOJ:

*Kontraŭ la regantaj perceptoj pri krimo kaj puno.* Verketo de D-rino Clara Meyer Wichmann, el la nederlanda trad. Nikune. 13×20 cm. 8 paĝoj plus kovrilo. Eldonejo ĉe H. Philipps, Amsterdam Z. Olympiaweg 56. Prezo sv. fr. 0.10. Interesa broŝureto pri la supra temo.

*Gvidlibro tra Tallinn;* Esperanto Turista Komisiono, Tallinn Pasta kaste 6.

*Bingen;* Magistrato de Bingen Rhein, Germanujo

*Foiro de Budapeŝt;* 6—15 majo 1933.

*Köbenhavn,* Turistforeningen for Danmark, Kopenhago, Vestre Boul 18

*Aŭstrio,* Ministerio de Trafiko, havebla ĉe Internacia Esp. Muzeo WIEN, I. Neue Burg.

*Varna,* Bulgarujo, Banejdirekcio.

La gvidlibroj de Tallinn kaj Varna estas bele ilustritaj 16 paĝaj libretoj. La aliaj estas la kutimaj belaj faldprospektoj, tiu de Aŭstrio ornamata per la geografia karto de Aŭstrio. Ĉiuj estas senpage riceveblaj ĉe la adresoj, metitaj apud ilia titolo.

## NIA POŝTO

*Al ĉiuj membroj.* Pro teknikaj kaŭzoj ni devis ŝanĝi la 2-an libron kun la kvara kaj tial kun ĉi tiu numero vi ricevas la libron *Sorĉistino et Kastilio*. La sekva numero de la Bibliografia Gazeto kaj la verko *Pri l' Moderna Arto* estos ekspedata komence de aŭgusto. Nun kune ni sendas al ĉiu ankoraŭ nericevinta, la trian libron. Al la membroj, kiuj ne indikis specialan deziron pri la tria libro ni sendis ĉe broŝurita membro *Pilgrimo* kaj *Preter la Vivo* aŭ *Dancu Marionetoj*, ĉe bindita *Eŭgeno Onegin* aŭ *Dancu Marionetoj*. Se ni ne estus bone trafintaj, bonvolu ne kulpigi nin, resendu la libron ricevitan kun la indiko de via deziro kaj pago de unu respondkupono por novaj sendkostoĵoj.

*S-ano Ingen, Rotterdam.* Dankon por via entuziasma helpo. La administranto de AELA kaj Literatura

Mondo volonte konatiĝos kun vi ankaŭ persone dum sia prelegvojaĝo, okazonta komence de aŭtono en tiu ĉi jaro.

*Al ĉiuj gratulintoj* ni sendas koregajn dankojn. Ni certe daŭrigos labori kiel vi bone vidas el la plano de 1934. sed ni nepre deziras vian helpon. Montru ĉie Hungaran Antologion, ne forgesu varbadi por AELA. Ja tio estas nun multe pli facile ebla, ĉar la nun aliĝanta membro ricevas por sia kotizo samtempe tri librojn. Por helpi vin, ni publikigas en tiu ĉi numero ankaŭ la enpagejojn por AELA.

*Al la partopagantoj* ni enmetas hodiaŭ enpagilojn por la pagoj farotaj la 1-an de junio kaj 1-an de aŭgusto, ĉar ĝis tiu dato nova sendaĵo ne eliros. Bonvolu bone uzi la enpagilojn.

*W. G. Adams, Seattle kaj aliaj*



*membroj pere de BEA.* Ni ricevis bone vian karton, sed ni ne povas sendi al vi trian libron, ĉar laŭ nia interkonsento membroj tra BEA ricevas por sia pagita kotizo nur la kvin novajn librojn. Bonvolu atenti, ke vi pagis laŭ tia prospekto.

*S-ano Mócsi, Rumanujo.* Pro la ŝanĝo de la 2-a kaj 4-a libroj, vi nun ne ricevas libron. Tuj post kiam vi pagas la sekvan parton, ni sendos al vi ETERNA BUKEDO-n kaj la kvara parto jam estas pagita.

*At la membroj, jam ricevintaj duan kaj trian librojn* ni sendas la bibliografian gazeton aparte.

*H. Seppik, Oslo* Kompreneble ni akceptas novajn membrojn ankaŭ nun ĝis la 1-a de novembro. Kotizo

plialtiĝis al 17.— frankoj, aliaj sumoj restis senŝanĝaj.

*Niaj hispanaj membroj* rajtas al ni pagi por ĉio per internaciaj poŝtaj respondkuponoj, kiujn ni akceptas en la valoro de 0.30 svisaj frankoj. Nialkalkule tiu maniero estas por ili la plej profitiga por pagi kion ajn al eksterlando. Se ili ne povas tion apliki, bonvole sendu poŝtmandatojn al Postscheckamt Berlin NW. Konto nr. 138084, Wilhelm Bleier.

*Niaj japanaj abonantoj* bonvolu atente legi la kondiĉojn kaj konsilojn por hispanaj membroj, ĉar ankaŭ por ili validas la samaj.

*Niaj ĉinaj membroj* same bonvolu legi la hispanan informon.

**N**  
**NE FORGESU:**



**Limdato de baloto:**  
**15-a de julio**  
POR EKSTEREŬROPANOJ  
**1-a de aŭgusto**



## NE MALĜPARU

sendante monon por menditaj  
libroj, gazetoj U Z U la subajn  
kontojn de

### Pocztowa Kasa Oszczednosci, Warszawa

surskribante NEPRE sur ĉiun en-  
pagilon la tekston: Na konto  
Administracja Literatura Mondo  
Krakow Numero 403,148

Aŭstrio: WIEN	---	No 79.50
Belgujo: BRUXELLES	---	No 244.209
Ĉeĥoslovakio: PRAHA	---	No 89.600
Danujo: KJÖBENHAVN	---	No 14.972
Francujo: PARIS	---	No 600.12
Nederlando: s' GRAVEN- HAGE	---	No 145.510
Jugoslavujo: BEOGRAD	---	No 65 049
Latvujo: RIGA	---	No 4.030
Svislando: BERN	---	No III.6.500
Svedujo: STOCKHOLM	---	No 4.312
Italujo: ROMA	---	No 1/10110

En aliaj landoj:

Germanujo: Wilhelm Bleier, BERLIN	---	No 138.084
Hungarujo: Bleier Vil- mos, BUDAPEST	---	No 25.168
Polujo: Administracja Li- teratura Mondo, Krakow	---	No 403.148

(Poŝtĉekkonto-posedantoj sendu ĝirojn  
nur al nia pola poŝtĉekkonto en Kra-  
kóv.) — El la landoj, ne menciitaj  
supre oni sendu poŝtmandatojn al

Postscheckamt Berlin,

Konto nr. Wilhelm Bleier 138.084

Ĉiuspecajn pagojn akceptas ankaŭ niaj  
reprezentantoj kaj la esperantistaj  
librovendistoj.

## Tutan bibliotekon

el  
11.000

diversaj malnovaj kaj novaj  
gazetoj esperantaj, inter ili multaj  
plenaj jarkolektoj de jam nehav-  
eblaj kaj malaperintaj

Kelkcent

uzitaj libroj, gvidlibroj, prospektoj

ĵus venis en nian posedon. Ni vendas  
la gazetojn popece, aŭ po jar-  
kolektoj, la librojn uzitajn por tre  
favora prezo.

Petu grandan kaj detalan liston  
kiun ni sendas al vi prunte  
post ricevo de 1 respondkupono.

Ni vendas ĉion

al la plejmulte oferanto kaj  
rezervas nenion speciale por iu ajn.



Du ekzemplerojn de

## LITERATURA MONDO

por unu respondkupono

ni liveras al ĉiu abonanto kaj AELA  
ano varbcele, el diversaj numeroj  
de 1931 kaj 1932.



Plej taŭga

materiale por ekspozicioj,  
por propagando.



Mendante

pli ol dek ekzemplerojn,  
ni donas 20% malplikoste.



# Balotilo

por la eldonaĵoj de Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj en 1934.

## Mi deziras, ke estu eldonataj

	Kalkulenda paĝonombro
1. Ĉeĥoslovaka Antologio .. .. .	650
2. Franz Werfel: Abiturienta renkontiĝo .. .. .	220
3. Stefan Zweig: Āmok .. .. .	88
4. Andrée Gide: Pastoral .. .. .	88
5. Sinclair Louis: Dr. Arrowsmith .. .. .	900
6. Aŭgust Gailit: Toomas Nippernaadi .. .. .	500
7. Jeluŝiĉ: Cezar .. .. .	500
8. Ĵun-Iĉiroo Tanizaki: Printempo furiozas .. .. .	140
9. Francisko Kőrmeni: Budapesta Aventuro .. .. .	600
10. Antoni Slominski: Mia vojaĝo en Sovetio .. .. .	160
11. Leo Belmont: La homo, pri kiu la mondo ridas .. .. .	250
12. Leo Belmont: Messalina .. .. .	800
13. Antal Hekler: Arthistorio I. .. .. .	320
14. Antal Hekler: Arthistorio II. .. .. .	270
15. Stellan Engholm romano .. .. .	125
16. Izrael Lejzerovicz: El la verda Biblio .. .. .	140
17. Skizoj de J. Ŝapiro, kun karikaturoj .. .. .	100
18. Francisko Szilágyi romano .. .. .	200
19. H. Weinhengst romano .. .. .	200

Balotinto: Nomo .....

Lando ..... Urbo .....

La verkojn elektitajn bonvolu **s u b s t r e k i**.  
Krom viaj nomo kaj loĝejo skribu nenion sur la balotilon.



## **SCIINDAĴOJ PRI LA BALOTILO**

*por la libroj de Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj en 1934-a jaro.*

1) Rajtas baloti ĉiu membro, kiu pagis la ĉijaran aŭ venont-jaran kotizon ĝis la 1-a de julio plej malfrue.

2) La balotfolioj devas alveni el Eŭropo kaj Nord-Ameriko plej malfrue ĝis 15-a de julio 1933. el aliaj landoj ĝis 1-a de aŭgusto 1933. Pli malfrue alvenontajn balotfoliojn ni devos flankenmeti sen konsidero.


3) Ĉiu membro rajtas indiki librojn laŭ la dorsflanka kalkulo de paĝonombro ĝis 2000—2200 paĝoj.

4) Se nenio kroma estas surskribata aŭ kunsendata kun la balotfolio, ĝi estas enmetebla en simplan koverton kaj sendebla al ni kiel presajo. Se oni sendas presajon, la koverto ne estas gluebla! Balotfoliojn alvenantajn al ni kun punmarko, ni rifuzos.

5) Se iu ne volas eltranĉi ĉi tiun parton el sia gazeto, rajtas sendi ankaŭ simplan karton kun la listo de la libroj elektitaj.

*Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj*  
(Literatura Mondo)

Hungarujo, Budapest, IX., Mester ucca 53, V. 7





# BIBLIOGRAFIA GAZETO

Redakcio kaj administracio  
Hungarujo, Budapeŝt, IX.,  
Mester ucca 53, V. 7. —  
Telefonnumero: 380-84

REDAKTAS:  
K. KALOCSAY

Senpaga por abonantoj al  
Literatura Mondo kaj anoj  
de AELA. — Aparta abono  
1.80 svisaj frankoj porjaro

## Revuo de Revuoj

En la lasta revuo ni parolis pri novaperinta scienca gazeto eldonata en Francio, kaj jen denove nin surprizas la francoj per interesa, kvankam tute alispeca eldonaĵo: *La Pirato*, kajeroj por satiro, humoro kaj libereco... relativa. Sipestro: *Raymond Schwartz*. Foje mi jam diris ie, ke recenzi Schwartz estas senespera entrepreno, ĉar ĉiu atributo efikas anemie apud lia viv-suka prahumoro, do ankaŭ nun ni konatigas lian gazeton per citoj. Unue la artikol-titoloj: »Multe da bruo... pro vosto de fazano!« »Ping Baghy! Pong Kalocsay!« »Esperanto kaj Nudismo«, »Jozefo R. Scherer, speciala sendito de I. C. K. vizitis la planedon Mars!!!«, »El Germanujo«, »Inter kaktaj kaj narcisoj«, »Hura... hura! Granda venko!«, »La Jozefoj en Japanujo«, »Monduma klaĉejo«, »Preseraro«. La Pirato rimarkis, ke poemon, kiu aperis en L. M. oni povas legi ankaŭ komenkante ĉe la fino: nu, escepte la du unuajn liniojn de la dua strofo ĝi pravas, sed estas notinde, ke en la sama rubriko de la Pirato mi trovas poemon de Joseph Nels, kies pluraj strofoj legeblas sammaniere, ekzemple jen la lasta strofo:

»Kaj kvankam la animon disŝiras sufero  
Kvankam ne plu ekzistas por mi la espero  
Mi vivas ĉiam por vi, ho sankta Mistero«

Inter la devizoj de la Pirato mi legas: »Popolo, kiu ne kuraĝas moki pri si mem, ne estas matura.« Nu, mi ne estas fakulo pri profeteco, tamen mi certas, ke la esp-a popolo pruvos sian maturecon en tia mezuro, ke en Parizo ne troviĝos sufiĉa papero por presi Piratojn. La supra averto, verŝajne parolas al tiuj grandaj infanoj, kies trosutilaj nervoj ankoraŭ ne toleras kritikon aŭ ŝercon...

Ankaŭ en Japanio aperis novaĵo: *Esperanta Literaturo*, organo de Japana Societo de Esperanta Literaturo. Ĝian dulingvecon mi ne komprenas, evidente ĝi estas verkata por tiuj, kiuj interesiĝas pri la esp-a literaturo, do por tiuj, kiuj la lingvon jam devas koni tiom, ke ili povu kompreni gazeton pure esp-lingvan. En la japanlingvaj tekstoj troviĝas foje-foje latinlitere skribitaj nomoj, esp-aj vortoj. Tia artikolo povas servi al eŭropano kiel amuza societa ludo: oni skribas la legeblajn vortojn unu apud la alia kaj ĉiu serĉas la sencon de la artikolo. Provu! — Cetere mi trovas la ekirigon de tia revuo tre serioza entrepreno kaj la eksvarmon de literatur-



kapablaj japanaj samideanoj tre ĝojiga fenomeno. Kun interesiĝo mi legis la artikolon de Mijake-Sihej pri la Direkto de la Literaturo Esperanta. Li ne parolas pri la nuna, sed pri la »ebla kaj enda belliteraturo esperanta kreota sole de verkistoj kun plej alta intelekto, kiuj vere vivas esperanton.« Nu, en ĉi tiu artikolo abundas la ideoj, kiuj — kvankam foje-foje kuri-ozaj, eĉ strangaspektaj — tamen estas ĉiam interesovekaj, ĉar diferencaj de samtemaj artikoloj. La entuziasma aŭtoro tamen devus rekoni, ke la atingenda grandioza esp-a literaturo jam nun bezonas tiajn konstruant-ojn, kiuj jam nun celas la akiron de senriproĉa stilo. En la artikolo mi trovis jenan frazon: »Ĝi staras ne inter la naciaj literaturoj«. Tia stila eraro tre ĝenas en tiel altenklopoda programo. Frazo, kiel: »La esperanta literaturo, antaŭ ĉio, havas siajn karakterizajn trajtojn«: faras ridindan efikon per sia malplena nenidiro. Mi ne povas kontraŭstari la tenton, ke mi citu la plej strangan penson de la aŭtoro: »Novelo kaj teatraĵo en la esperanta literaturo temas pri homoj kun alta intelekto. Neniam pri senindaj homoj, vivantaj kiel animaloj.«

Alia novaĵo aperis en Berlino, en la eldono kaj redaktado de s-ro Ellersiek, ĝi titoliĝas: *Esperanta Roman-Gazeto*. Ĝi aperos duonmonate kaj publikigos en daŭrigoj romanojn. La serio komencas romano de Walter Galdert, ĝia titolo: Trifoje akurate je la 12-a horo. Ĝia speco laŭ la tradukinto (Ellersiek): »fantaste-realisma kriminal-romano.« Saĝnas al mi, (kvankam mi ne volas juĝi jam ĉe la unua numero), ke la serio ne multe kontaktiĝos kun la vera literaturo. Cetere mi ne vidas rozkolore la estonton de ĉi tiu entrepreno: mi mem ne emus legi kriminal-romanon, kies daŭ-rigojn mi ricevus en dusemajnaj intervaloj. Sed povas esti, ke mi eraras kaj ke troviĝos abonantoj sufiĉaj por vivteni ĉi tiun gazeton.

Sed mi babilis tiom multe pri la novaj eldonaĵoj, ke mi ne plu havas lokon por daŭrigi la observadon pri pli aĝaj revuoj. Nu, la sekvan fojon; nun ankoraŭ mi volas eĥi al du eĥoj de ĉi tiu rubriko. Do: I. En Suda Stelo s-ro Stefanĉiĉ tre koleras min pro vortoj, iom forte riproĉaj, pri la radiko »sme«, uzata de niaj jugoslavaj samideanoj. Nu, mia celo estis nur esprimi mian dubon, ĉu estas nepre necese, ke oni ekuzu la vorton »smei« por esprimi ekzemple nuancon de tio (mi uzas ia ekzemplon de s-ro Stefanĉiĉ) ke »mi rajtas fumi«, aŭ »al mi licas fumi«, aŭ simple »licas fumi«, aŭ »estas permesate fumi«, aŭ »estas tolerate fumi«! Tia singardemo kontraŭ ne tre necesa evoluigo de la lingvo estas ja konsilinda nuntempe, kiam la ortodoksuloj kontestas eĉ la plej elementan evolu-raĵton de nia poezia lingvo. Do kial la kolero?

II. En la unua numero de la B. G. mi skribis en mia R. de R. pri la Oomoto Internacia malicetan rimarkon, kiu saĝne vekis tie egan indignon. Precipe mi indignigis per la rimarko, ke en la O. I. troviĝas »tre lertaj alvokoj por mona subteno (kaŝitaj eĉ en kondolenco)«. Nu, estas vere, ke en la raporto pri la morto de S-ino Marcelle Tiard (julio 1932 pĝ 2) estas legeble, ke ŝi »helpis por ĉiujaraj brikoj al nia projekto pri konstruo de la Domo de Homamo«, sed aliflanke, mi nun konstatas, ke pli supre estas skribite ankaŭ, ke ŝi abonadis ĉiujare plurajn esp-ajn gazetojn. Do mi revokas mian malicetan rimarkon kaj diras nur, ke laŭ mia sento tiaj materialaĵoj en kondolenco estas iom nekonvenaj. Sed estas eble, ke mi estas tro malreala homo.



## R e c e n z o

FELIX TIMMERMANS: PALLIETER. El la flandra tradukis: Jan van Schoor. 192 paĝoj. Eldonejo: W. J. Thieme & Cie. Zutphen.

La recenzanto iom embarasite starus antaŭ ĉi tiu verko, se li volus ĝin meti en iun el la skatoloj ekipitaj per la ŝablonaj vinjetoj: romano, novelo, lirika poemo, epopeo k. c. Pallieter oni ne povas enskatoligi, kiel estus neeble enkarcerigi la vivon: Pallieter ja estas la vivo mem! Ĝia fabelomaterialo estas minimuma: estas donitaj la ĉefheroo, Pallieter, juna viro, bienulo, kulturita, kun arda amo al la naturo, la fianĉino, poste edzino, la servistino, la pastro, la pentristo, la vilaĝanoj: kaj ankoraŭ estas donitaj la kampo, la aero, la rivero, la pluvo, la oro de l' suno, la neĝo, kaj ankoraŭ la dolĉo de l' mielo kaj la dolĉo de l' kiso, la amara freŝo de l' biero kaj la febra ĝojo de l' karna volupto, estas donitaj la tero kaj la vivo. Jen la elementoj, el kiuj la verkisto komponis sian libron. La tempodaŭro, kiu kadras la temon, apenaŭ superas unu jaron: la libro komenciĝas kun la interkonatiĝo de Pallieter kaj Marinjo kaj finiĝas kun la ekmigro de la juna paro post la unua akuŝo. Sed efektive ĝi havas nek komencon, nek finon: la eterna pulsado de l' ekzisto tamburas en ĝi sian ĝojebrian ritmadon kaj Pallieter, »la melkanto de la tagoj«, estas nur ĝia pormomenta konsciĝo...

La libro abundas de belegaj priskriboj, impetaj hosanoj al la naturo kaj tamen la leganto ne timu, ke li renkontos tiel nomitan *poemon en prozo*, artspecon multe favoratan de niaj esp-istaj verkemuloj kaj multe malfavoratan de nia publiko (ni konfesu, ke ne senmotive): el la danĝero de sensanga naturoratorado la libron savis ĝia sukoriĉa, imagiva lingvo kaj la realista fantazio de l' aŭtoro.

Por gustumado mi volis citi el la plej belaj partoj de la libro, sed tiaj troviĝas tiel abunde, ke mi povus plenigi per ili la tutan B. G. Do sekvu nur kelkaj, tute hazarde elektitaj:

»Ĉiuflanke la bonvola tero oferis denove sian tutan trezoron da floroj, plantoj, pizoj, karotoj kaj ĉiuspecaj fruktoj; kaj ĉiuspecaj bestoj, kiuj naskiĝis, dum aliaj pariĝis kaj la aero odoris kiel mielo kaj sterkon ŝprucanta ĉaro sorbigitis la teron. Tio estas la vivo: sencese doni kaj parigi kaj antaŭ kiam aĵo jam vidis la tagon, alia estas jam farata. Tiel ĉiam la ciklo daŭradas kaj unu aĵo cedas la lokon al alia kaj, vi staru tie kun la dek fingroj en la hararo aŭ suĉante la dikfingron, la »kialon« vi tamen ne ekscios.«

Jen Marinjo: »En ŝia ruĝvanga vizaĝo perlis du grandaj brunaj okuloj kun vigla nigra pupilo, ŝiaj pomruĝaj lipetoj levigis alte sub la delikatala nazo kaj en ŝia dekstra vango estiĝis kaveto, kiam ŝi ridis. Ŝia mentono dezirante elstaris kaj la laktoblanka kolo estis ronda kaj mola por mordi en ĝin. Ŝiaj junaj, ankoraŭ rektestarantaj mametoj komenciĝis alte kaj ŝiaj koksoj estis rondaj. Ŝi havis malhelbrunajn harojn kaj grasetajn manojn. Ho, kiel bela ŝi estis! Ŝia tuta persono eligis la spiron de la kamparo kaj la juna, ĝoja vivpovo de la granda Naturo. Ŝi staris tie, tiel natura, kiel akvo kaj ŝia vizaĝo estis kvazaŭ malfermita libro. Estis lakto kaj pano. Kaj la suno brilis ruĝe tra la konkaj de ŝiaj oreloj kaj pudris aŭreolan lumon en ŝian hararon. Kaj Pallieter diris: Mankas al vi nur flugiletoj.«

Lasta cito: »Li aŭdis la butergustan lakton plaŭdeti en ŝia kara sto-



mako, ĝi gutis de lia mentono sur lian kolon kaj li diris al la bovino: »Ho promenanta trinkejo, estu dankata!«

La stilo kaj lingvo de la traduko estas tre bonaj. Oni sentas tiun zorgeman, preskaŭ pian amon al la originalo, tiun konscience altan koncepton pri la tradukarto, tiun ardan pasion al esp-a stilo, sen kiuj ne povas naskiĝi valora traduko. Oni sentas: la tradukinto rekonis, ke la esp-a prozo havas sian propran ritmon, sian propran pulsadon, sen kiu ritmo traduko povas esti science ekzakta laboraĵo, sed neniam vivanta trezoro de nia lingvo... Estas nur bedaŭrinde, ke la nivelo de la traduko ne estas egale ekvilibrita: estas en ĝi rompoj, abruptaj faloj, parazitaj rudimentoj el antaŭa tradukmaniero de nia literaturo. Tio estas bedaŭrinda tiom pli, ĉar la forigo de tiuj makuletoj kostus nemulte da laboro. Jen: *je* plimultas ol estus bezone, la monstro: »belbrilegeco« konsternis min, »Ave Mario«! ĉu la tradukinto vere ne sentis la viran sonoron de ĉi tiu formo? Kial li timas la uzon de »Maria«, kiu cetere troviĝas ankaŭ en la Biblio-traduko? »Enestis sankteco en ĝi«, ĉu ne sonus plibone: »Sankteco estis en ĝi«? »Vaporaĵo« ne signifas vaporŝipon! La P. V. enhavas la formon *kermeso*, kio motivas la uzadon de *kirmeso*? »Kortuŝiga silento« tute ne estas por mi *kortuŝa!* Abundas la malsimplaj verboformoj, sed mi esperas firme, ke per sia stilsento Jan van Schoor rekonos, ke en bona esp-a stilo ili troviĝas nur malofte, en kazo de ekstrema neceso.

Papero, presu tre bonaj.

L. Totsche

SALOM ASCH: LA SORCISTINO EL KASTILIO. (Historia bildo.)

El la juda: I. Lejzerowicz. 148 p. Eldonis: Literatura Mondo, (AELA libroj. II.) Prezo: 3.50 fr. sv. + 10%.

Kiam mi ellegis la antaŭparolon de la tradukinto, mi sciis, ke mi komencos mian recenzon per la aktualeco de la romano, kies medio estas la mezepoko. Sed poste, en unu sido, mi ellegis la romanon de la plej granda judlingva plumartisto kaj absolute mi forgesis ĉion, la freŝajn aktualaĵojn, la dudekan jarcenton, — la literoj ekvivis, koloroj, malgajo, sango, fajro, ekkrioj, preĝmurmuro, mi forgesis la verkiston, la koloron de la librokovrilo, mian ĉambron kaj min mem; iu vivo baraktas inter hodiaŭ kaj la karnavala nokto de la mezepoka Romo, kiam ĉion »lumigis fantaziaj fajroraketoj, versantaj lumon de ĉielarkoj sur la maskitajn domojn kaj monumentojn. Post la maskitulojn sklavoj portadis torĉojn, kiuj per mola lumo, verŝiganta, kiel ruĝvino el pokalo, lumigis la fantaziajn maskojn. Grupoj da gajegaj maskuloj lumigadis siajn vojon per fantaziaj veneciaj pergamenaj lanternoj, kiuj en la lumo ŝanĝiĝis en mistikajn ombrobildojn... La stratoj de Romo envolviĝis en ŝvebantajn parfumitajn nubetojn, levigantajn el la torĉoj de l' maskitoj. El la drinkejo fluis peza lumo...« Ĉu ankaŭ vi, kiu nun legas tiun ĉi artikoleon, ĉu ankaŭ vi sentas, kiel nerezistible flugigas la arto en pasintan epokon, ĉu vi vidas la »pezan« lumon de la drinkejo? Min frapis tiu ĉi, trafe uzita esprimo, sed ne kiam mi senspire legis la romanon, sed kiam mi relegis, kiel profesiulo. Kaj S. Asch speciale kaptas la leganton. Dum vi legas, vi ne povas rimarki, kial, por kiu celo naskiĝis la romano, vi iras, kien la verkisto volas vin irigi kaj vi vivas en la inkvizicia Romo, ĉar li volas tion. Kiam vi nubhumore fermas la libron, super kiu ŝvebas la martir-spirito de la bruligita junulino, nur tiam vi rekonsciiĝas kaj eksentas la fumodoron de la modernaj aŭtodafeoj, nur tiam vi malkaŝas la sekreton de la poeta animo.



Ni devas jubili pro la apero de tiu ĉi libro en nia libraro kaj ni devas konstati, ke la traduko estas tiel bela, ke en la Esp. literaturhistorio oni povos citi inter malmultaj, tiun ĉi verkon, kiel modelon de la tradukarto. Tamen mi devis rimarki, ke la tradukinto tro ŝatas la uzadon de la — cetere bona vorteto — *ekde*, ofte anstataŭ *de* kaj estas lokoj, kie la oftaj »ekde«-oj elstaras el la mola lingvo, kiel surprizaj konstruaĵoj en la trankvila naturo. Inter la neologismoj mi vidis la vorton: »povra«, kion mi — precipe — en proza lingvo opinias superflua. Ni ja havas »kompatinda« kaj se tiu vorto jam vivas en la lingvo de jardekoj kun konvena senco, nenio povas motivi la uzadon de nova vorto. Eĉ en la poezio, laŭ mia opinio, ne estas motivita la uzado de tiu ĉi vorto. Mi konfesas, ke mi mem estas *por* la neologismoj kaj ne povas kriadi la popularan devizon: for la neologismojn! Sed la neologismemo devas havi ian severe kontrolitan principon, kiun mi konceptas jene: Esperanto devas esprimi ĉiun nuancon, kiun la naciaj lingvoj povas esprimi; por la intereso de tiu celo oni devas krei novajn vortojn, se ne ekzistas ankoraŭ konvena Esperanta vorto, sed en mala okazo neniu vidpunkto povas motivi la enkondukon de nova radiko. Sola escepto estas la konstante *miskomprenita* vorto »malfermi,« kie la originala radiko signifas la negativan formon kaj la mal-vorto la pozitivan agon. La vorto: »aperti« estas urĝa.

Sed mi devojĝis kaj mi ripetas nun: inda traduko de belega verko!  
Szilágyi

CARLO GOLDONI: KURIOZA OKAZAJO. Triakta komedio. El la itala tradukis Mevo. Eldonis L' Esperanto, Torino. Havebla ĉe Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Eman. 92. Milano; 64 pĝ.; prezo: sv. fr. 1.50.

Goldoni estas granda figuro de la teatra verkarto; li estis kiua italan teatron liberigis de la troigoj de l' histrionoj kaj donis plene verkitan teatropicon al la aktoroj, insistante ke ili sin tenu severe al la skribita teksto. Tiel la puran komikon de l' vivo li savis de la senbrida amuzemo de l' aktoroj kaj ankaŭ de troromantikeco kaj neverŝajneco de la tiamaj italaj modaj teatraĵoj. Sed, krom ĉi tiu literaturhistoria signifo, li havas ankaŭ sentempajn valorojn: liaj teatraĵoj prezentas la realan vivon, kaj kiel ajn ili estas veneciaj kaj 18-jarcentaj plejparte, tamen en sia profundo ili spegulas la homojn de ĉiuj tempoj kaj landoj.

La »Kurioza Okazajo« estas unu el liaj plej ĉarmaj komedioj. La patro, kiu volas superruzi alian patron, edziniĝi ties filinon kontraŭ ties volo, kaj kiu per tio mem preparas sian propran trompiĝon, ĉar lia filino edziniĝas laŭ lia propra recepto — estas bonege pripentrita figuro. La tuta komedio estas mirinde viva kaj majstre lerta: ĝia lego certe bonege amuzos ĉiun leganton.

La tradukon de la komedio faris sinjoro Mevo en bona Esperanto. Sed estas interese, ke lia enkonduka noto, verkita tre vive kaj verve, prezentas tamen pli grandan lingvan plezuron ol la traduko mem: nova pruvo, ke traduki estas pli malfacile ol verki originale. Vere, ĉe traduko oni devas konstante batali kontraŭ la lingvo, el kiu oni tradukas; oni devas konstante peni por sin liberigi de ĝia ĉirkaŭpreno. Kaj ĉi tiu ĉirkaŭpreno ne estas malforta: la lingvo, ja estas *patrina*.

Tiel povas esti, ke, dum en la enkonduka noto eĉ per lupeo mi ne povus malkovri riproĉindajon, en la traduko de la komedio mem mi trovis tian preskaŭ ĉiutage. Jen, mi montros ilin:



Laŭ estas prepozicio, kaj estas tute senprecedence ĝin uzi kiel konjunkcion: *laŭ mi vidas* anst. *kiel mi vidas*. Stranga frazo: *mi ne havas da ĝi* (*da ĝi* estas tute superflua). Nekutima kaj nekonsilinda uzo: *vi min diras* anst. *vi al mi diras*; precipe strange efikas: *kiu min diras ĉion* (duobla akuzativo!). *Haltadi* signifas plurfoje halti kaj ekiri; ĉi tie necesas *resti*. Malĝustas *lin ekbrulas* (mankas *ig*). *Fido* ŝajnas erare uzita anst. *fidelo* aŭ *fidindo*. Enigma ŝajnas *vespiro* (ĝemspiro aŭ suspiro). En *ekkomencas pleonasmas estas ek*. Nebona estas: *nek mi volas plu aŭdi* anst. *mi eĉ ne volas plu aŭdi*. En la frazo: *mi ŝatus, ke vi min komprenas* oni devas diri: *komprenu*; krome anst. *mi ŝatus mi preferas mi volus*. Kial *ŝurmomente*? *Kontrabando* ne signifas kontrabandistan *bandon*. Apenaŭ komprenebla estas: »*La farito ne havas rimedon*« (Pri farita ago oni ne povas helpi). Poste la vortsekvio! »*Ne*« staras ne antaŭ la vorto, kiun ĝi neas. Same »*ankaŭ*«; ekzemple »*ke vi ankaŭ al mi inklinas*« signifas: »*ke vi inklinas* (krom al aliaj) ankaŭ al mi«, kvankam la originalo diras: »*ke ankaŭ vi inklinas al mi*« — rekta kontraŭsenko! »*Ne certe*« staras anstataŭ »*certe ne*«, kvankam inter ilia senco estas ega diferenco! Poste mi ne povas aprobi tiajn frazojn: »*scias nenion, mi*« »*sed mia patro, ĉu konas ke...*« Stranga formo estas »*mankante je*« anst. »*ĉe manko de*« aŭ »*ne havante*; malhavante.«

Mi ne povas aprobi la apostrofadon en »*sinjor' patro*, ĉar tiel apudigis du plenaj akcentoj, netolereblaj en Esperanto.

La vorto »*insolenta*« (ofende malrespekta), ne troviĝas en la vortklarigoj fine de la libro.

Jen ĉiuj miaj rimarkoj pri la lingvaĵo de la libro; mi listigis ĉi tiujn peketojn por averti kontraŭ ilia imito la italajn samideanojn, kiujn ili certe same tentos, kiel la eminentan tradukinton. Sed ili ne ĝenas en la ĝuado de la amuza komedio, kiun mi sincere rekomendas al ĉiuj volantaj havi kelkajn vere gajajn horojn.

Kopar.

*Fri*  
BARELULOJ KAJ FADENULOJ. Elfranca traduko de »moderna fabelo por ge(mal)junuloj«; *Patapoufs et Filifers* (de André Maurois). Tradukis: Berno Fabo. Ilustris: Jan Ermers. Eldonejo: Esperanto Instituto »Merkurio« Scheveningen P. B. 3o. 14×20 em, 104 paĝoj. Prezo fl. 1.20.

La verajn vivkapablon kaj vivrajton de »artefarita« lingvo markas plej bone: ĉu humorajo efikas en ĝi nacilingve? Mi akceptas tial sukcespromesan pruvon pri tio ĉiam kun granda ĝojo kaj kor-molo nekonvena al recenzisto.

La libro de *Maurois*, rakontita por infanoj kaj direktita al granduloj estas ĉarma ekzemplo de la senmalica ironio. Mi ne rakontas ĝian enhavon: oni devas ĝin legi.

La traduko? Nu, ĝi neniel detruas la efikon de la simple, sen stilaĵaj pretendoj rakontita kaj mirinde eksterordinara, sed tamen tiel vera kaj vulgara historio. Sed aliparte ĝi tute ne havas »trovaĵojn«, kiujn mia supre karakterizita recenzista emo akceptus kun laŭtaj hosanoj.

La stilo estas klara (eble eĉ tro). Komencantaj tradukantoj emas troprecizigi kaj per tio ofte rikoltas konfuzon. Ekzemple *serĉelekti*, *sci-kono* tute ne estas pli klaraj ol la simplaj *elserĉi* kaj *kono*. Kaj mi iom cerbumis pri la neologismo *skupuŝo*, ĝis mi rekonis, ke ĝi estas *sku-puŝo*. *Maleminenta* estas tute abomena vorto. Same oni povus diri *malkolosa* aŭ



*malgiganto. Turmentetema; imitithomaj pupetoj; traeltenis* — jen kelkaj ekzempleroj de la »ŝvita stilo«.

*Idiologo* estas simple *idioto*.

La tradukinto ŝajne volas ekstermi el Esperanto la interesan idiotismon kun ĝi. Ĉe li oni *sidigas sin, alproksimiĝas sin, reenseligas sin, enfoleligas* (kial ne: enbrakseĝigas) *sin*. Mi imagas ĉiam, leginte tiajn formojn, ke oni kaptas sin mem ĉe la brusto, kaj perforte iĝas sin mem fari la respektivan movon.

La tradukinto ne konas la interesan uzon de *jen*; alie li ne skribus: »sed tio, kio ŝajnis al li tre stranga« anstataŭ: »sed jen kio ŝajnis...«

Estas konfuzoj ankaŭ pri *ambaŭ*.

Mi legas: »Ni estas irontaj malsupren — li diris ordone.« Ĉu tio estas ordono? Ĉu Esperanto ne havas imperativon? Poste: »neniam ne sin movas« (!); »la reĝo, se ne ke hontante, ne povis akceptaprobi (!); ĉiam finiĝas per plenumo de tio, kion volis lia frato; tiam ĉiam; antaŭ ol komenciĝu; de post longa tempo ktp.

Kial uzi *vi* apud ordona verbo?

Kial *genro* anstataŭ *speco*?

»Ĉu neniun pakajon?« — demandas portisto. Kial akuzativo? Se mi estus portisto, mi demandus: »Ĉu nenia pakajo?«

Ekzistas kelka konfuzo ankaŭ pri *tiu* kaj *tio*. Sed tion klarigi estas la tasko de la lernolibroj.

Samĉe al la lernolibroj apartenas la devo, klarigi la uzon de kondicionalo, futuro kaj imperativo. Ĉi tiuj tri formoj estas preskaŭ ĉiam erare interniksitaĵoj en la libro. Mi kredas, ke la nederlandaj lernolibroj devus speciale pritrakti la uzon de ĉi tiuj formoj, kiu ŝajne estas alia en Esp-o, ol en la nederlanda lingvo.

La preso estas bona, sed preseraroj abundas.

(Kion signifas Esperanta-nederlanda vortaro, enhavanta eĉ fundamentajn vortojn, ĉe la fino de la libro? Ĉu ĝi estas tradukita por nederlandanoj? Se jes, kial ne holande?)

Georgo Karczag

DU FABELOJ de fratoj Grimm. Tradukis A. Degen kaj R. Raüber. Eldonis Heroldo de Esperanto. Pĝ. 24.

Du ĉarmaj, konataj fabeloj de fratoj Grimm, tradukitaj en bona Esperanto, eldonitaj en ĉarm-aspekta, agrable verdkovrila kajero. La paĝoj havas larĝan marĝenon por notoj lingvaj, kio estas tre oportuna por komencantoj. La verketo estas la unua kajero de la Esperanto-janula Biblioteko.

PAUL NEERGAARD: FREMDVORTOJ EN ESPERANTO. La 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko en teorio kaj praktiko. Eldonis: SAT. Eldona fako kooperativa, Parizo. 64 paĝoj. Prezo: 3.60 fr. fr.

La libro tre klare kaj instrue pritraktas la t. n. fremdajn vortojn, tio estas: tiujn internacie uzatajn vortojn, kiuj, laŭ la Fundamento estas uzablaj ankaŭ en Esperanto. La aŭtoro unue difinas la »internaciecon«, esploras ĝin laŭ senco, formo, devenloko. Poste li starigas la postulojn de la lingva boneco kaj eksplikas la principojn aplikeblajn en la elekto de la esp-aj formoj de l' fremdvortoj. Li starigas kvar tiajn principojn: tiujn de vortara ekonomio (oportuno), de internacieco, de koncizo (vorta ekonomio) kaj de laŭreguleco. Poste tre larĝe kaj detale li analizas la uzatajn



fremdvortojn el la vidpunkto de ĉi tiuj principoj. Kaj fine li tiras la konkludojn, ke en la scienca kaj teknika lingvo la postulo de precizo kaj la principo de internacieco ludas pli gravan rolon ol en la popolo lingvo, kie ili devas pli kaj pli cedi al la postuloj de vorta kaj vortara ekonomio kaj de laŭreguleco. Tamen, nuntempe ankoraŭ Esperanto ne povas sin tute sendependigi de la influo de la naciaj lingvoj, nur post la granda disvastiĝo de Esperanto estas eble, ke la lingvo akiru plenan memstarecon, neglektu la internaciecon favore al la reguleco, kaj per la tiel estiĝintaj formoj eble influu ankaŭ la naciajn lingvojn.

Ĉio, kion la aŭtoro diras, estas konsiderinda kaj aprobenda. Ekzemple li estas plene prava, ke la pseudosufiksoj *acio*, *icio* estas simpla balasto en la lingvo, kaj laŭ la ekzemplo de *delegi*, *kontribui*, *rezigni*, *evolui*, oni pli-malpli frue devos oficialigi ankaŭ *abnegi*, *apeli*, *civilizi*, *dekori*, *demonstri*, *erupti*, *konversi*, *erudi*, *navigi*, *spekuli* ktp. Vere, nur tiuj *acio*-formoj estas konservindaj, kiuj havas sendiferencojn al la simpla formo, ekzemple: *operacio-opero*, *projekcio-projekto*, *irigacio-irigo* ktp.

Tre interese pritraktas la aŭtoro la nomojn de sciencoj kaj de iliaj istoj. Ankaŭ mi mem jam plurfoje cerbumis pri ĉi tiu demando kaj nun la libro donas al mi okazon por doni proponon de solvo. Ĉi tiu solvo multe sin apogas al la pritraktoj de l' aŭtoro, sed anstataŭ liaj alternativaj eblaĵoj, mi klopodas doni strikte formulitan sistemon.

La ĉefa difekto estas la literkompleksoj *ikisto* kaj *isto*. Ĉi tiujn do oni devus iel eviti, tamen tiel, ke oni ne peku kontraŭ la internacieco de la formoj kaj ke oni ne ricevu vortstumpojn nerekonoblaĵojn.

Pri *ikisto* oni povus procedi jene:

1. Se eble, forlasi *ik* por ricevi la iston. Tia procedo estas ebla ĉe: retoriko-retoro, estetiko-esteto, skolastiko-skolasto, gimnastiko-gimnasto, beletristiko-beletristo, mimiko-mimo.

2. Kuntiri *ikisto* en *isto*, do simple forlasi *ik* antaŭ *isto*. Sed ankaŭ ĉi tiu procedo ne estas ĉiam aplikebla, ekzemple en *etisto* certe neniu rekonos la vorton *etikisto*. Oni povus do starigi la regulon, ke la forlaso de *ik* estas ebla nur, se la trunko antaŭ *ik* estas almenaŭ *ausilaba*. Tiel oni havus: mekaniko-mekanisto, botaniko-botanisto, eŭgeniko-eŭgenisto, numismatiko-numismatisto, didaktiko-didaktisto, eklektiko-eklektisto, terapeŭtiko-terapeŭtisto, kosmetiko-kosmetisto, matematiko-matematisto, gramatiko-gramatisto, politiko-politisto, romantiko-romantisto ktp.

(Ĉi tiu procedo ne estas senekzempla: la saman oni faras ankaŭ ĉe *ism*, kiel montras: faŝismo-faŝisto, pesimismo-pesimisto, egoismo-egoisto, feminismo-feministo ktp.)

3. Laŭ la regulo sub 2. restus senŝanĝaj: fiziko-fizikisto, optiko-optikisto, etiko-etikisto, tekniko-teknikisto, grafiko-grafikisto, muziko-muzikisto ktp.

Pri *isto* oni povus procedi sammaniere:

1. forlasi *i* por ricevi la iston. Tiu procedo estas ebla ĉe la vortoj finiĝantaj per *logio*, *grafio*, *nomio*, *zofio*. Do ni havus: anatomo, agronomo, gastronomo, filologo, etnografo, filozofo ktp. Solaj esceptoj estus: *fonografo*, *telegrafo*, *kinematografo*, kiuj signifas *ilon*. *Fotografo* povus tute bone signifi *iston*, ĉar ni ja diras fotografado, fotografajo, fotografio, do *fotografo* havas nenian funkcion, kaj *fotografi* povas esti devenigita el *fotografo*, same kiel *filozofi* el *filozofo*.

Krome ni havus: rapsodio-rapsodo, magio-mago, pedagogio-pedagogo,



demagogio-demagogo, dramaturgio-dramaturgo, kirurgio-kirurgo, oligarkio-oligarko, monarkio-monarko, filantropio-filantropo, mizantropio-mizantropo, diplomatio-diplomato, aristokratio-aristokrato, demokratio-demokrato, aŭtokratio-aŭtokrato, burokratio-burokrato, homeopatio-homeopato, alopatio-alopato, pederastio-pederasto, psikiatrio-psikiatro, pediatrio-pediatro, geometrio-geometro.

2. Kuntiri *iisto* en *isto*, do simple forlasi *i* antaŭ *isto*, kiel ni havas jam anarkio-anarkisto-anarkismo.

Tiaj vortoj estus: operacio-operacisto, arbitracio-arbitracisto, spekulacio-spekulacisto, inkvizicio-inkvizicisto, kiromancio-kiromancisto, tragedio-tragedisto, komedio-komedisto, parodio-parodisto, elegio-elegisto, strategio-strategisto, hemio-hemisto-hemismo, alhemio-alhemisto, filatelio-filatelisto, evangelio-evangelisto.

Certe iom malsimpla sistemo, sed almenaŭ sistemo anstataŭ la nuna sensistemeco, kiam oni povas diri *geologo*, *filologo*, *astronomo*, sed oni devas diri *biologiisto*, *mineralogiisto*, *anatomiiŝto*.

Kaj aliflanke, akceptante la suprajn regulojn, oni gajnas en la vortara ekonomio, ĉar la diversaj formoj ne estos plu formoj memstaraj, sed ili estos devenigeblaj unu el la alia, eĉ se per malsimplaj, sed tamen klare formulitaj reguloj.

Sed mia celo propre ne estis tiel enprofundiĝi en la temo, mi do finas, dirante, ke la libro estas certe utila kaj oni povas ĝin legi kun intereso kaj gajno de mensa profito.

K. Kalocsay.

DRO BRIQUET: ESPERANTA TEKNIKA MEDICINA VORTARO. Eldonis Internacia Medicina Revuo. 1932. Bruxelles, 359 paĝoj. Formato 16×11. Prezo 2.— dolaroj + 10%.

Esperanto estas interkomunikilo de diversgentaj kaj diversfakaj homoj. La ĉiutaga kaj literatura lingvoj bezonas aliajn vortojn ol la fakliteraturo. En Esperanto la unua kategorio jam havas konstruitan bazon, sed la fakliteraturo iradas ankoraŭ en infanŝuoj kaj la apero de tiu ĉi vortaro estis grava paŝo antaŭen.

La tasko de samideano Briquet estis tre malfacila kaj li brile solvis ĝin. La medicina faklingvo estas tre sovaĝa. Ekzistas multaj esprimoj por la sama afero; elekti la taŭgan estas malfacile. En la Veraxvortaro ni trovas *abdukcio*, *abduktoro* kaj *adukcio*, *aduktoro*. Briquet tre saĝe aliminis la duoblan radikon kaj enkondukis *abdukt-i*, *-o*, *-oro* kaj *adukt-i*, *-o*, *-oro*.

Mi devas riproĉi, ke multaj fakvortoj mankas (abakacio, ablespio, ablesfario, abrazio, absoluta, absorbi, abulio, akologio, adenologio, adjuvanta, afrazio, — logio, ktp.), ĉefe odontologiaj esprimoj (ortodoncio, odontologio, kaŭĉukplato, trikrezolformalino eŭgenolo, ponto), kion mi klarigas per tio, ke escepte de Hungarujo kaj Italujo, kie la kuracistoj post la universitata studo elektas kiel specialan fakon la odontologion, la dentistoj de ĉiuj aliaj landoj absolvas tute apartan ĉeflernejon kaj tial ilia fako ne estas rigardata kiel ekvalenta kun la aliaj medicinaj fakoj. Tial ankaŭ mi difinas la vortojn: *dentkuracisto* = kuracisto kiu havas la specialan fakon de dentologio; *dentisto* = kiu havas la profesion de dentkuracado; *dentteknikisto* = teknikisto, kiu faras artajn dentojn.

En la vortaro ne mankas ankaŭ superfluaĵoj vortoj, kiel, *adipsio* (sensoifeco), *aferanta* (alkonduka kaj ne afer-anta), *agregi* (amasigi)

Oni trovas ankaŭ erarojn. *Ablacio* de retino ne estas fortranĉo sed



forleviĝo de la retino. *Teksaĵo* por *histo* estas malkonvena, ĉu *histologio* estas *teksajologio*? *Afrodizi* sufiĉus por *afrodizii*. *Ajnhumo* (ainhum, ainum) aspektas tre strange.

Oni povus ankoraŭ daŭrigi la liston, sed la devo de la kritikisto estas nur montri la ĝustan direkton. Tiu ĉi vortaro estas la plibonigo de la provvortaro kiu aperis en Internacia Medicina Revuo. Kaj la espereble baldaŭ aperonta dua eldono kredeble estos jam ideala. Ke fakvortaro estu senerara kaj senmanka, por tio necesas, ke multaj helpu al la kompilanto. Kaj tiu ĉi vortaro meritas tion.

J. Takács.

MODERNA ESPERANTO-JAPANA VORTARO. Kompilis: *Yoshi H. Ishiguro*. Formato: 9 14.5 cm. 508 paĝoj. Eldonis Taiyodo, Tokio. Ĉefdeponejo: Kokusaigo-kenkjuŝo 784, Setagaya-Nakahara, Tokio. Prezo: sv. fr. 4.5.

Jen, vere la plej kompleta vortaro, enhavanta krom la oficialaj vortoj ne nur la vortojn de la Plena Vortaro, sed, en aldono, ĉiujn vortojn renkonteblajn en diversaj vortaroj, en la Parnasa Gvidlibro, en revuoj kaj gazetoj. Oni vere povas diri, ke ĝi estas verko «freŝdata», kaj ĝia posedanto certe ne embarasiĝos antaŭ teksto eĉ plej ekstreme neologa.

Oni povus eble kritiki, ke la truoj sur la kriblilo de la kompilinto estis iom tro grandaj kaj translasis vortojn, kiuj estas ŝanĝoj de vortoj fundamentaj (ekzemple *sukro* anstataŭ *sukero* ktp.), do kiuj estas ne nur ne rekomendindaj, sed rekte ekstermendaj. Speciale tiu *sukro* (kaj kelkaj similaj) estas kondamnindaj; ili estas kontraŭaj ankaŭ al la lingva evoluo, ĉar neniam vortoj povas tiel ŝanĝiĝi, ke ili perdas *accentitan* silabon.

Sed aliparte, la kompilinto povas diri, ke li ne volis kritiki, nur kolekti: lia celo estis, ke li donu ĉiun vorton, bonan aŭ malbonan, kiun la leganto povas trovi; li volis alirebligi al la leganto ĉiun ajn tekston Esperantan. Nu, ĉi tiun taskon, taskon de Esperanta-nacia vortaro, li certe plenumis konsciencie kaj komplete. En vortaro nacia-Esperanta, se li faros tian, lia kriblilo certe laboros pli severe.

La ĝustecon de la japanaj difinoj mi ne povas prijuĝi, mi nur diras do, ke la libro havas tre bonan aspekton, estas bele eldonita kaj tre bone bindita.

Kaj mi faras ankoraŭ rimarketon. Estas interese, ke ĝuste japano rapidas tiel komplete registri la plej freŝajn (eĉ velke ĝermintajn) burĝonojn de la lingvo. Tio ĉi ŝajnas rekte kontraŭdiri al tiuj, kiuj argumentas per la orientanoj kontraŭ la literatura pliriĉiĝo de la lingvo.

Kr.

MONTAGU C. BUTLER: STEP BY STEP IN ESPERANTO. 244 paĝoj. Kvara eldono. Eldonejo: The British Esperanto Association, London. W. C. 1. Prezo 1/6.

En la anglalingva antaŭparolo la aŭtoro ŝerce mencias la diversajn, multfoje eĉ kontraŭdirajn avertojn, konsilojn, kiujn li ricevis de amikoj kaj kritikistoj koncerne sian libron. Kaj vere, lernolibro de lingvo (eĉ se temas pri tia facila lingvo, kia estas esperanto), neniam povas esti kompleta. Ekzistas ja tiel diversaj metodoj, el kiuj certe pluraj atingas la celon, ke la lernantoj post trastudo de la libro komprenu kaj parolu la lingvon, ke oni ne povas pledi por la ĝusteco de certa metodo. Danĝeron povus alporti nur tio, se la aŭtoro rigide gluigis al la metodo, se por li pligravus la metodo, ol ĝia celo... Sed en ĉi tiu kazo ne minacas eĉ ombro de tia



dangero, la aŭtoro per saĝa eklektikismo elektis diversajn vojojn, kiuj ĉiuj kondukas al la esp-istigo de la lernantoj. Per tio la libro feliĉe evitis la abismojn de monotoneco kaj enuo. Mnemoteknikaj versaĵoj, abundaj leg-ajoj, proverboj, anekdotoj, ekzercoj, demandoj varias en la teksto. Ni vidu provon el la amuzaj historietoj de la libro: »Inteligenta dialogo. »Vi estas freneza: — diras mi. »Freneza?« — diras li. »Jes« — diras mi. »Kiu?« — diras li. »Vi« — diras mi. »Mi?« — diras li. »Jes« — diras mi. »Ne« — diras li.«

Eventualajn mankojn, erarojn oni povus trovi nur dum instrua tralaboro de la libro, tial mi nun ne endetaligos.

Aspekto, preso, papero tre bonaj.

L. Totsche.

NOVAJ GRAMATIKOJ KAJ VORTARO: 1) Seppik—Malmgrén: Systematisk kurs i Esperanto. Dua eldono. Eld. Förlagsföreningen Esp. Stockholm, 84 p. Prezo: 0.75 svedaj kr. 2) Th. Kieseritzky—Lindén: Esperanto-Lehrgang; eld. Rapida Venko, Uppsala, 143 p. Prezo: 1.30 svedaj Kr. 3) Paul Nylén: Esperantisk-Svensk ordbok. Eld. Förlagsföreningen Esp. Stockholm. 231 p. Prezo: 3.75 svedaj Kr.

Post la unua eldono de la populara Seppik—Malmgrén gramatiko rapidege aperis la dua, kiu fakte mem pravas la taŭgecon de la libreto. Kaj la dua eldono estos certe eĉ pli populara, ĉar la malmultaj neperfektaĵoj de la unua eldono malaperis. Moderna, bona, freŝa gramatiko. Estas dezirinde, en la sekva eldono, almeti enhavtabelon, por la intereso de la ripelemuloj.

La dua gramatiko, — germanlingva varianto de la konata sveda gramatiko de Lindén — sendube bone servas al tiuj, kiuj lernas la lingvon sen instruisto. Kelkaj strangajoj: ekz. la suno vokas al mi (vokas min), oni returnas en la vespero, (oni returnas sin vespere) estas ŝangendaj. Tiuj difektetoj estas tre maloftaj kaj ne povas ŝanĝi nian bonan opinionon, kiun la lertaj, spritaj, bone elektitaj legajoj, ekzemploj, klarigoj vekis.

La Nylén vortaro estas inda verko de la meritplena aŭtoro. Jam de kelkaj monatoj mi uzas la libron, sen ke mi estus trovinta mankon. Kaj se la praktika uzado tiomgrade legitimas la libron, la teoriulo nenion povas aldoni.

Szilágyi

DR. LEOPOLD DREHER L. K. SUPERA CORSO DE ESPERANTO. Dua Eldono. 66. p. Eldono de Leo Turno, Krakow. Prezo 1 sv. fr. por pluaj ekz. rabatoj.

Progresiva lernolibro estas necesega por la esperantistoj. Ni povas nur rekomendi la kajeron, aperintan jam en dua eldono, kvankam ĝi estas iom kara kompare al preso kaj bindo. Ankaŭ la klarigoj kelkloke ne estas eble tute laŭ nia gusto. Kial mankas ĉe la unua rakonto ke ĝin verkis Paŭlo de Lengyel, mortinta akademiano? (Ĉe aliaj ne mankas la aŭtoro.)

Kial *dunaskiloj* por ĝemeloj?

Generale ni rekomendas la libron, espereble sekvos pluaj eldonoj.

JAKOB ROSENBERG: INTIMA FRAZLUDO. Eldonis la aŭtoro, Tallinn. Prezo: 0.30 us. dolaroj.

Demando-respondo ludo, konsistanta el 62 kartoj. La ludantoj diras anstataŭ tuta frazo nur la nomon de iu vegetaĵo, kaj sur la kartoj troviĝas la klarigo de la »intima frazo.« Estas aldonita esperanta-estona botanika



vortaro, kiu entenas kelkcent vegetajnomojn ĉefe nordlandajn. Bedaŭrinde la aŭtoro ŝanĝis la nomojn de multaj kreskaĵoj. Ekz. oni trovas en la vortaro: kampanulo, luzulo, seratulo, karlino, koronilo, tonaketo, nepenteto, kip. anstataŭ: kampanolo, luzolo, seratolo, karleno, koronelo, tanaceto, nepentezo, ktp. Du nomoj por sama kreskaĵo faras konfuzon kaj malutilas al nia lingvo. Oni povas trovi en la vortaro ankaŭ tre maloftajn, tute negravajn kreskaĵojn, kiujn nur le botanikistoj konas. Tio tre malfaciligas la ludon. Ĉetere tia ludo ne povas esti internacia, ĉar la vegetaĵoj de diversaj landoj tre diferencas, kaj oni ne konas la kreskaĵojn de la alia, eĉ ofte tre proksima lando. Estus bone tiun ĉi ludon transformi kaj uzi anstataŭ la vegetajnomoj, aliajn komuninteresajn vortojn. Tiam oni povus havi vere bonegan ludilon por esperantistaj kunvenoj. *T. Czitrom.*

\*

*At recenzo koncerne Knock*, s-ro Warnier petas rimarki, ke la LKK. de la XXIV-a U. K. de E. elektis la verkon por traduko kaj prezentado antaŭ la kongresanoj kaj komisiis la tradukon al D-ro Pierre Corret.

\*

*Nova verko de Julio Baghy* aperis sub titolo: *Simplaj Versoj*. Bedaŭrinde, laŭ la insista postulo de la verkisto ni devas rezigni la recenzon pri ĝi.

\*

*Belan serion da glumarkoj* en dektri lingvoj, tri diversajn specojn eldonis la esperantista grupo Esperanto kaj Paco ĉe Laborista Esperantista Grupo Zaragoza, Plaza de San Carlos 3, Hispanujo.

## NIA POŬTO

*Legsalono en Apeldoorn.* Ni volonte ŝanĝas por vi la libron se vi resendas ĝin, kaj sendas unu respondkuponon, por la nova sendkosto.

*H. Oberländer v. Sternberg, Czortkow.* Vi enpagis la ĝustan sumon ne pli. Ni ĝojas ke plaĉis al vi H. A.

*K. Bulvyčius, Andriejovas.* Kredu ke ne ĉiuj samopinias kun vi. Ni ricevis laŭdegojn ankaŭ de ne judoj.

*J. V. Dolinsky, Turĉiansky Sv. Martin.* Ni ĝojas kaj dankas al vi tiun arangon. Kaj ke ankaŭ vi ĝoju, vi povas elekti unu libron en la valoro de 7 punktoj el la listo de la malantaŭa parto de la prospekto. Vi povas alpigi kaj ricevi pli grandan libron aŭ ankoraŭ varbi kaj tiam nian ĝojon denove saŭĝi je 7 punktoj.

*K. Straka, Praha.* Dume vi ricevis

E. Bukedon. Per enpagiloj ni faris tiel. Dankon. Ankaŭ ni pensadis jam multe pri tio, eble en la postvenonta jaro ni povos efektivigi ĝin.

*S-ino Riedl, Allstetten.* Dankon por viaj salutoj al L. kiujn ni peris. Nia opinie ĝuste en la nuna momento necesas montri tiajn librojn, prezentante, kiom ŝanĝiĝis tamen cirkonstancoj ĉe la plej granda religio. Ni do devas esperi ke tiaj ne daŭros longe ĉe alia flanko. Dankon por gratuloj. Baghy mankas, ĉar li kredas pli prosperi ĉe alia eldonisto.

*GEA-grupo, Nürnberg.* Bedaŭrinde via postulo estas neplenumbla. Ni plene kredas, ke la nuna Germanujo estas fakto, ĝuste pro tio ni rajtas havi alian vidpunkton pri kelkaj okazaĵoj. Ni mem esperas, ke tiaj aferoj post nelonge malaperos, sed ĝis tiaj ekzistas, ni devas bedaŭri.



(Temas pri bruligado al iu ajn libro). Sorĉistino el Kastilio ĝuste estas favora por katolikismo, montrante, kiom multe progresas tiu gravega religio kun la homa evoluo.

*S-ro A. Chance, Rheims.* Vi havas ĉe ni 10 punktojn pagitajn. Bnv, disponi kion fari al ili.

*S-ro Waard, Rdam.* Dankon pro viaj gratuloj. S-ano Bleier ĝojos vin renkonti.

*S-ro Gurwicz, Wilno.* Vi devas pagi 4.20 zl. ĉar dufoje vi kalkulis malfavore por vi kaj pagis pli, ol vi devis. Nun vi havas ĉe ni super-

fluon. Ni kredas dume estas ĉio alia aranĝita.

*S-ro Wyhnal, Praha.* Dankon pro via konsilo pri unueca formato. Tio estas bedaŭrinde teknike neebla. Libron, kiel HA. plikarigus al ni konsiderinde, se ni presus pli malgrandformate kaj libron de 150 paĝoj ni ne povas presi pli granda, ĉar ĝi fariĝus granda senforma broŝuro. Ni do devas resti ĉe du variantaj formatoj. Numerigon de la membroj ni komencos ĉe la dua jaro tre verŝajne.

**A****E****L****A**

### I. Kvina libro de AELA.

Ankoraŭ ne finiĝis la unua Jaro de nia Asocio, tamen kun certa fiero ni povas raportti, ke la esperantistoj komprenis la gravecon de nia iniciato kaj dum la pasinta trikvarona parto de la jaro ni havas la tri kvaronojn de la membronombro, planita por tiu ĉi jaro kaj kune kun tiu ĉi numero niaj membroj ricevos la du trionojn de la planitaj verkoj. Restas ankoraŭ eldonotaj du verkoj. La unua estas la romano de Forge kaj ĉi tie ni renkontas la unuan malfacilaĵon, kion kaŭzas la eterne ŝanĝiĝantaj eksteraj cirkonstancoj. Eble vi memoras, ke Forge estas unu el la plej akurataj verkistoj; des pli nin mirigis la fakto, ke antaŭ du semajnoj, anstataŭ ricevi la jam pretan manuskripton, ni ricevis de li leteron, nin informantan ke li pro la cirkonstancoj ne povis fini la romanon kaj ĝin povos fini maksimume ĝis la 31. de decembro. Kompreneble tio signifas tiel grandan malfruon, kian ni ne povas al vi trudi. Tial ni sendas al vi ĉi kune poŝtkarton, sur kiu bonvolu nin informi, ĉu vi volas atendi ĝis la apero de la libro, aŭ, se ne, kian libron vi intencas ricevi anstataŭ la verko de Forge. Vi rajtas elekti el la katalogo de Literatura Mondo aŭ kiun ajn libron, eldonotan de ni en la proksima estonto en la valoro de sv. fr. 5.—, prenante bazo la prezon de broŝurita libro. Pagintoj por bindo ricevos tiun libron sen plua superpago. Tiamaniere ni donis al vi pli multan valoron, ol ni promesis kaj ni devas peti vian pardonon. Bonvolu preni nian promeson tre firman, ke neniam ni kontraktos kun esperantista verkisto antaŭ ol li metis sian verkon sur nian skribotablon. Pri la elekto de la libroj sola escepto estas la nun kunsendata Dante-verko, kiun ni donas laŭ tre bonaj kondiĉoj al AELA-membroj, tiamaniere ties elekto do havus nenan sencon, ĉar vi devus pagi krome ĝuste tiom, kiom la libro kostas al vi, kiel AELA-ano. Vi rajtas elekti anstataŭ la verko de Forge ankaŭ plivaloran libron, kiuokaze vi bonvolos afable alpigi la diferencon inter fr. sv. 5.— kaj la prezo de la elektita verko.

Ni petas tiun karton resendi al ni plej malfrue ĝis 31. oktobro kiam



ni ekspedos al vi la kvinan libron laŭ via deziro. Bonvolu atenti, ke nesendante la karton, vi konsentas pri la ĝisatendo.

### II. Hodiaŭa ekspedo.

Vi trovos hodiaŭ kune ne nur la kvaran libron de AELA, pro kies malfruo ni petas vian pardonon, (la doganaj ĉikanoj pri klišoj ĉiam pli malfaciligas) sed ankaŭ le verkon

DAŔTE ALIGHIERI: INFERO.

Ni sendas al vi tiun novan Kalocsay-tradukon por trarigardo kaj por montri novan sistemon, kies favorojn vi rajtas ĝui. La libron (kies vendo-prezo estas broŝurite sv. fr. 8.80, bindite sv. fr. 11.— plus 10% por sendkostoj), kiel AELA-membro vi ricevas en tiom da ekzempleroj, kiomfoje vi estas membro, por la sumo de sv. fr. 3.90 broŝurita kaj 4.90 bindita, kun afranko. Bonvolu trarigardi, ĉu valoras la verko tiom. Se jes, afable sendu al ni la pagon plej malfrue ĝis la 10-a de oktobro, se ne, afable bonvolu resendi al ni la libron kaj depreni la resendokostojn el via venontjara kotizo.

Bonvolu bone noti du atentigojn gravajn

1) El multaj landoj ekzistas speciala favora tarifo por libroj al Hungarujo

2) pro teknikaj kaŭzoj ni nenion pluan povas sendi al vi antaŭ ol la Dante-libro aŭ ĝia prezo trafis nin.

Ni volas diri, ke la cedo de la libro per tia ege malalta prezo al niaj membroj estas eksperimento. Se vi bone akceptos nian eksperimenton, ni surprizos vin ĉiujare per kelkaj majstraĵoj, se ne, ni devos nin limigi severe al tiu sumo, kiun vi intencas kaj povas oferi por esperanto-libroj. Via do estas la vico por demonstri, ĉu vi ŝatas pluan evoluigon de AELA aŭ la ĝisnunaj rimedoj sufiĉas.

### III. Apero de Enciklopedio.

Nia redaktoro s-ro Bleier nun vojaĝis al Genevo kaj Parizo por traserĉi la tie ekzistantajn arĥivojn. Ni ankoraŭ ne havas la artikolojn pri kelkaj landoj, sed ni forte esperas, ke la redaktaj laboroj de tiu verko estos finitaj la 1-an de novembro. Sed ĉar la komposto mem de tia granda verko daŭras pli ol du monatojn, ni tre certe malfruos ankaŭ pri la apero kaj ĝi estos en la manoj de niaj membroj nur en februaro de 1934. Sendepende de tio ni tamen jam prilaboras la venontjaran programon, sed ni petas vian paciencon rilate tiun ĉi libron. Ni estas certaj, ke ni rekompencos vian paciencon per vere valora verko.

### IV. Eksiĝo el la societo.

Ni atentigas ĉi tie refoje, ke la membroj, kiuj ne plu deziras daŭrigi sian membrecon por 1934, kaj ankoraŭ ne anoncis tion, devas sendi sian ekxiĝdeklaron plej malfrue ĝis la 31. oktobro ĉijara.

### V. Premio por membrovarbado.

Por helpi la membrojn en la varblaboro, ni decidis fari jenan aranĝon:

a) Bonvolu sendi sur aldonata karto, kune kun la elekto pri kvina libro la adresojn de amikoj, konatuloj pri kiuj vi scias, ke ili estas bonaj esperantistoj kaj ŝatas interesajn librojn. Samtempe vi garantias pri tio, ke la senditaj adresoj estas ĝustaj kaj niaj libroj, sendotaj specimene al ili, okaze de nebezono estos resendataj je nia kosto.



b) al tiuj adresoj ni sendas po unu el Hungara Antologio aŭ iu alia grava AEELA-libro, kun speciala akompana letero, petante ilin aliĝi aŭ se ili ne volas kaj ne povas fari tion, resendi la libron al ni, kiuokaze ni repagas al ili la kostojn de resendo.

c) por ĉiu nova membro, kies adreson vi sendis al ni, vi rajtas elekti libron el la listo, troviganta en la nuna numero de BG. por la valoro de 3.— sv. fr.

d) valoras nur adresoj, kiujn ni ĝis nun ne havas.

Ni forte kredas, ke vi eluzos la ankoraŭ estantan tempon por tiu ĉi jaro, kaj por faciligi tion, ni anoncas, ke

#### VI. La lasta dato de aliĝo por 1933

estos pro la prokrastiĝo de la Enciklopedio ne la 1-a de novembro, sed la 31-a de decembro 1933. Ni do petas vin, bonvolu nepre fari vian eblon, por ke en la venonta jaro ni povu plenumi la maksimuman laborplanon pri kio vi mem legos.

Ne forgesu, ke varblaboro por vi repagiĝas ne nur per la premio-libroj, sed ankaŭ per tio, ke ju pli da membroj ekzistos, des pli multe da libroj ni donos al vi por la sama kotizo.

#### VII. Pri la libroj de 1934-a jaro

ni parolis jam antaŭe. Ni devas diri, ke ni fidas en la estonto, ni fidas en via helpo kaj ni fidas en la prudento de la esperantistaro. Tial, laŭ la rezulto de la alvenintaj balotoj ni decidis doni en 1934

#### MINIMUME 10 LIBROJN KUN PRESKAŬ 2500 PAGOJ

por la sama kotizo. Tamen, ĉar la libroj plimultiĝis, mi devos iom plialtigi la sendkostojn, kiuj fariĝos 4.90 fr. kaj la bindkostojn eventualajn, kiuj fariĝos fr. 7.50.

Vi do ricevos la jenajn librojn, laŭ suba sinsekvo:

- 1) *Hekler*: Arthistorio, volumo I.
- 2) *Jelušič*: Cezaro
- 3) *Stonimski*: Mia vojaĝo en Sovetio
- 4) *Cehoslovaka Antologio*
- 5) romano de *Engholm*
- 6) romano de *Weinhengst*
- 7) romano de *Szilágyi*, se ĝi estos preta en ĝusta tempo aŭ anstataŭe alia originala romano aŭ tradukita samgranda
- 8) unu el la jenaj libroj: *Kalocsay* Lingvo Stilo Formo  
*Totsche* De Paĝo al Paĝo
- 9) unu el la jenaj libroj:  
*Engholm*: Homoj sur la Tero  
*Forge*: Mr. Tot aĉetas mil okulojn  
*Szilágyi*: Trans la Fabeloceano
- 10) unu el la libroj:  
*Kalocsay*: Rimportretoj  
*Kalocsay* Goethe: Romaj Elegioj  
*Baghy*: Preter la Vivo

En la okazo, se laŭ cirkonstancoj de 1-a de septembro ni antaŭvidas, ke nia membraro por 1934 atingos 1500, ni sendos tute senpage al ĉiuj niaj membroj la duan volumon de la Arthistorio de Hekler.



Dependas do nur de vi, ĉu vi ricevos unu belan libron plian aŭ ne kaj ni forte esperas, ke vi konos vian devon al vi mem.

Cetere elekton el la tri lastaj libroj ni ekspedos tuj post la ricevo de la kotizo por 1934-a jaro.

Se ni aldonos, ke ĉiu AELA-ano rajtos aĉeti niajn eldonaĵojn de la venonta jaro per tre malalta punktv valoro, se ni aldonos, ke ni presos ankoraŭ almenaŭ ses verkojn, kiujn ni donos por la 40% de ilia vendoprezento por AELA-anoj, ni montris al vi favorojn tiom grandajn ke ni estas certaj pri via plua fidela aneco kaj pri via sindona laboro por varbi novajn membrojn. Ni menciis inter tiuj favorprezaj libroj venontjaraj kaj tre versaĵnaj

*Aisberg*: Nun mi jam komprenas radion, kun preskaŭ 300 ilustraĵoj

*Lejzerowicz*: El la Verda Biblio kaj Interparoloj kun Horaĉo Sereno

*Sinclair Lewis*: Dro Arrowsmith

*Körmendi*: Aventuro en Budapest

*André Gide*: Pastoral Simfonio

*Stefan Zweig*: Amok

*Nussblatt*: Rilatoj de Herzl kaj Bertha von Suttner.

Resume: Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj daŭrigos sian laboron ankaŭ en la jaro 1934 kun sama fervoro, kun sama entuziasmo kiel antaŭe, por nia literaturo. Aliĝi al ĝi kaj resti en ĝi estas la devo al si mem de ĉiu inteligenta esperantisto.

## Elekteblaj libroj anstataŭ *Jean Forge: Febro*

### VERKOJ DE JULIO BAGHY:

Dancu Marienetoj, noveloj tolb. 5.40, broŝ. 3.40, Migranta Plume noveloj tolb. 4.60, broŝ. 2.70, Viktimoj, romano tolb. 7.40, duont. 5.60, broŝ. 5.—, Hura! romano tolb. 10.—, duont. 8.40, broŝ. 7.40, Preter la vivo, poemaro tolb. 3.—, broŝ. 2.—, Pilgrimo, poemaro tolb. 3.—, broŝ. 1.80

### VERKOJ DE KOLOMANO KALOCSAY:

Lingvo, Stilo, Formo tolb. 4.90, broŝ. 3.—, Malkara eldono bind. 2.50 broŝ. 1.50, Streĉita Kordo tolb. 5.80 broŝ. 4.—, Rimportretoj tolb. 4.60 broŝ. 3.—, Eterna Bukedo, Internacia poemantologio, 352 paĝoj Duonlede bindita 11.30, Madách: Tragedio de l' Homo luksa 5.50, simpla 4.—, Petöfi: Johano la brava bind. 3.— broŝ. 1.50, Goethe: Romaj elegioj La Taglibro, silkebind. 5.—, bind. 3.—, broŝ. 2.—, Hungara Antologio bind. 14.— broŝ. 12.—, K. Kalocsay—G. Waringhien: Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro bind. 5.— broŝ. 3.60.

### ALIAJ VERKISTOJ:

J. Forge: Mr. Tot aĉetas mil okulojn — Romano bind. 5.80 broŝ. 4.—, Francisko Szilágyi: Poemaro el Hungarlando bind. 2.50 broŝ. 1.50, Francisko Szilágyi: Trans la Fabeloceanon bind. 5.— broŝ. 3.—, Szilágyi: La Simpla Esperanto (gram. por hung.) broŝ. 1.35, Teodor Schwartz: Modernaj Robinzonoj broŝ. 1.50, La Pentroarto en la malnova Hungarujo, kun 96 ilustraĵoj duonlede bindita 15.50, L. Totsche: De Paĝo al Paĝo bind. 5.— broŝ. 2.50, Engholm: Homoj sur la Tero bind. 5.— broŝ. 3.60, Kenelm Robinson: Homarisma Laboro broŝ. 0.60, I. Sirjany Peko de Kain broŝ. 1.—, Hungara Slosilo 0.18. *Prezoj en svizaj frankoj*



# BIBLIOGRAFIA GAZETO

Redakcio kaj administracio  
Hungarujo, Budapeŝto, IX.,  
Mester ucca 53, V. 7. —  
Telefonnumero: 380-84

REDAKTAS:  
K. KALOCSAY

Senpaga por abonantoj al  
Literatura Mondo kaj anoj  
de AELA. — Aparta abono  
1.80 svisaj frankoj por jaro

## Revuo de Revuoj

Depost la lasta revuo de revuoj multaj eventoj traŝvebis la esperantan ĉielon. Kaj ŝajnas ke ankaŭ la esperantistoj estas homoj: multaj eventoj signifas grandan paperplenigadon. La situacio en Germanio, la kongreso, la sandirektiĝo de Germana Esperanto Asocio, kaj — por ke mi menciui ankaŭ ion gajan — la unuecigo de nia movado; ĉiuj estis okazoj uzi inkon (por skribadi), pulmon (por kriadi) kaj inkujon (por kio ĉi lasta, tion mi ne perfidas, ĉar mi volas gardi la ŝajnon ke esperantistoj estas *pacaj* batalantoj). La gazetaro aspektas batalkampe pli ol iam, ĝia mieno estas tiom minaca, ke mi ne kuraĝis teni ĝin inter miaj ĉastaj librinoj; la dikaj literoj, substrekoj kaj duoblaj krisignoj minace svarmas en ĝi.

Memkompreneble la kanonbruo pleje aŭdiĝas el la laboristaj organoj. La kutima disputado inter La Socialisto kaj Sennaciulo (kune kun Sennacieca Revuo) ankoraŭ daŭras; pro la fondiĝo de ISE ĝi eĉ forte pliakriĝis. Sed pri la »germanaj aferoj« (la ĉi-jara kongreso kaj la sandirektiĝo de la Germana esperantistaro) ili ĉiele konkordas: plenpulte mallaŭdas. Iĉokon kaj la meritplanan Führer-on de la germanaj esperantistoj.

Cetere *Sennacieca Revuo* impresas tre bone. La 4-5-a N-o havas sur sia kovropaĝo bonege sukcesintan karikaturon pri la bonege sukcesinta aŭtodafeo, desegnitita de G. Grosz. Gardante nian neŭtralecon laŭ religia vidpunkto, mi reskribas parteton de artikolo »Por nia medito« de s-ano Barbedette, kiu — post citado de opinioj de kelkaj kontraŭ-Jesuaj religio-ologoj, — manifestas jene: »Tiel kompatinde disfalas la kredoj koncerne Jesuon kaj lian dian mision.« Rimarkinde, ke malgraŭ (aŭ ĝuste »graŭ«) tiuj kompatoj la Eklezio ŝajnas ankoraŭ sufiĉe bone farti.

Se mi jam estas ĉe la gardado de neŭtraleco, mi citu samtempe kelkajn liniojn el deklaro de Vaugoin, Aŭstria ministro (Aŭstria Esperantisto, N-o 8-9-a): »Subtenanto de la internacia lingvo fariĝu ĉiu, al kiu la paco inter la popoloj kuŝas surkore, ne lastvice la *soldato*, sen nacia diferenco, kiel *destinita gardanto de la paco*.« Mi ne sciis kion opinii, se s-ro Vaugoin ne estus la ministro de la militaj aferoj.

Post tiu malgranda deturniĝo mi reiru la laboristan gazetaron. En *Sennaciulo* menciindigas mildaj frazoj: »Sed tiu ĉi fenomeno (nome la burĝa esperanta verkado) por ni signifas nur esperantlingvan paperplenigon«, »Per laborist-tendencaj, por niaj celoj utilaj libroj ni devas elbati el la manoj de la suprajemuloj tiujn librojn, kiuj estas plenigataj nur per amaj



aventuroj aŭ religiecaj stultajoj. Ĉu la samideanoj en SAT havas sekrete verkistojn, kiuj detruos per siaj mondskuaj ĉefverkoj la ĝisnunan »neklas-bataleman« literaturon?

La *Socialisto* memkompreneble ĝoje salutas la fondiĝon de ISE (malbenata de SAT), kies oficiala organo ĝi fariĝis. Precipe sukcesaj mi opinias la du laŭvidpunkte redaktitajn numerojn 9-a kontraŭmilita kaj 11-a porvirina.

*Svenska Arbetar Esperantisten*, fidela disĉiplo de Sennaciulo aspektas tre bonguste, sed ĝi redaktiĝas preskaŭ tute en sveda lingvo. Parto temanta pri la loka movado — kiu do interesas nur svedojn — tamen estas esperanta. Tiel renversiga la hungara proverbo kaj la brasiko konsumiĝas, dum la kapro restas malsata.

En la *Germana Esperantisto* parolas Adolf Hitler tra 6 dense presitaj paĝoj en traduko de Esperanto-Führer Behrendt. Mi volonte citus kelkajn perlojn, sed elekti bedaŭrinde ne sukcesinte, mi rezignas. Behrendt raportas ke elektoj de esperanto-grupo-prezidantoj de nun ne okazos, plue ke li cedos al la konsiloj de la »Führerrat« laŭ ebleco. Tre laŭdinde.

S-ano Karl Minor daŭras recenzi. Li protestas i. a. kontraŭ la adverbo en »pale ekrigardis la kardinaloj« (Lejzerowicz) kaj opinias pli ĝusta »palaj«. Konsiderante, ke *ekrigardi* estas verbo, mi kaprompas, kial la romanoj nomis la adverbion ad-verbium?

Nun venu la kontraŭulo de GE, *Pola Esperantisto*. S-anoj Lejzerowicz kaj Wiesenfeld diligente mallaŭdas la germanajn okazaĵojn. El kompetenta fonto mi scias, ke Hitler jam forte maltrankviligas.

*Svenska Esperanto Tidningen* ĉiam pliboniĝas (eble la venonta kongreso ankaŭ efikas). En N-oj 9 kaj 10 mi trovis interesan kaj tre bonstilan vojaĝopriskribon de Ella Nilson: »Stockholm-Tallinn-Leningrad-Moskva«. Krome en N-o 9 s-ino Magda Carlsson tradukis poemon de Karlfeldt. La traduko estas tre bela kaj malkaŝas respektindan talenton de la tradukintino.

*La suda stelo* daŭras boni. Ĝin karakterizas interesa enhavo kaj bona redaktado. En N-o 7 legeblas tre atentinda artikolo de la june mortinta s-ano Franjo Homar pri la tradukoj de »La morto de Smail-Aga Cengijić«. En la artikoloj estas citataj kelkaj partoj el iu »eseo« pri la sama temo, aperinta en »Kroata Revuo«. Strangajn aĵojn asertas tiu verkinto. Citinda estas ĉefe tiu ĉi opinio: »La du italaj tradukoj estas nur palaj refleksoj de la originalo... ĉar la itala lingvo ne kapablas doni la naturan koncizecon kaj originalan sonorecon (1) de l' kroataj versoj.«

En sia recenzo pri la traduko de »Servulrajto« Milica Djurić-Topalović deklaras ŝokan juĝon, kiu estas riproĉinda, ĉar ĝi jam ne estas citaĵo, sed propra opinio de ano de l' redaktanta rondo. »Kaj dum nin (la traduko de) Ifigenio de Goethe postlasas indiferentaj(!), ĉar ĝia lingvo estas plumpa(!) ...« La fotoj de du skulptaĵoj de l' fama kroata skulptisto Ivan Meštrović estas belaj kaj igas min scivola pri liaj aliaj verkoj, kiujn mi esperas vidi en iu sekvanta N-o de *La suda stelo*.

*The British Esperantist*. En N-o 340 la recenzo pri l' libro »La amo en la jaro dekmil« malkaŝas mirindajn vidpunktojn de la recenzinto. Inter alie li diras: »La titolo eble pensigas kelkajn pri ia seks-obsedita traktajo de iu, kiu povas vidi nur tiun faktoron de la vivo; sed ĉu estis kun mokrideto at tiu nun pasanta modo de verkado, la aŭtoro ktp., ktp.« Ĉu la nuna modo de verkado estas seks-obsedita? Iom supraĵa kaj sekve tre maljusta ĝeneraligo. La 36 vortoj de K. R. C. S. pri la libro »Kontraŭ la regantaj



perceptoj pri krimo kaj puno« diras trafe multe pli multon.

La sama numero ĝojigis min per mirinda malkovro: esperanto ankaŭ dum pluvo paroleblas. »Dek knabinoj el la Country School vizitis la tendaron ĉe Cleadon (kiaj moroj, cetere?! kaj malgraŭ la pluvo ĝuis esperantan babiladon.« Gratulinde.

Citinda strofo el »Al nia paca batalo« de Wm. Harvey:

»Spite de la mokoj de miopa stultular'»

Nin salutas anoj de klarvida amikar'»

Sur la voj' celita de la Esperantistar'»

Al nia paca batalo.«

Kaj oni ankoraŭ aŭdacas dubi pri la alta evoluo de la esperanta verstekniko.

Flandra Esperantisto samtonas kun Pola Esperantisto pri la »jubilea« kongreso. Precipe ĉarme ĝi rakontas pri la germana tramista grupo veninta al la malferma kunsido kun sia verda standardo prudente envolvita en papero.

Novelo »La ampoemo de Jan Mijs« estas ĉarmeta, des pli malbona estas »Ni progresas« de mia samlandano Nikolao Lörincz. Ĉu Spierer sukcesas trovi nur tiel malfortajn specimenojn en la hungara novelliteraturo. La »varba« dialogo »Pri Esperanto« represita el Germana Esperantisto estas pomen malproksimen falinta de sia arbo.

La Progreso enhavas tre interesajn artikolojn. La novelo de Lajos Biró en la traduko de A. Feldmannova estas laŭdinda enave kiel lingve. Al la artikolo »Meditado pri propagando« de F. Stanek la redaktoroj almetis, ke ili scias la aliopiniecon de la publiko. tial ili volonte akceptos ankaŭ aliajn artikolojn por komuniko. Fakte, la verkinto pruvis pri tre stranga pensmaniero. Li volas, ke la esperantistoj adaptiĝu al la tiom pridiskutita interna ideo, sed ne ĉe la komenco. Tiu koncepto signifas alivorte ke la homoj kapablas ŝanĝiĝi je la efiko de Esperanto. Sed tion kontraŭas la faktoj, ĉar ekzistas esperantistaj unuigoj hokokrucaj, naciismaj, eĉ ŝovinistaj

Kaj nun: Hungara Heroldo. Iom mire mi atentis jam delonge pri la konstanta pikado de s-ano Takács, kiu en sia Nagymaros-a soleco pasigas la tempon per atakadoj kontraŭ Literatura Mondo kaj Mondanoj. Nun li sukcesis kapti kunulon en la persono de Balkányi, kiu ĝis nun detenis sin de tiaĵoj. En sia »kritiko« pri Hungara Antologio, Balkányi konstante pardonpetadas kaj modestadas. »Mi ne kuraĝas skribi kritikon«. Li sentas la kompilitojn super si; jen la kaŭzo, kial mi prenis la taskon respondi: mi staras sub li.

1. Se Balkányi estus redaktinta la Antologion, ĝi certe estus pli kompleta: li estus ŝtopinta en ĝin ĉiujn aŭtorojn, kiujn li postulas de la redaktinto. Poste — li estus povinta meti grandan premion al la aŭdaca heroo de pacienco, kiu riskus ĝin legi.

2. Fine de la Antologio estas klarigitaj ĉiuj francaj frazoj, kiuj troviĝas en iu novelo. Unu, tamen, restis forgesita. Balkányi tion tuj malkovras! Kaj li riproĉas, ke la Antologio ŝajne oni faris por franclingvuloj. Jen objektiva riproĉo.

3. Pri la neologismoj. . .

Tamen, mi ne daŭrigas. Nian legantaron apenaŭ interesus mia disputo kun la Hungara Heroldo. Sed min vere indignigis tiu kritiko, eble pro tio mi estis tiel malbonhumora, ke mi rimarkis en la Esperanta gazetaro preskaŭ ĉie nur riproĉindaĵojn.

Esperab'e, mi riparos ĉi tion sekvafoje. Kaj espereble min helpos en tio bonvole ankaŭ la Esperanta gazetaro.

George Karczag



# Recenzo

## DU KLASIKAJ VERKOJ\*)

1. *Oduseias* de Homeros. Trad. W. J. A. Manders ĉe Thieme & Kio Zulpfen, Nederlando. Prezo 3 fl. 90

2. *Infero* de Dante. Trad. K. Kalocsay ĉe Literatura Mondo. Ilustris D. Fáy. Prezo broŝ. sv. fr. 8.80, bind sv. fr. 11.—+10% por sendkostoj.

Subita kaj preskaŭ samtempa riĉiĝo okazis de nia literaturo: du el la plej grandaj epopeoj en la klasika civilizo estis tradukitaj, la Homera *Odiseo* fare de W. J. A. Manders kaj la Danta *Infero* fare de K. Kalocsay. Se oni memoras la tradukojn de la Virgilia *Eneido* fare de D-ro Vallienne, de la anonima *Rolandkanto* fare de D-ro Noel, de la *Biblio* fare de Zamenhof, oni vidas ke, krom la *Iliado* (Kofmann tradukis verse nur la 6 unuajn kantojn) kaj la *Nibelungenlido*, ni posedas nun grandan parton de la literaturo eposa. (Mi ne kalkulas ĉi tie kun la cetera tradukita *Sinjoro Tadeo*, de Mickiewicz, la parte tradukita Mirejo de *Mistral*, la netradukitaj *Perdita Paradizo* de Milton kaj *Jeruzalemo liberigita* de Tasso — ĉar ili estas pli artefaritaj kaj tro novaj por havi profundan influon sur la europa literaturo). Estas konkerero, kies gravecon oni ne povas troigi por la regula disvolviĝo de nia lingvo. Ĉar tiaj praaj verkoj influis ĝis nesupozebla grado la europajn literaturojn per siaj originalaj parolturoj kaj vorbildoj — ne menciante eĉ la rakontitajn scenojn, al kiuj aludoj svarmas en la modernaj literaturoj. Ĝis nun, kiam oni renkontis en teksto esprimon pruntitan de tiuj klasikaj verkoj oni devis peni por forgi per si mem tradukon iom taŭgan, kun la ĉiama timo, ke tiu traduko ne elvokos en la penso de la legantoj la originalan bildon; ĉar kompreneble ĉiu tradukisto povis uzi diferencon formon. Nenio estis pli malfacila ol transdoni ekz., e la la biblian stilkarakteron de Bossuet aŭ la homermodajn stilornamojn de Chateaubriand, ĉar ekzistis en Esp-o nek biblia nek homera aŭtoritata traduko. Zamenhof, korektita de la anglaj pastroj donis al ni la deziritan biblion; nun S-ro Manders donas al ni la duonan sed certe la pli interesan parton de la Homera verko, la Odisejon. (Mi opinias utila uzi tiun formon por distingi la nomon de la poemo elde la nomo de la heroo, se oni transskribas ĝin el la he'ena, Odiseo — latine: Uliso.) Li ne tradukis ĝin verse kaj mi ne mallaŭdas lin. Mi jam diris aliloke, ke la heksametro estas la plej facile gurdita verso en Esp-o kaj sekve la plej malfacila, se oni volas vere plaĉi al la orelo; ĝi estas en tia okazo tiel malfacila, ke mi dubas ĉu oni povus sen turmento al la teksto uzi ĝin por longa poemo. La provoj de Kofmann kaj de Vallienne cetera ne malpravigas min; kiu rekonas la harmoniajn, variajn, flekseblajn versojn de Virgilio en tiu mekanike skandita formo:

Ne esprimeblan, reĝino, vi petas novigi doloron,  
Kiel Trojanojn potencon kaj regnon multege plorindan  
Rompis Danaoj: malĝoja afero, en kiu mi prenis  
Parton grandegan, kaj kiun mi vidis. Ĉar tion aŭdante,  
Kiu, Mirmido, Dolopo, kruela soldato Ulisa,  
Larmojn retenus? . . .

\*) Pri ili ambaŭ ni publikikos ankaŭ apartajn recenzojn, el la plumoj de J. Hartog kaj B. Migliorini.



La traduko estas do proza; sed mi devas aldiri ke tiu prozo estas tiel zorge ritmita, ke oni ne sentas troan bedaŭron; krome, la enhavo tiel ofte similas romanon, ke ne ĝenas legi ĝin en proza formo. Ĝi fluas facile, gracie, kiel bela purpura ŝtofo, brodita per belliniaj, oraj bildoj, kaj oni ĝuas vere infanan plezuron (almenaŭ mi konfesas tion) je la malrapida disvolvigo de la mirrakonto.

Sro Manders tradukis laŭ bone aranĝita teksto, kaj laŭ plej modernaj sciencaj informoj: tiu zorgo estas sufiĉe malofta en nia literaturo, por ke oni laŭdu ĝin speciale. Li konas eĉ la plej novajn hipotezojn: *atrugetos* estas ĉe li *senripoze ondanta*, kaj ne kiel ĉe la malnovaj tradukistoj (Kofmann): *senfrukta*. Nur kelkaj kritikoj ĉi rilate: *aihopa oinon* (IX 36o kaj aliloke) estas *flamruĝa vino* (litere: *fajrovizaĝa*) ne *perlanta*. Por *tanupeplos* (XV, 364) la epiteto *malvastvesta* estas dubenca; pli bone: *striкта* (tio propre signifas, ke la virino estas agrable graspuŝeta, kaj bone plenigas sian veston.)

Laŭ la Homera modo, la kunmetitaj epitetoj abundas, ofte tre taŭge formitaj (oni rimarkas, ke la kelke oftaj triradikaj kunmetaĵoj transdonas bone per sia pezo kaj gravo, la arkajan tonon de la originalo): *Athene fajro-ŝprucokula*, *dutenilhavaj kruĉoj*, *doloreltenema koro*, *remŝipamaj Phaiakoj*, *urbruĝnigulo*, *nepereipovaj sandaloj* ktp. Okaze de tiu lasta, mi rimarkis plurajn similajn kunmetaĵojn, kies unua elemento estas infinitivo; mi notas kelkajn por inciteti mian Kalocsay, kiu rifuzas al ili la «*ekzisti-raĵton*»: la *mortidevuloj*, *tranĉipova*, *defendiforto* (mi konfesas, ke mi ne vidas diferencon kun: *vivoforto* kaj *defendoforto*, kiuj troviĝas sampaĝe 264). La tradukisto taŭge uzis kelkajn neologismojn: *pojno*, *pubo*, *starti*, *trajektorio*, precipe pri la maraferoj: *braso*, *hiŝi*, *holdo*, *steveno*, *ŝkoto*, — sed li nekompreneble haltis antaŭ aliaj: li uzas ekz. *antaŭsteveno* anst. *pruo*, *trokuraĵulo* anst. *aŭdaculo* aŭ *temerarulo* (pli bone estus almenaŭ: *troriskemulo*). Precipe estas kritikinda la misuzo de la sufikso *ec*: *ruzecaj ligiloj* (88) *bonvolece* (74) *nebuleca maro* (59) *saleca akvo* (143) *nigrecia vino* (59) *spertece* (54) *laneca mantelo* (80) *rokeca lthaka* (133) *ŝtoneca rokaro* (63) *graseca tero* (18); preskaŭ ĉie ĝi estas neŭtila kaj falsasence uzita; ĉar ĝi ne signifas abundon de io, sed la abstraktan similecon: laneca mantelo estas propredire mantelo el ia ajn ŝtofo alia ol lano, sed kiu havas ties aspekton aŭ proprajojn. Dum mi estas en la dornejo, mi signas la kelkajn erarojn pro senatento, kiujn konvenus korekti en dua eldono: *krudelulo* (= kruelulo 106) *turmo* (= turo 71) *pintlongaj* (= pintlangaj 54) *regulino* (= reĝino 69) *elementis al la kapo* (103, fr: monter à la tete = la kolero *levijis* al lia kapo, diras Kabe), kaj *Laodamantos* (= Laodamas 86) — Laŭ tre defendebla maniero, la aŭtoro transskribis ĉiujn proprajn nomojn kaj esperantigis ne eĉ la plej konatajn: *Herakles*, *Akhilleus*, *Homeros*. Ĉar li ne tradukis verse, kaj ne bezonis zorgi por montri al la leganto la ĝustan akcentadon, oni ne povas riproĉi lin, ĉar cetere tiu procedo donas helenan koloron al la rakonto.

Sume, malgraŭ la kelkaj kritikoj, kiuj vere estas tre malmultaj, rilate al la amplekso de la verko kaj ĝia stilriĉo, tiu libro estas unu el la plej plaĉaj tradukoj, kiujn mi konas en Esp-o. Kaj la ekstera formo de la libro, papero k preso, ne difektas la plezuron de la leganto. Serioza esp-isto ne povas malhavi tiun ĉefan libron en sia biblioteko, apude de la Zamenofa Biblio. Ili estas du verkoj, kiuj prezentas inter si pli ol unu similan punkton, kaj por nia lingvo preskaŭ egalan gravecon.

Egale grava, sed pro iom malsamaj kaŭzoj, estas la *Infero* de Dante.



Oni scias, sufiĉe, kiel la originalo estas stilstreĉa, kolorriĉa, vortabunda; kiel en ĝi svarmas la aludoj al ofte forgesitaj aŭ malbone konataj eventoj; kiel la ritmo estas nemalligeble implikita per la triobla ripeto de la sama ritmo. Dante estas la genio plej abrupta el la moderna literaturo; li staras en la dezerto de sia epoko, kiel obelisko en la egiptaj sabloj. Ataki tian giganton estis preskaŭ freneza penso; mi ne asertas, ke Kalocsay venkis, lin sed plej obstinaj skeptikuloj devos konfesi, ke li ankaŭ ne estis venkita. Kaj kiel Jakob el sia lukto kontraŭ la Angelo, li eliras el la batalo pli granda kaj pli forta.

Cetere, se la verko ne estas el la plej unuavide kompreneblaj, Kalocsay klopodis malgrandigi kiel eble plej la penon de la leganto. Malofte mi vidis tiel oportunan prezentadon de la Infero; kaj en la franca mi ne konas unu tradukon, kiu liverus al la publiko tian sumon da klarigoj, tiel malvaste resumitaj. Des pli prave en pli malgrandaj literaturoj, por kies anoj certe tiu libro estas la sola rimedo por facile orienti sin en tiu verkego. Mi signas speciale la skemojn de la Danta Infero (p. 96, 144 kaj 269) kiuj tuj komprenigas la iom komplikan planon de la damnita regiono. Ankaŭ la historiaj klarigoj ĉe la sojlo de ĉiu kanto estas tre bonvenaj, kaj en la biografio de Dante, kiu antaŭas la poemon, oni trovas ne nur bezonatajn informojn, sed ankaŭ altkvalitajn paĝojn. Kaj la neologismoj, kiujn uzis la tradukinto, estas klarigitaj jen piednote, jen en aparta listo je la librofino (rimarketo: spite al la signado, *lici* ne kuŝas en la SAT-vortaro, sed ja *neglekti* kaj *vito*). Tie oni vidas, ke, krom ok terminoj, ĉiuj aliaj troveblas aŭ en la SAT-vortaro aŭ en la Parnasa Gvidlibro: tio pravas interalie, ke la vortoklekto, kiun mi liveris en tiu lasta libro, larĝe sufiĉas por la plej malfacilaj verstradukoj, kaj krom maloftegaj esceptoj, ne multigos jam: konsidero kiu eble trankviligos bonajn animojn verŝajne skandalitajn de la supozo, ke Esp-o estas ĉiujare riĉigonta po ses cent neologismoj. Kaj aliflanke tiu verko pruvos al la hontemaj kondamnintoj de la »*Poezia Fekvortaro*«, ke la abomenaj vortoj kiel *kopuli*, *merdo*, *meretrico*, *pugo*, *puo*, *putino*, povas esti uzataj en la poezio, kaj eĉ en la plej altinspira poezio. Mi esperas, ke ili ne akuzos Dante pri malĉastemo. Jan la legado de la *Alta Kanto* (precipe en 7, 2) aŭ de *Jehezkel* (precipe en 23, 20) estus devinta averti ilin. Sed plej ne kuraceble surda estas, kiu ne volas aŭdi.

La de Kalocsay provitaj 8 novaj vortoj cetere ne apartenas al tiu lasta kategorio. El ili 3 estas preskaŭ truditaj de la teksto (armento, drudo, perisomo) kaj apenaŭ estas uzeblaj aliloke; el la aliaj, rimarkinda estas nur la provo de la sufikso -esk, kun signifo: simila al, samaspekta kiel . . . (fereska ŝtono); mi tre dubas pri la akceptebleco de ia ajn nova gramatika ilo, sekve ankaŭ de tiu afikso; tiom pli, ke -ec povas sufiĉe taŭgi por esprimi tiun ideon. Kiel stilan apartaĵon mi notis la fortefektan forigon de la antaŭaĵo de relativo, en versoj:

mi falis, kiel kiun sveno ĵugis . . .  
(vojo) pli kruta ol kiun ni postlasis . . .

Pri la uzo de *se* . . . u kun optativa signifo, Kalocsay diras mem, ke ĝi ne estas enkondukenda en la literaturon; ĝi restos nur imito de la Danta stilo.

Estus iom insulte al Bleier miri antaŭ la severgusta, sobrastila prezentado de la libro; li kutimigis nin al tiaj belajaĵoj. Sed mi povas diri, ke neniam li tiel perfekte sukcesis. Kaj la elekto de Dezső Fáy por ilustrila poemon, estas kiel eble plej laŭdinda. Tiuj, kiuj ellegis la Dantan poezion,



kaj iom spertas en la libroarto, scias, ke Dante same kiel Baudelaire — kvankam ne pro la samaj kaŭzoj — estas aŭtoro ne ilustrebla laŭ la klasika maniero. Ĉia ajn provo por realigi per la desegno la scenojn imagitajn de la poeto estas vana kaj malinda. Nu, Fay lerte evitis la malfacilon: ĉiu el liaj lignogravuroj estas dividita en multaj apudmetitaj fakoj, prezentantaj ĉiuj apartan scenon: la unuiga moto estas la paro Vergilio-Dante, malsuprenirantaj la eternajn ŝtupojn. Dank' al tiu procedo, la dekoracio kaj ĉiuj nerezoneblaj detaloj estas forigitaj, la personoj estas traktataj iom skeme kaj des pli dras'e, kaj la efeko pri svarmado estas nerezebla: per la ŝajne kosa aranĝo ĉiu tabulo donas al la okulo la impreson pri sonĝa scenaro, pri inkubvizio, kiu respondas admirende al la apudteksto.

Finante la recenzon, mi rimarkas ke mi ne parolis pri la traduko mem. Sed kion diri? Kalocsay . . . estas Kalocsay kaj mia amikeco al li farus flataĵoj plej sincerajn konstatojn. Tamen mi povas montri al la belamantoj, kiel preskaŭ perfektajn pecojn, la lamenton de Franĉeska (kanto 5a) la alegorion de la Fortuno (k. 7a), la tragedion de Ugolino (k. 33a), sed precipe la finon de la 26a kanto, tiun korpreman morton de Uliso, sur la rompita ŝipo, kiu simbole forportas la antikvan mondon al abismo. Nenio pli granda ekzistas en ia ajn literaturo.

G. Waringhien

\*

#### ELDONAĴOJ DE HEROLDO de ESPERANTO, Köln

DOUGLAS P. BOATMAN: LA NEKONATA KONATO. 122 paĝoj. Heroldo, Köln, 13.5×20 cm 124 pg. Prezo, broŝ. 1.60, bind 3.— Mk. g. Plus 10% por sendkostoj.

Sincere mi konfesas, ke la mistikaj, aventuraj aŭ detektiv-romanoj ĉiam altiris min: tiom pli granda estas mia peko en la okuloj de la snoboj, ĉar pro ĉi tiu inklino mi eĉ ne hontas, neniel mi sentas min degradita homo, se tian libron mi prenas en la manon. Necesas kompreneble, ke la aŭtoro konu sian metion: facila, vigla stilo, teknikaj rafinaĵoj, iom da inteligento estas kvalitoj, kiujn ĉe tiaspecaj romanoj oni ne rimarkas — se ili ĉeestas, sed ilia manko tuj ĝenas, kelkfoje ĝis la al-mur-jeto.

Nu, la violkolora, malhela kovrilo de la *Nekonata Konato* tuj vekas la interesigon, ne parolante pri la titolo, kiun mi trovas vere feliĉa. La subtitolo sonas: mistera rakonto, kaj la mistero komenciĝas jam sur la titolpaĝo: ni ne povas diveni, ĉu originala aŭ tradukita libro kuŝas antaŭ ni. Tiu unua mistero iom mishumorigas, sed poste oni komencas foliumi la libron kaj . . . oni ne formetos ĝin antaŭ plena ellego. Tia sugestita forto tia nektraŭstarebla torento de okazaĵoj, tia pliiĝanta streĉo de viziaj bildoj ekkaptas la fantazion de la leganto, kian ne ofte oni trovas en la poramuza literaturo. Pri la temo de la libro mi kompreneble ne parolas, simple mi rekomendas ĝin, certe neniu pripentos la legon. Mi aldonas nur, ke la misteraĵoj tute ne estas fantaste kaj neverŝajne amasigitaj unu sur la alian: la plej fortan efikon la aŭtoro atingas ĝuste per tio, ke la mistero ekfloras el la grizaj okazaĵoj de la trankvilaj, pacaj semajnaĵoj.

Ŝajnas al mi, ke en la ventfrappe rapida, glata, agrabla, rutina, facila stilo eble tie kaj tie ĉi troviĝas makuleto: ŝajnas al mi, sed mi ne scias! La libro tiel forte kaptis min, mi tiel avida glutis ĝiajn paĝojn, ke mi ne povis atenti pri tio.

Vere mi tre ĝojus, se mi aŭdus, ke ĉi tiu libro apartenas al nia originala literaturo.



EL CORONEL IGNOTUS: LA AMO EN LA JARO DEKMIL. El la hispana: José Fernando Berenguer. 352 paĝoj. Eldonejo: Heroldo, Köln. Formato 13,5×20 cm. Prezo: broŝ. 2.80, bind. 4.40 mk. plus 10% por sendkostoj.

Utopio el la speco de la science fantastaj romanoj. Tempo: la centa jarcento. Kadro: juna paro, gefianĉoj, en la XX-a jarcento subite dronas en mortsimilan staton, kiu tamen ne estas morto kaj kiu konservas ilin por la dekmila jaro, en kiu ili revekiĝas. Tra iliaj okuloj ekkonas la leganto la teknikajn miraklojn (cetere ne tre diferencajn de tiuj, kiuj legeblas en aliaj utopioj) kaj la socian mizeron de ĉi tiu fora estonto. La surfacon de la tero loĝos du milionoj da »superpensantoj« t. e. la regantoj de la tero, ĉiuj milionuloj, kaj sub la tero loĝas kaj laboras tri mil milionoj de parioj, inter la plej mizeraj cirkonstancoj. (Inter parentezoj: la sociologio ne estas forta flanko de la eminenta aŭtoro, ekzemple kiu konsumas la gigantan kvanton de produktadoj, kiujn la laboro de la parioj rezultigas? Nenia respondo. Same ĉe la fino, kiam la superpensantoj kaj parioj repaciĝas kaj la parioj venas al la surfaco, la aŭtoro simple prisilentas la kielan solvon de la problemoj.)

Certe estas originala kaj interesa ideo la ĉefmotivo de la libro: la transformo de la ama energio je elektra, kaj ĝia utiligo por industriaj celoj. La verkisto kun videbla prefero okupas sin per la priskribo de la ĉi rilataj teknikajtoj, tio ja ne estas mirinda, li estis eminenta scienculo. Nur la leganto iom ĝojus, se li estus bridinta kelkloke ĉi tiun sian preferon . . . Tamen entute la libro estas interesa, la sceno, kiam Marcial malhelpas la forraban de la filo de Cartoya, ne senas dramecan streĉon.

La lingvo de la traduko estas bona Esperanto, estas laŭdinda la lerteco, per kiu la tradukinto venkis la malfacilaĵojn prezentitajn per la teknikaj partoj. En la antaŭparolo la tradukinto diras: »mi evitis multajn ne nepre necesajn neologismojn«. Nu, la libro celas amuzon, ĝi havas tute simplan, mi povus diri, grize ĉiutagan stilon, do eĉ ne estus motivita la uzo de multaj neologismoj. Krome eĉ troviĝas en la libro kelkaj neologismoj, kiel *ampolo*, *gracila*, *fugi*, kiuj ne estas troveblaj en la klariga listo ĉe la fino de la libro. Do mi tute ne povas kompreni, kiam sencon havas la troa akcentado de la rolo de »bona knabo«?

L. Totsche

JOSEPH SCHERER: CIRKAU LA MONDON KUN LA VERDA STELO. (Eld. Heroldo de Esp. Köln, 272. p. Prezo: RM 4.— broŝ. 5.6) bind. Plus 10% sendkostoj. 13.5×20 cm.

Antaŭ ĉio: ni sensaĝe subskribas tion, kion s-ro Robert Kreuz skribas en la antaŭparolo de la libro pri la graveco de la Scherera mondvojaĝo. »Li atestis ne nur la grandan devastigon de la helplingvo Esperanto: li ankaŭ provis ĝian utilecon. Kaj realiginte . . . la mondvojaĝon, li plenumis aktualan postulon de la publika opinio: montri Esperanton kiel faktoron de l' praktika vivo interpopola.« La belaspekta libro estas grava dokumentaro de tiu signifplena entrepreno: ofte ni trovas eĉ informojn el kiuj ni povas konkludi pri la stato de la diversaj naciaj movadoj. — Kiel dokumentaro la libro absolute taŭgas. Kiel literaturaĵo? Dum la legado mi provis uzi la metodon de la detektivoj de la »kajerromanoj«; kiam la fama detektivo vidis figuron kun granda barbo kaj lipharoj, tuj li provis imagi la saman figuron sen barbo kaj lipharoj kaj konkludi pri la »polica« vizaĝo. Nu, ankaŭ mi uzis la saman manieron. Ankaŭ mi provis senigi la libron de la



esperantistaj barbo kaj lipharoj kaj pensis pri tio, kion mi dirus, legante la saman libron, kiel geografian priskribon en nacia lingvo. Kaj mia konkludo ne ĉiam estas favora al la verkisto, kiu donis al ni ne harmonie egalvaloran verkon. Kelkloke li vidas akre kaj per kelkaj koncizaj vortoj donas karakterizan priskribon, aŭ klarigon de situacio, kiun ni antaŭe certe ne vidis tiom klare, ekz. kiam li prezentas Ĉinuĵon, kaj per tiuj partoj li malkaŝas tre atentindan ĵurnalistan talenton, sed male mi trovis multe da lokoj kie la aŭtoro aludis pri misteroj, aŭ »etoso«, kiujn li laŭ sia aserto komprenis, sed bedaŭrinde mi ne komprenas, ĉar li preterlasis sciigi ilin al la leganto. Eble li volas esti konciza kaj tiamaniere perdiĝas la esenco, kiu nin vere interesas krom la tre gravaj dokumentoj de la esperantista flanko, la spirito de la lokoj, homoj, la aromigo de la priskriboj. Mi supozas, ke la aŭtoro, kies ĵurnalista talento estas ne kontestebla, povus kaj povos doni tian kompletigon de la libro, kiu absolute kontentigos nin, kie ni trovos ĉion, kion nun ni povas nur konjekti. La kuraĝa kaj valora entrepreno kaj ne malpli la talento de la aŭtoro postulas tiun duan verkon, kie li kolorigos tiujn bildojn, kiuj certe pro teknikaj kaŭzoj nun restis senkoloraj. La lingvo estas flua, facila, korekta; tamen iom mi pridubis min mem, kiam mi ekvidis la vorton: »nubgratulo« kaj momenton mi pensis pri iu moderna poezia bildo, nur poste mi povis ekvidi la sufikson »ul«, kies aplikon mi el du vidpunktoj ne povas aprobi en tiu ĉi loko: unue ĉar mi ne ŝatas la alian objektulon la »trimastulo«-n kaj due, ĉar la »koincido faris vorton dubosencaa.« Mi preferus la formon nubgratanto, aŭ nubskrapanto. Belaj, variaj fotoj kompletigas la libron, kies eksteraĵo ne estas malpli plaĉa, ol ĝenerale la enhavo, pri kiu ni havas tre bonan opinion malgraŭ niaj riproĉetoj, kiuj signifas nur niajn pretendojn kontraŭ la talenta aŭtoro.

*Szilágyi.*

DE KONGRESO AL KONGRESO (kongresa jubilea libro, eldonita okaze de la jubilea kongreso de Esp. Köln, 77, p. prezo: GM 1.—) Bele ilustrita, metale kovrita memolibro de la pasintaj 25 kongresoj, kies raportantoj plejparte bone komprenis la tendencon de la libro kaj preterlasis la elementan kritikon de la diversaj kongresarangajoj. Por ni ĉiuokaze la enkonduka traktato de Behrendt pri Zamenhof, la poeto, estas la plej interesa, la prezidanto de la kongreso kaj la nomumita gvidanto de la nuna germana Esp. movado tre interese kaj trafe analizas la poetan individuon de la majstro kaj kelkaj tre interese lumigas la personon de la aŭtoro, kiu ne povas esti ne simpatia al objektive pensanta homo. Ne estas eble nun detale konigi la traktaton, mi volas nur kompletigi la rimarkojn de la aŭtoro per du rimarketoj; la unua estas atentigo pri la dua strofo de »Mia penso«, kie la animluktado de Zamenhof senpere prezentigas, (tion cetere akcentas ankaŭ Behrendt), kaj mi devas akcenti, ke neniam antaŭe kaj neniam poste Z. tiom multe povis montri el si; en tiu strofo estas la volo de la homo, kiu devas esti forta kaj kredema, sed kiu sentas sin iom malgranda kaj malforta en la ombro de la ideo, kies peranto li estas kaj kiu batalas finfine kun la ideo mem: »Fajron sentas mi interne — Vivi ankaŭ mi deziras... Io pelas min eterne —« ĉu ne impresas nin tiuj kelke da vortoj, kiel la plej sekreta disputo de homo kun si mem. Kaj tiu animluktado, tiu disputo aperas ĉe Zamenhof ankaŭ aliajn fojojn, eble ne en tiom konkreta formo, sed ĝi enŝovas sin en poemon, kie li konfesas pri la unuiga forto de lia kredo: »Ho, kiu ajn estas vi, forto mistera,« —



ĉu ne estas tio subkonscia sono el la ateismo de la 15 jara Zamenhof, kiun influis la patra senkredemo, kaj tiu influo aperas en la poemo, en kiu Z. volas solene konfesi la kredon, kion li sopiras kaj kiu finfine venkis en lia animo. Szilágyi.

EMMA L. OSMOND »TRAVIVAJOJ DE KIKI II.«; M. KLOSE-P. BRÖTHER »PRI RUBEZAHIL« (Ambaŭ el la Esp. Junula Biblioteko. Eld. Heroldo de Esp. Köln. Prezoj: 0.25 Mk.) — Tiuj volumetoj estas tre gravaj verkoj en nia malriĉa infanbiblioteko. La ĉarmaj aventuroj de Kiki kaj la allogaj fajroj de la montospirito, kiu estas ege provizita de socia sento, do ambaŭ verkoj ŝajnas esti bonaj edukiloj, ĉu el lingva, ĉu el morala vidpunkto. El la du libretoj la lasta havas eĉ pli simplan stilon. Szilágyi.

\*

ANDRES PINO »KONSILOJ«. (Eld. Tip. Moderna — Valencio. — 56 paĝoj. La aŭtoro nomas sian libron: »sugestoj de malnova Esperantisto«. En la libro estas kolektitaj la riproĉoj kaj kritikoj pri la movado kaj oni ne povas nei, ke la aŭtoro plejparte pravas. La movado sentas la ĝeneralan krizon, sed kelkfoje ni havas la senton, ke trans tiu ĉi krizo ni havas ankaŭ pli specialajn malbonojn. Eble ni, la gravmienuloj ne pravas, sed neniokaze malutilas, se ni metas la manon al la vejno de la movado, por senti ĉiun malordon en la sangocirkulo. La rimedoj, kiujn la aŭtoro proponas parte estas tute interesaj, sed parte ne realigeblaj, ĉar ili signifas iom tro familian spiriton en la movado, kiu eĉ nun ekzistas kaj ofte donas provincan karakteron al la movado. Ekz. malgraŭ tio, ke temas pri la intereso de nia gazeto, mi ne kuraĝus postuli de la aliaj Esp. gazetoj, ekz. de Heroldo, ke ĝi, aŭ ili absolute ne aperigu literaturaĵojn. Sed certe estas absolute sekvenda lia konsilo, ke la naciaj societoj laboru senĉese por varbi naciajn eminentulojn, ĉar tiuj eminentuloj influos la registarojn por la favoro de Esp. — Mi mem, kiu vidis jam sukcesojn kaj fiaskojn en tiu rilato, povas aserti, ke en tiu ĉi rilato la Esperantistojj ŝuldas multege al ŝi mem. Atentinda verko. Szilágyi.

NAUM JERUSALMI. Merkado la azenpelisto. Romano. El la hebrea lingvo tradukis Levi Wiener (Leono Vienano). Eldonejo N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8. 140 paĝoj. Prezo sv. fr. 1.80 + 10%

La t. n. »sefardaj« judoj, vivantaj en la suda Eŭropo kaj la proksima Oriento, grave diferencigas de la t. n. »aŝkenazaj« judoj, kiuj vivas en la cetera Eŭropo kaj en Ameriko. Dum la aŝkenazoj en la daŭro de longaj jarcentoj sukcesis alproprigi al si la kulturon okcidentan, kiun ili en alta grado kunhelpis konstrui, la sefardoj — cetere la malpli granda parto de la juda popolo — multloke konservas ankoraŭ la morojn, kutimojn kaj primilivan vivnivelon de la orientaj popoloj. Nur lastatempe, dank' al la reviviĝinta nacia juda vivo en Palestino, ankaŭ la sefardoj rapide kulturigas. plifortigante kun la aŝkenazoj la kontakton, kiu dum longa tempo ĝis nun estis grave neglektata.

Per tre interesaj priskriboj de la sefardaj moroj la konata hebrea verkisto Naum Jeruŝalmi plektis sian romanon. Kvankam la kanvaso estas sufiĉe ŝablona (idilio de du amoplenaj junaj koroj), la lerta plumo de Jeruŝalmi kapablis rafini ĉi tiun simplan rakonton ĝis ĝuinda romano, nepre rekomendinda eĉ al la plej kribrema leganto. La medio, en kiu okazas la



agado de tiu rakonto, aldonas al la libro plian fascinon kaj ĉarmon.

Leo Wiener, kiun la esperantista publiko konis ĝis nun sole laŭ lia pseŭdonomo Leono Vienano, jam multfoje pruvis sian tradukistan talenton kaj bonegan lingvouzon. Ankaŭ ĉi-foje li prezentis al ni bonan verkon en bona traduko. Li lerte venkis la diversajn malfacilaĵojn, kiujn ofte kaŭzas la tradukado el la klasika hebrea lingvo. Cetere lia Esperanto-stilo estas vere modela (kiel s-o Wiener mem diras en la antaŭparolo, li evitis ĉiujn neologismojn superflujajn kaj malutilajn al nia lingvo — sed tio nur signifas, ke ekzistas ankaŭ neologismoj necesaj kaj utilaj, do kiuj ili estas?). Tamen kelkajn malĝustaĵojn mi trovis en la traduko: s-o Wiener tro ofte uzas la vorton »unika« anstataŭ »sola« aŭ »unusola«, laŭ mi »unika« havas pli precizan signifon, »ankoraŭ« anstataŭ »jam«, »prosperi« anstataŭ »sukcesi« — sed tio neniel malgrandigas la valoron de lia bonega traduko.

I. Lejzerowicz.

BUDAO. Eljapana traduko de la unua ĉapitro de skribita originale en Angla lingvo verko: Esenco de Budaismo (de P. Lakṣmi Narasu). Tradukinto: Takeŭĉi-Tookiĉi. Eldonis: tradukinto, Jamaŝiro-Maĉi Iŝikaŭaken, Japanujo. 11×15 cm. XIV+42+7 paĝoj. Prezo broŝ. 0.50, bind 2.— mk.

La libreto lerte kaj edife konigas la plej ĉefajn trajtojn de budhismo kaj la vivhistorion de Budho. Krome ĝi enhavas kelkajn belajn fotograf-aĵojn pri Budho-skulptaĵoj kaj pentraĵoj kaj aldone partetojn el Darmapado kaj Diga Nikaja. (Ambaŭ libroj estas verkoj el la Ceylon-a pali-kanono).

Estas malfacila afero recenze pritrakti erarojn de traduko de scienca aŭ scienc-aspekta verko, ĉar kelkkloke (kaj ĝenerale ĉe gravaj partoj) oni ne scias: kiun respondigi pro la eventuale trovitaj eraroj. Tamen ekzistas elkoŭduka vojo (kvankam iom duba): la recenzisto respondigas la tradukinton; unue, ĉar li estas pli proksime trafebila: due, ĉar kial li elektis tian materialon; trie, ĉar se li jam tion faris, kial li ne transverkis la originalon; unuvorte: ĉar la tradukinto estas ĉiam almenaŭ kunkulpinto.

Recenzante tiun ĉi verketon, ankaŭ mi devis elekti la supre menciitan vojon. Tion mi faris kun konscienco tiom pli trankvila, ĉar ege verŝajnas, ke temas pri misaĵo de l' tradukinto mem.

»Budao ne parolis arogante« — legeblas sur la 4-a paĝo, — »ke li estas tiu, kiu transdonas favorplenan revelacion de supernatura potenco al homoj...« Pri Kristo estas ĝenerale sciate ke li diris tiaĵon, tial mi trovas la vorton »arogante« iom forta. Sed Kristo nur laŭ la Biblio parolis tiel. Do, se ni lin rigardas laŭ tiu ĉi vidpunkto, ni devas sammaniere agi pri Budho. Ni vidu ekzemple, kion diras la sanskrita »Lalita-vistara« kaj la pali-a »Maĝhimanikaja« pri la naskiĝo de Budho: »...la embrio tiam elpaŝis dekstre el la utero de sia patrino... kaj aŭdigis la *sinhanad*-on (leonkriego): »Mi estas la plej unua en la mondo mi estas la plej granda en la mondo, jen estas mia lasta naskiĝo. Mi finas la suferojn de la naskiĝo, maljuno, kaj morto.« Nun, aŭ ni akceptu la kanonon ĝusta ankaŭ ĉe Budho, aŭ ni forjetu ĉiun legendajon.

La dua afero troviĝas sur la 18-a paĝo, kaj rilatas al la traduko de l' fama Budho-citaĵo; videbla sur preskaŭ ĉiu budhismaĵo (memorobjektoj, preĝ-radoj, ktp.). »Iaj ajn aferoj devenas de kaŭzo, Iliaj kaŭzon klarigis Budao. Kaj tion, kio estas ilia *estingiĝo*... « La malbone uzata »-iĝ-« falsas la tutan enhavon kaj sencan de la budhismo, ŝajnigante ĝin mondri-



gardo tute neaktiva, ni diru, kontentiganta per la nura observado de la aferoj. Kiu nur iom konas la budhismon, vidas la sensecon de tio. La sola ĝusta traduko povas esti (kaj estas) »... Kaj tion, kio estas ilia *estingo*...« (Ĉu granda krio pro nenio?)

La stilo kaj lingvo estas bedaŭrinde ankaŭ krom la supre menciitaj aferoj sufiĉe atakeblaj. Ankaŭ la tradukinto sentis tion, eĉ li skribas ĉirilataĵojn en sia »Postparolo«. Mi tamen ne sentas min absolvita pri denombro de la plej gravaj stilaj kaj gramatikaj eraroj. (La unua cifero markas paĝon, la dua linion. a. legu *anstataŭ*).

1. Malbona aŭ erara vortordo: 5,3 (»nek mi estas ĝi« a. »nek ĝi mi estas«); 5,4 (»nek mi estas homo« a. »nek homo mi estas«); 29, 19 (»lia unu vorto« a. »unu lia vorto«)

2. Malbonaj vortoj: 1, 17 (»alia krom« a. »alia ol«); 5, 22 (»nenio alia krom« a. »nenio alia ol« aŭ »nenio krom«); 7, 21 (»ellasi sin« a. »sin savi« aŭ »eskapi«); 10, 18 (»krom« a. »ol de«); 18, 12 (»paroli« a. »diri«); 18, 18 (»ambaŭ« a. »du«); 34, 15 (»diri« a. »paroli«);

3. Superfluaĵaj vortoj: 2, 14 (»krom tio instrui« a. »krom instrui«); 18, 23 (Tiu); 34, 14 (Li);

4. Superflua ripetado de prepozicioj: XIII, 18; 3, 7, 7/2, 19;

5. Superflua akuzativo: 11, 7;

6. Manko de akuzativo: 2, 7; 8, 7—8; 8, 23; 15, 22; 17, 4; 32, 21;

7. Manko de pluralo: XII, 9; 14, 2; 14, 5;

8. Uzado de »unu« kiel nedifinita artikolo: multfoje.

Ankaŭ la esperantigo de la propraj nomoj ne ĉiam estas kontentige solvita. Antaŭ ĉio mi riproĉas la vorton »budao«. La aŭtoro skribas en la antaŭparolo, ke li motivis sian preferon al ĉi tiu formo en artikoloj japanlingvaj en la Revuo Orienta. Nu, mi ne konas ĉi tiujn artikolojn, sed mi vere ne povas imagi, kiel estis eble motivi ĉi tiun preferon. Laŭ mia opinio la esp-a formo de la sanskrita *Buddha* doniĝas per si mem: se ni ellasas la duoblan *d*, restas *Budho*, perfekta esperanta vorto, havanta la avantaĝon, ke el ĝi oni povas plu formi *budhismo*, *budhisto*, vortojn konformajn al la internaciaj formoj. Se franco aŭ italo ne povas elparoli la sonon *h* post konsonanto, li povas ĝin sentigi per la mallongeco de la *u*-vokalo kaj per iom da paŭzo post la *d* (elparolo cetere konforma al la sanskrita: *budh'o*). La nekonsekvencecon de la tradukinto plej bone montras la esperantigo de la du nomoj *Buddha* (*Budao*) kaj *Anuruddha* (*Anurudo*). Devas esti: *Budho* kaj *Anurudho*.

La esperantistigo okazis plejparte el la sanskrita formo, sed tamen enŝovigis ankaŭ paliismojn, kelkloke eĉ miksite kun sanskritismoj. Ekzemple la nomo *Arada Kalama* estas vera kentaŭro: duone sanskrita (*Arada Kalapa*), duone palia (*Alara Kalama*).

En *ĵateti*, *Maha-prajapati* la literon *j* mi anstataŭigis per *ĝ*, pli konforma al la originala fonetiko.

Multaj sanskritaj vortoj ne estas klarigitaj, ekzemple *atman* (individua animo), *samgo* (eklezio de Budho). Ĉu eble la tradukinto cedas ĉi tiun taskon al la recenzisto?

Entute tamen valora libreto, kiu meritas esti legata.

*Georgo Karczag.*



LA LIBRO-KONSTANTAJO DE FILA PIECO. Esenco de la praktika etiko de konfuciismo. El la ĉina originalo tradukis: Kiuiĉi Nohara. 23 paĝoj. Eldonejo: Japana Esperanto Instituto.

La kajero enhavas moralajn instruojn de Konfucio. Troviĝas en ĝi interesajoj ankaŭ por nuntempulo, ekzemple: »Antaŭ ĉio, niajn korpojn — trunkon, membron, eĉ haron aŭ parteton da haŭto — ni ŝuldas al niaj gepatroj, kaj ni devas esti sufiĉe zorgemaj nek difekti, nek malfortigi ilin: ĉi tie komenciĝas fila pieco. Nian personecon ni devas perfektigi, nian principon ni devas praktiki, por ke ni altigu nian renomon en la venontaj generacioj, kaj per tio ni glorigu niajn gepatrojn: ĉi tie kompletiĝas fila pieco.«

La lingvo de la traduko estas legebla, sed ne tre bona.

L. T.

LA VOJAGOJ DE GULIVERO. Unua parto: Vojaĝo al Liliputlando. Esperantigis: Jos. A. De Roos. 112 paĝoj. Eldonejo: Piet Smits, Tilburgo. Prezo: Guld. 1.25.

La celon de tia porjunulara eldono de la mondfama verko mi ne komprenas. Ĉiu knabo ja konas ĝin en sia gepatra lingvo, do ĝi ne povas servi kiel allogaĵo por junaj esp-istoj. Tiun celon plej efike servus originalaĵoj, kiuj prenas sian temon el la esp-a vivo kaj kiuj kapablas turni la romantikeman fantazon de la junularo al ĝiaj aventuraj ebloj. Manke de tiaj originalaĵoj oni publikigu tradukojn, la nacilingvaj literaturoj ja certe ampleksas multajn modernajn porjunulajn librojn, kiuj meritis tradukon. Kaj, ĉar ili ne estas tiel vaste konataj, ili certe vekus interesigon. Plena eldono de Gulivero (por plenkreskuloj) jam estus alia afero: ĝin ĝoje salutas multaj, kiuj ne povas ĝin akiri en la hejma lingvo, kaj nia literaturo riĉiĝus per unu el la plej valoraj »homaj dokumentoj«...

La libron esperantigis Jos. A. De Roos. Sed el kiu lingvo? Nia literaturo estas jam sufiĉe serioza por ne plu toleri malkompletajn esperantigojn, aŭ tradukojn faritajn ne el la lingvo de la originalo. La esperantiginto evidente volis doni legajon por ekzercado en la lingvo, tiam pli estas riproĉinde, ke la lingvo de la libro ne estas senerara. Jen kelkaj rimarkoj. Abundas superfluaĵaj malsimplaj verboformoj. »Por eviti, ke mi devus dormi« — la kondicionalo uzurpas la lokon de la u-modo. *Akurata, returniro, ruli, multpezo, enloĝanto, bandajo, returni, distrigi, amuziga, mi ne eblis, ĝies (!!)* malĝuste estas uzataj anstataŭ *preciza, reiro, ruliĝi, pezo (aŭ pezezo), loĝanto, bandajo, returni sin (aŭ reveni), distri, amuza, al mi ne eblis, ĝia*. Post »kvazaŭ« kiel konjunkcio malĝuste uzatas indikativo. Ĝin oni povas uzi nur post la adverba »kvazaŭ«, la konjunkcio nepre postulas kondicionalon. Je la amo de Dio mi petas niajn holandajn samideanojn, ke ili rezignu pri la idiotisma esprimo: »mi neeble povas«; ĉu ili ne povus kontentiĝi pri »mi ne povas« aŭ »al mi ne eblas«? Mi legis la jenan netan frazon: »Ili ne tion faris tutkore.« Nu, tio signifas, ke ili *ne tion*, sed *ion alian* faris tutkore, kvankam la senco de la originala teksto evidente estis: »ke ili ne faris tion tutkore.« Simplaj aferoj, ŝajne malgravaj, sed el tiaj malgravajoj ja konsistas la bona stilo kaj la »spirito de la lingvo.«

Ludoviko Totsche.

GEORGO BASTJEN: LA LIBERECANA SOCIO. (El la franca: A. Ozre. Eld: SAT Eldona Fako Kooperativa, Paris, 54 p. Prezo: 60 gmk.) Libro, kiu estas interesa pro sia ŝajna malaktualeco. La liberecana socio-



sin bazas sur la ekvilibro kaj harmonio de la diversaj asocioj de la intereso, sen la kodigo de la interrilatoj. La motivoj estas preskaŭ ne gravaj, ni scias, ke la ideo estas kaj estis plaĉa. Sed ĉu la homo estas jam sufiĉe forta, sufiĉe memstara, sufiĉe komunema estajo por la perfekte libera socio? Niaj pensoj ŝvebas inter la sopiro kaj la amaraj faktoj. Unue devas naskiĝi la nova tipo de la homoj kaj tiam naskiĝos nova sociordo. Kaj la novan tipon kreas la sento de la nekontenteco, kiu brulas en la nuna homo. Ni preparu nin. — diras la aŭtoro kaj niaj posteuloj atingos iam la Idealon. — Bona traduko, facila lingvo.

*Szilágyi*

JAKOB ROSENBERG: SOCIETA LUDARO. Eldonis la aŭtoro, Tallinn. 48 p. Prezo: 0.60 sv. fr.

La libreto enhavas kvindekda interesaj societaj ludoj, kiuj estas bone uzeblaj dum esperantistaj kursoj kaj kunvenoj. La ludoj estas amuzaj kaj spritaj, lingvo kaj stilo bonaj. La ludantoj povas bone ekzerca la lingvon. Rekomendinda verketo, precipe por daŭrigaj kursoj. *T. Czitrom.*

HENRIKO FISCHER, GALATZ, L. K.: LA FABELO PRI LA GRANDA TURO KAJ LA MALGRANDA DOKTORETO, SEKVATA DE ALIAJ KONVINKIGAJ RAKONTETOJ. 24 paĝoj. Biblioteko de la propagandisto. Eldonejo de la Esperanto Centro Rumana. »Oni presis por kelkaj samideanaj amikoj 99 ekzemplerojn de tiu libreto en luksa eldono, numeritaj kaj subskribitaj per la verkisto mem.«

Kiel unua numero de tiu ĉi nova entrepreno aperis la kolektitaj verkoj de s-ro Henriko Fischer. La leganto de ĉi tiu verkaro ĝoje retrovos la historion: »Kiamaniere mi fariĝis esperantisto«, ĉi tiun perlon de la propagandista literaturo. La lasta fabelo temas pri neologismema poeto. Estas karakterize kaj revelacias multe el la subkonsciaj sentimentoj de l' aŭtoro, ke por tiatema novelo li povis trovi, kiel ununuran *happy end*: la morton de la neologismema poeto. Tamen la eminenta ortodoksulo permesu al mi maltrankviligan demandeton: kio okazos, se la poemoj postvivos la poeton?

*L. Totsche*

ROBINSON KRUSO. (Simpla Historieto por komencantoj. Adapto de Kervran. Eld. Esperantista Centra Librejo, Paris. 12 paĝoj. Prezo: 1.— fr. fr.) Simple rerakontita skiza enhavo de la romano de Defoe. Konvena legajo por kursoj.

*Szilágyi.*

EINAR DAHL: Dialogoj kaj Komeditoj. (Eld. Societo Esp. Stockholm, 31 p. Prezo: 0.50 Kr. sv.) — Post la elĉerpiĝinta unua serio nun aperis la dua serio de la Dialogoj. La libreto enhavas plejparte tre bonhumorajn, facile prezentablajn kaj facillingvajn teatraĵetojn, kiuj pro la supre menciitaj kvalitoj estas bone uzeblaj en la grupa vivo kaj bone servas, el pedagogia vidpunkto.

*Szilágyi.*

A. SCHNEIDER — M. CARLSSON: Barbro kaj Eriko. (Eld. Societo Esp. Stockholm, 40 p. Prezo: 0.60 Kr. sv.) Aŭstra junulo kaj sveda junulino korespondas kaj en la leteroj aperas priskriboj pri la du landoj kaj kompreneble el la longa korespondado ne nur la leganto, sed ankaŭ la korespondantoj havas plezuron. Baldaŭ Eriko venos al Svedlando kaj poste ni povos gratuli al la plej nova internacia paro. La letera romaneto servas



al pedagogia celo kaj pro la plejparte absolute facila, flua stilo, ili ankaŭ trafas. Rekomendebla kursa legaĵo. Szilágyi.

PROSPEKTOJN eldonis en Esperanto lastatempe: La ŝipkompanio Nord Deutscher Lloyd, Bremen, La Pribina-Festoj en Nitra, Ĉeĥoslovakujo kaj la urbo Ljubljana en Jugoslavio. Ĉiuj prospektoj estas tre bele aranĝitaj kaj taŭgaj por allogi la atenton de la esperantistoj al la temo kaj de la neesperantistoj al Esperanto, kiun oni uzas tiel grandskale.

LA FOIRO DE LYON (Francujo) kaj la 24-A UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO en Stockholm eldonis belajn afiŝojn kaj sigelmorkojn. Tiujn de Lyon ricevas ĉiu petanto, la afiŝon de Stockholm ĉiu grupo petanta, la sigelmorkojn de la 24-a tre malkare ĉiu interesiganto.

## Informoj pri AELA en 1934

Samtempe ni sendas al vi ekzempleron de la prospekto por 1934 kun la certa scio, ke en tiu ĉi jaro ni povos esti pli akurataj rilate la aperon de la libroj. Ni esperas, ke en la proksimaj tempoj ĉiu ricevos la kvinan verkon, kiu ankoraŭ ĝin ne ricevis kaj ni ĝoje sciigas, ke Enciklopedio de Esperanto jam estas kompostala kaj aperos en du volumoj, anstataŭ la planita unu. Pri tiu temo ni ankoraŭ parolos proksimfoje, kiam ni ekspedos la unuan volumon al niaj membroj.

Ni volas ĉi tie ripeti, ke la malfruo de la libroj 1933. ne influas la limtempon de la plej favora kotizo por la nuna jaro, kio estas 1-a de februaro. Tion ni devis fari pro gravaj teknikaj kaŭzoj kaj ni esperas, ke la limtempon neniu el vi forgesos. Ni petas vin, bonvolu kune kun la pago sendi al ni ankaŭ la aldonitan »Informilo« folion, ĉar sen tio ni ne povus plenumi viajn dezirojn por 1934!

Ni volas diri, ke novajn membrojn por 1933. ni ne plu akceptas. La jaro preskaŭ plene plenumis la esperojn, metitajn antaŭ ĝin kaj ni el kelkaj libroj apenaŭ havas jam ekzemplerojn.

Ni opinias necese alvoki vian atenton al favoro, eble ne tuj rimarkebla. Nome AELA-anoj, repagintaj sian kotizon por 1934. rajtas alpigi sv. fr. 14.— por ricevi duan ekzempleron de la *Enciklopedio*, baldaŭ aperonta. Tiu dua ekzemplero povas servi por iu amiko, kiu ne povis aŭ malfruis aliĝi en 1933. kaj nun ne havas monon por la kotizo kaj superpago, aŭ povas servi por la grupa biblioteko, aŭ eĉ por belega donaco. Tamen ni volas rimarkigi, ke ni ne povas akcepti tian ŝanĝon nur, se ĝi estas indikata sur la informilo resendota.

Ni sendas al ĉiu membro, ne eksiginta, ankaŭ enpagilon. El tiuj landoj, kie la poŝtsparkasa sistemo ne funkcias, ni akceptas poŝtmandatojn al *Pocztowa Kasa Oszczednosci, Krakow, Nr. 403,148 Adm. Literatura Mondo, Polujo* aŭ internaciajn poŝtajn respondkuponojn, kies ekzempleron ni akceptas en la valoro de 0.30 svisaj frankoj. Tiu pagmaniero estas speciale favorega por Argentino, Brazilio, Estonio, Hispanujo, Japanujo, eble eĉ Finnlando kaj kelkaj aliaj landoj.

Ni esperas, ke en la venonta jaro per via helpo ni povos eĉ pli bone plenumi niaj celon: Disvastigi nian literaturon.

Kun plej koraj bondeziroj por la nova jaro, via

ASOCIO DE ESPERANTISTAJ LIBROAMIKOJ.



## NIA POŝTO

*S-roj Ingen kaj Raison* jam ricevis pli frue siajn librojn n-ro 5 kaj do ni ne povas refoje sendi tiajn. Bnv. noti.

*F-ino Remmers*. Ni volas promesi, ke en la eldonadoj de venonta jaro estos nenio, kio ŝokos vin. Ni ja ankaŭ ĉijare ne intencis tion far, kaj en la estonto ni eĉ pli atentos pri tio.

*S-ro Mell*. Pardonu, ni eraris ĉe la kalkulo. Ni kalkulis al vi kel sendkostojn por la venonta jaro nur 4.20 kaj ne 4.90 fr. Okaze ni bonvolos alsendi la diferencon.

La proksima numero de la *Bibliografia Gazeto* aperos dum januaro, en duobla formato kaj enhavo, portos la titolon:

# LINGVO, LIBRO

kaj kostos nur la egalvaloron de 10 sv. centimoj

## Tutan bibliotekon

el  
11.000

diversaj malnovaj kaj novaj gazetoj esperantaj, inter ili multaj plenaj jarkolektoj de jam nehaveblaj kaj malaperintaj

Kelkcent uzitaj libroj, gvidlibroj, prospektoj ĵus venis en nian posedon. Nivendas la gazetojn popece, aŭ po jarkolektoj, la librojn uzitajn por tre favora prezo.

Petu grandan kaj detalan liston kiun ni sendas al vi **p r u n t e** post ricevo de 1 respondkupono.

Ni vendas ĉion al la plejmulte oferanto kaj rezervas nenion speciale por iu ajn.



Du ekzemplerojn de  
**LITERATURA MONDO**  
por unu respondkupono

ni liveras al ĉiu abonanto kaj AELA ano varbcele, el diversaj numeroj de 1931 kaj 1932.



Plej taŭga materialo por ekspozicioj, por propagando.



Mendante pli ol dek ekzemplerojn, ni donas 20% malplikoste.